

Dona de Edgar Gots, Riga
50/32

BIBLIOTEKO
DE LA LINGVO INTERNACIA
ESPERANTO.

PAGĜOJ 401—432.



ILIADO.

POEMO
DE
HOMERO.

TRADUKIS **A. KOFMAN.**

KAJERO II.

NURNBERGO.
PRESEJO DE W. TUMMEL.
1896.

Prospekto.

Ni komencas nun denove la eldonadon de la „Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto“, kiun ni en la pasinta jaro devis interrompi. Ni eldonados ĝin denove regule, kiel antaŭe, kaj sendados ĝin al la abonantoj, kiel antaŭe, t. e. ne postulante antaŭpagon, sed petante ĉiun ricevanton sendi al ni la pagon *post* la ricevo de certa nombro da folioj.

Sed ĉar la elspezoj estas grandaj kaj la enspezoj malgrandaj, tial, por havi la eblon daŭrigi la eldonadon, ni devas plialtigi iom la prezon: de nun ĉiu paĝo (en la formato de la ĝisnuna „Biblioteko“) kostos $2\frac{1}{2}$ centimojn (= 2 pfenigoj = 1 kopeko); post la ricevo de ĉiuj 100 paĝoj la ricevantoj volu alsendi al ni la pagon de $2\frac{1}{2}$ frankoj (= 2 markoj = 1 rublo).

La nomo de ĉiu abonanto estos presata sur la kovrilo de la kajeroj de la „Biblioteko“ tuj, kiam ni ricevos de li la pagon. Tiuj ĉi raportoj sur la kovrilo sekve montros, kiu subtenas la progresadon de nia literaturo kaj afero, kaj servos ankaŭ al ĉiu kiel kvitanco pri la ricevo de lia pago. Sur la unuaj kajeroj ni publikigas nun la nomojn de tiuj, kiuj pagis por la folioj 1 ĝis $21\frac{1}{2}$ de la „Biblioteko“ (en la pasinta jaro).

~~Al~~ Al ĉiu, kiu en la pasinta jaro abonis la „Bibliotekon“, ni sendas nun plue la nove aperantajn kajerojn en tia nombro, kiam li tiam mendis. Se in en la lasta tempo ŝanĝis sian opinion kaj ne volas pli ricevi la „Bibliotekon“ aŭ volas ricevi ĉiun kajeron en malpli granda nombro da ekzempleroj ol antaŭe (se li tiam ricevadis pli ol po unu ekzemplero), li volu sciigi nin pri tio ĉi, por ke ni ĉesu (aŭ malmultigu) sendadi al li.

La personoj, kiuj ne pagis ankoraŭ por la unuaj $21\frac{1}{2}$ folioj de la „Biblioteko“, volu alsendi al ni la pagon. Alilandan monon ni akceptas laŭ ilia plena valoro, sed alilandajn signojn de poŝto ni povas akcepti nur por $\frac{3}{4}$ de ilia nominala kosto.

L. Zamenhof.

Nomaro de la personoj,


kiuj pagis por la unuaj $21\frac{1}{2}$ folioj de la „Biblioteko“.

Per grasaj literoj estas presitaj la nomoj de tiuj, kiuj ricevis (kaj pagis) pli ol po unu ekzemplero de ĉiu kajero (en krampoj apud tiuj ĉi

Biblioteko

de la lingvo internacia

Esperanto.



La progresado de la lingvo Esperanto plene dependas de la progresado de la *literaturo* Esperanta, ĉar la literaturo ne sole disvolvas la lingvon, sed la kreskado de la literaturo estas la plej grava objekto, kiun ni povas *montri al la mondo*, por akiri ĝian konfidon kaj estimon por nia afero. Kiam nia lingvo havus jam eĉ milionojn da adeptoj, sed ne havus sufiĉe fortan fundamenton *korpan*, ni ne povus ankoraŭ esti tute certaj, ke ia neatendita vento ne forblovos iam sen postesignoj nian tutan laboron; sed la *literaturo*, kiun ni posedas, restos ĉiam *nia*; ĝi prezentados ĉiam radikojn, kiujn neniam vento povos elŝiri, neelstrekeblajn dokumentojn, kiuj ĉiam memorigados al la mondo pri nia afero, malgraŭ ĉiaj eble venontaj malfeliĉaj okazoj; ĝi prezentados ĉiam pretan, neforigeblan batalilon kaj fortikaĵon por la estontaj generacioj, se eble la nuna generacio laciĝus en la batalado. Tial ĉiun, al kiu la fortiĝado de la lingvo internacia estas kara, ni kore petas, ke li volu subteni la konstantan kreskadon de nia literaturo kaj *aboni la „Bibliotekon de la lingvo internacia Esperanto“*.

La „Biblioteko“ konsistas el diversaj apartaj verkoj en la lingvo Esperanto*). Ĝi aperas en la nombro de ĉirkaŭ 500 paĝoj (en granda formato) en jaro. Kosto de ĉiu paĝo estas 2¹/₂ centimoj (= 2 pfenigoj = 1 kopeko). La koston ĉiu abonanto pagas *post* la ricevo de ĉiuj 100 paĝoj. Kiu deziras ricevadi la „Bibliotekon“, volu nur sendi al L. Zamenhof (Grodno, Rusujo) la sekvantan leteron: „Mi deziras ricevadi la „Bibliotekon de la lingvo internacia Esperanto“**). La koston (po 2¹/₂ centimoj por ĉiu paĝo) mi promesas pagadi *post* la ricevo de ĉiuj 100 paĝoj. Mia adreso:“

La nomoj de ĉiuj ricevantoj de la „Biblioteko“ estas presataj sur la kovrilo de la kajeroj de la „Biblioteko“ post la ĉiufoja ricevo de pago de la abonanto.

Ĉiu nova abonanto de la „Biblioteko“ ricevas ĝin komencante de tiuj kajeroj, kiuj aperis en la lasta monato; se iu deziras ricevi ankaŭ ĉiujn kajerojn, kiuj aperis *ĝis* tiu tempo, li devas tion ĉi diri en sia letero, kaj por tiuj kajeroj li devas pagi antaŭe, tuj ĉe la mendo.

La persono, kies verko estas presata en la „Biblioteko“, ricevas senpage 100 ekzemplerojn de sia verko.

*) ¹/₂ de la „Biblioteko“ konsistas el materialo por *legado* (pure en la lingvo Esperanto) kaj ¹/₂ konsistas el materialo *leksikologia* (vortaroj Esperantaj en diversaj lingvoj k. t. p.). Abonado de la sola parto literatura sen la parto leksikologia ne estas akceptata.

**) Kiu deziras pli multe subteni la „Bibliotekon“ kaj ricevadi pli ol po unu ekzemplero, volu aldoni: „ĉiun kajeron de la „Biblioteko“ mi deziras ricevadi en ekzempleroj“.

Donaco de

49/32



BIBLIOTEKO
DE LA LINGVO INTERNACIA
ESPERANTO.

—Nr. 76.—



ILIADO.

POEMO
DE
HOMERO.

TRADUKIS A. KOFMAN.



NURNBERGO.
PRESEJO DE W. TUMMEL.
1895.

701.870-B.Esp

Iliado.

Kanto unua.

La pesto. — La kolero.

Kantu, diino, koleron de la Peleido Aĥilo,
Ĝin, kiu al la Aĥajoj kaŭzis mizerojn sennombrajn
Kaj en Aidon deĵetis multegajn animojn kuraĝajn
De herouloj kaj faris korpojn iliajn akiro

5. Al rabobirdoj kaj hundoj — fariĝis la volo de Zeŭso —
De tiu tago, de kiu disigis sin ekdisputinte
La ordonanto al viroj, Atrido, de l' dia Aĥilo.

Kia do dio ekscitis en ili disputon malpacan?

- Filo Latona kaj Zeŭsa. Ekkolerigita de reĝo,
10. Li malsanigis la militistaron, — mortadis popoloj,
Ĉar malhonoris Atrido Ĥrizon, la pastron de l' dio.
Por deaĉeti filinon, li kun netaksebla depago
Venis al ŝipoj Aĥajaj rapidenaĝantaj, en manoj,
Sur ora sceptro, la florokronon de dio Apolo,
15. La malproksimenĵetanta, kaj ĉiujn Aĥajojn petegis,
Sed precipe la ambaŭ Atridojn, la ĉefojn popolajn:

„Ho vi, Atridoj, kaj ĉiuj Aĥajoj kuraĝaj! la dioj,
Sur Olimpo loĝantaj, donu al vi ekdetrui

Urbon Priaman kaj poste hejmen reveni feliĉe.

20. Al mi la karan filinon redonu vi pro deaĉeto,
Estimegante Apolon, la malproksimenpafantan.“

Jen tiam ĉiuj Aĥajoj laŭtege konsentis honoron
Fari al pastro, de li deaĉeton riĉegan ricevi.

- Tio ne plaĉis nur sole al koro de Agamemnono ;
25. Li malhonore forpelis lin kaj al li diris minace :
„Gardu vin, ke, maljunulo, mi vin plu ne vidu ĉe ŝipoj
Larĝaj, nun — pro malrapido aŭ poste — pro la reveno :
Ĉar malcerte vin helpos la scepro kaj krono de l' dio.
Ŝin do mi ne refordonos antaŭe ol ŝi maljuniĝos
30. Hejme, en Argo, ĉe mi, malproksime de ŝia patrujo,
Laboradante teksaĵon. kaj mia kunkuŝantino.
Sed vi foriru kaj min ne ekscitu, ke sana vi restu.“
Tiel li diris, kaj Ĥrizo ektimis, la vorton obeis
Kaj al la multebruanta maro silente foriris.
35. Poste, malproksimiĝante, li ekpetegis fervore
Nun Apolon, la filon de la belabukla Latono :
„Aŭdu, Argentopafarka, apogo de Ĥrizo kaj Kilo
Sankta, potence reĝanta la Tenedoson, vi, glora !
Se efektive mi vian sanktejon beligis per kronoj
40. Aŭ mi iam por vi de plej bonaj kaprinoj kaj bovoj
Grasajn femurojn bruligis, vi mian deziron plenumu :
Punu vi per viaj sagoj pro miaj larmoj Aĥajojn.“
Tiel preĝante li diris, atentis lin Febo Apolo.
Jen li deiris, koleron en koro, Olimpan altaĵon,
45. Ĉirkaŭfermitan sagujon kaj arkopafon sur ŝultroj.
Laŭte sonadis la sagoj sur ŝultroj de ekkolerinto,
Dum li kuradis. Li estis simila al nokto. Li poste
Malproksime de ŝipoj sidiĝis, kaj sagon ellasis,
Kaj el pafarko arĝenta jen sono terura eksonis.
50. Li ekatakis antaŭe nur mulojn kaj hundojn rapidajn,
Sed jen la sagoj maldolĉaj atingis nun ankaŭ mem ilin,
Kaj malvivuloj senhalte en lignaroj flamadis.
Militistaron la sagoj flugadis naŭ tagojn, la dekan
Al kolektiĝo Aĥilo la popolon kunvokis.
55. Tion ĉi metis en liajn pensojn la Hero blankmana,
Ĉar pri Danaoj malĝojis' ŝi, ilin perej vidante.
Kiam ili kunvenis kaj kunkolektiĝis, sin levis
Inter ili Aĥilo rapidapieda kaj diris :
„Mi, ho, Atrido, nun pensas, revenos ni hejmen, irante
60. Ree ĉi tien kaj tien, se nur ni evitos la morton,

Car la milito kaj pesto Aĥajojn mortigas samtempe.
Sed demandu ni pastron aŭ antaŭdiriston aŭ ankaŭ
Songklarigiston, ĉar ankaŭ songoj elvenas de Zeŭso,
Ke al ni diru li, kial koleras nin Febo Apolo,
65. Ĉu, eble, pro nefarita promeso aŭ pro hekatombo,
Ĉu, el ŝafidoj kaj el sendifektaj kaprinoj prenonte
La odoron oferan, li nin liberigos de pesto.“

Tiel dirinte, sidiĝis li. Kaj inter ili sin levis
La Testorido Kalĥaso plej lerta el birddivenistoj,
70. Kiu konadis estanton, estonton kaj ankaŭ pasinton
Kaj alkondukis la ŝipojn Danaajn al Trojo per sia
Scio profeta, de Febo Apolo al li donacita.

Li, bonpensanta, sin turnis al ili kaj tiel parolis:

„Ho, Zeŭsamato Aĥilo, al mi vi ordonas klarigi
75. La koleregon de malproksimegenĵetanta Apolo.

Bone, mi estas dironta, sed vi al mi ĵuru defendi

Min efektive favore per viaj paroloj kaj manoj:

Certe, mi ekkolerigos viron, reĝantan potence

Ĉiujn Arganojn, viron, al kiu obeas Aĥajoj:

80. Reĝo ja estas tro forta kontraŭe la vir' subpotenca;

Se li eĉ tiun ĉi tagon sian malicon subpremos,

Tamen en koro konservos li sian malicon, ĝis li ĝin

Forellasos. Nun juĝu vi, ĉu vi min povas defendi.“

Lin respondante eldiris Aĥilo piedorapida:

85. „Vi kuraĝiĝu, sincere eldiru la dialudaĵon:

Ĵuras mi per Zeŭsamato Apolo, al kiu vi preĝas,

Malfermante la volon de dio al la Danaoj,

Ke, dum mi estos vivanta kaj lumon de l' suno vidanta,

Vin tie ĉi ektuŝos per mano pezega neniun

90. El Aĥajoj, se vi eĉ nomus mem Agamemnonon,

Kiu glorigas sin esti plej forta el ĉiuj Aĥajoj.“

Kuraĝiĝinte, la antaŭdiristo la nemalaŭdebla

Diris: „Koleras li nek pro promeso, nek pro hekatombo,

Nur pro la pastro, la malhonorita de Agamemnono,

95. Ne forlasinta filinon kaj ne alpreninta depagon.

Jen kial nin mizerigas li, la malproksimenpafanto,

Kaj mizerigos ankoraŭ, ne forprenante multpezan

Manon de l' pesto, ĝis estos la ĝojookula filino
Ree al patro kaj kune kun sanktĥekatombo sendita
100. En Ĥrizourbon. Nur tiam nin eble la dio kompatos.“

Tiel dirinte, sidiĝis li, kaj inter ili sin levis
Agamemnono la vastereĝanta, l' heroo Atrido,
Tute malĝoje; la koron malluman kolero plenigis
Kaj la okuloj fariĝis similaj al fajro brilanta.

105. Kontraŭ Kalĥaso antaŭe li nun furioze ekdiris:

„Ho, malbonaĵoportisto, al mi eldirinta neniam
Favoraĵon! Vi ĝojas nur antaŭdiri mizerojn.
Vi antaŭdiris neniam bonvorton kaj nek ĝin plenumis,
Vi ankaŭ nun antaŭdiras al kolektiĝintaj Aĥajoj,
110. Ke l' malproksimenpafanta Apolo ilin nur punas,
Ĉar mi ne volis pro Ĥrizofilino depagon belegan
Preni. Ho, jes, mi preferas ŝin havi en mia domo,
Mi ŝin preferas eĉ plu ol Klitemnestron, kun kiu
Mi edziĝis dum ŝia virgeco. La Ĥrizofilino

115. Al ŝi ne cedas per kresko, talio, prudento, teksado.
Sed mi konsentas redoni ŝin, se tio estas pli bone,
Ĉar mi la savon popolan, kaj ne la pereon deziras;
Sed vi alie honore donacu min, ke mi ne restu
Unu ne rekompencita, ĉar tio ne estas konvena,
120. Ĉiuj vi vidas, ke mia donaco foriras de mi nun.“

Al li kontraŭe respondis Aĥilo piedorapida:
„Ho, vi plej glora Atrido, kaj plej profitama el ĉiuj,
Al vi pro kio Aĥajoj aldonos honoran donacon?
Oni ne scias, ĉu restas ankoraŭ riĉeco komuna,
125. Ĉar la akiron el urboj rabitaj ni jam disdividis.
Estas ne bone ĝin rekolektigi pro ree dividi.
Sed vi ellasu ŝin pro la honoro de dioj; Aĥajoj,
Ni, al vi pagos trioble, kvaroble, se Zeŭso detruu
Iam permesos al ni la Trojon murofortegan.“

130. Al li kontraŭe respondis Agamemnono, la ĉefo:
„Kia ajn estas kuraĝa vi, diosimila Aĥilo,
Trompi ne penu min: vi ne admonos min nek superruzos.
Ĉu vi, mem konservante donacon, vi volas, ke nur mi
Estu rabita de mia, ke mi ĝin ellasu senpage?“

135. Bone, nur se anstataŭos Aĥajoj ĝin per alia
Rekompenco de kosto egala, laŭ mia deziro.
Sed se ili rifuzos, mi prenos ĝin mem: la donacon
Vian aŭ la donacon Ajaksan aŭ l' Odisean;
Prenos mi ĝin, — senigita de ĝi ekkoleros la viro . .
140. Sed iafoje pri tio ni reparolos ankoraŭ.
Nun ni surmetu sur maro sankta la ŝipon nigretan,
Ni kolektigu en ĝi da remistoj amason sufiĉan,
Metu en ĝi l' hekatombon kaj Ĥrizofilinon ruĝvangan.
Unu el viroj konataj estos la ĉefo: Ajakso,
145. Eble Idomeneo, aŭ Odiseo la dia,
Aŭ vi mem Peleido, vi, la plej terura el viroj —
Por oferante pacigi la Malproksimegenĵetantan.“
Al li respondis minace Aĥilo piedrapida:
„Ve al mi! Senigita de honto, vi, profitamulo,
150. Kia Aĥajo de nun viajn vortojn obei ekvolos,
Kun vi irante aŭ kontraŭ viroj batalon farante?
Ĉar mi alvenis ne pro ponardegojnĵetistoj Trojanoj
Kontraŭbatali, ĉar ili kulpiĝis je mi en nenio.
Ili neniam ĉevalojn aŭ bovojn de mi ekdeprenis
155. Aŭ fruktportantajn kampegojn, en Ftio la multeloĝita
Fruktojn ruinis, ĉar inter ni estas ja multe da ombraj
Montoj kaj ankaŭ la maro bruanta. Nur vin, plej senhontan,
Sekvis ni, por ke vi ĝoju, portante ekvenĝon al Trojo
Pro Menelao kaj ankaŭ pro vi mem, vi hundosimila.
160. Sed tion ĉi ne atentas, nek zorgas vi tion ĉi tute;
Min eĉ minacas vi preni donacon, de mi akiritan
Per mia peno, kaj al mi de la Aĥajidoj donitan.
Tamen do mi ja neniam ricevas donacon egalan
Al la via post rabo de urbo per la Aĥajoj.
165. Plej malfacilan laboron en laciganta batalo
Miaj manoj faradas, sed kiam venas divido,
La rekompenco plej granda venas al vi; mi, kontraŭe,
De malmulto kontenta, revenas lacige al ŝipoj;
Nun mi foriras en Ftion, ĉar estas certe pli bone
170. Hejmen reveni en ŝipoj fleksitaj. Mi ne deziras
Malhonorita de vi plu kolekti por vi nun riĉecojn.“

- Al li respondis nun Agamemnono, la ĉefo de viroj:
„Nu do, vi kuru do, se via koro al tio vin igas;
Mi vin pro mi ja ne petas restadi, mi havos aliajn,
175. Por akiri honoron, precipe la Zeŭson-zorganton.
El diaj reĝoj vi estas por mi la plej malamata,
Ĉar vi ĉiam preferas malpacojn, batigojn, batalojn.
Se plu da forto vi havas, donita ĝi estas de dio.
Hejmen revenu vi kun viaj ŝipoj kaj viaj kolegoj,
180. Reĝu vi Mirmidonojn pace, pri vi mi ne pensas,
Mi ne atentis vian koleron, kaj mem mi minacas:
Kiel Febo Apolo deprenas de mi Ĥrizoidon,
Kiun forsendas mi per mia ŝipo kaj miaj amikoj,
Tiel mi mem vian tendon eniros kaj forelkondukos
185. Vian donacon, ruĝvangan la Brizeidon: vi sciu,
Kiom mi estas pli alte ol vi, kaj ke ĉiu teruru
Al mi egali sin kaj malfermite min kontraŭparoli.“

- Tiel parolis li, kaj Pelopido forte doloris,
Inter du pensoj ŝancelis la koro en brusto, en vila:
190. Ĉu, eltirinte de flanko glavon akregan, aliajn
Militistojn forpeli kaj la Atridon mortigi,
Aŭ humiligi koleron kaj sian koron ekbridi.
Dum en animo kaj koro li pensis pri tio kaj grandan
Glavon el ingo eltiris, alvenis al li el ĉielo
195. La diino Ateno, sendita de Hero blankmana,
Kiu amis kaj zorgis ambaŭ heroojn egale.
Ŝi poste li nun starigis, lin kaptis per blondkapoharoj,
Sole al li aperinte: ŝin ĉiu alia ne vidis.
Ektimiginte, sin turnis Aĥilo kaj tuj ekrekonis
200. Palas-Atenon, terure ŝiaj okuloj brilegis.

- Kaj li komencis paroli, kaj diris la vortojn flugilajn:
„Kial vi venis, filino de Zeŭso ŝildontenanta,
Ĉu por ekvidi la arogantaĵon de Agamemnono?
Sed mi eldiras al vi, kaj mi pensas, ke tio fariĝos,
205. La fiereco senbrida baldaŭ lin pereigos.“

Al li respondis Ateno, la bluokula diino:
„Por kvietigi koleron vian mi venis, se restos
Vi obeema; min sendis Hero, diino blankmana,

- Kiu vin ambaŭ egale samtempe amas kaj zorgas.
210. Vi do nun fiuu malpacon, kaj ne elprenu glavegon,
Certe, per vortoj vi povas insulti lin laŭ via volo.
Mi al vi diras, kaj tio ĉi estos efektivigita:
Iam vi havos trioble da luksaj, belegaj donacoj
Pro tiu ĉi fierco. Detenu vin nun kaj obeu.“
215. Ŝin respondante, eldiris Aĥilo rapidapieda:
„Vere, estas bezona vian ordonon obei,
Malgraŭ la koro kolera: ĉar tio ĉi estas pli bona:
La obeantan al dioj, dioj volonte atentas.“
- Diris li, kaj sur arĝentan tenilon li metis la manon,
220. Ree enmetis glavegon en ingon, ne malobeante
Vortojn diinajn. Ŝi baldaŭ ekflugis Olimpon, loĝejon
De dio Zeŭso ŝildontenanta, al dioj aliaj.
- Sed Peleido returnis sin kun parolo kolera
Al Atrido: li sian koleron ne ekĉesigis:
225. „Ho, vi drinkanto kun hunda rigardo, kun cerva
kuraĝo!
- Vi en la koro neniam havas kuraĝon vin armi,
Por kune kun la popolo batali aŭ kun la Aĥajoj
Plej eminentaj embuski vin: tio laŭ vi estas — morto.
Jes! prefereble ja estas en vasta tendaro Aĥaja
230. Vian kontraŭdiranton senigi de lia donaco.
Reĝo-popolmanĝegulo, netaŭgulojn reĝanta!
Ĉar, Atrido, alie vi lastan fojon ofendus.
Sed al vi mi nun diras kaj faras ĵuron grandegan,
Ĵuras mi je tiu scepro, neniam florojn kaj branĉojn
235. Renaskonta, estante lasinta en montoj la trunkon,
Kaj ne reekfloronta (ĉar fero de ĝi ekdemetis
Ĝiajn foliojn kaj ŝelon), kaj portadata en manoj
De Aĥajidoj-juĝistoj, gardantaj la leĝojn, venantajn
De l' dio Zeŭso; mi ĵuras je tiu ĉi ĵuro grandega,
240. Ke eksopiros tuj ĉiuj Aĥajoj, serĉante Aĥilon . . .
Tamen, malgraŭe doloro via, ne povos vi helpi
lin, ekmortigotajn amase per man' de Hektoro
La virbuĉanto, kaj vian vi koron mordetos, ke estis
Vi plej kuraĝan el ĉiuj Aĥajoj malestiminta.“

245. Tiel dirinte, sur teron ekĵetis li sian sceptron,
Beligitan de najloj oraj, kaj baldaŭ sidiĝis.
Sed Atrido koleris ankaŭ. Kaj levis sin poste
La dolĉalingva kaj tondravoĉa Nestoro el Pilo,
El kies buŝo fluadis dolĉamiela parolo;
250. Estis li nun travivinta jam du generaciojn,
Kiuj naskiĝis kaj vivis kune kun li en la sankta
Urbo Pilo, hodiaŭ li superreĝis la trian.
Jen li, bonepensanta, eldiris al la kolektiĝo:
„Ve, ho kia malĝojo surfalas sur teron Aĥajan!
255. Certe, ekĝojos Priamo kaj kune kun li Priamidoj,
Ankaŭ l' aliaj Trojanoj eksentos ĉarmegon en koro,
Se ili aŭdos, ke vi nun malpacas, vi, kiuj estas
En konsiloj plej altaj kaj en bataloj unuaj.
Sed vi aŭskultu, ĉar ambaŭ pli junaj vi estas ja ol mi.
260. Iam mi havis aferon kun viroj ankoraŭ pli fortaj
Ol vi, sed miajn konsilojn ili neniam malŝatis.
Vidis neniam mi kaj ne ekvidos jam virojn similajn,
Kiel Piritio kaj Drio, kiu potencis popolojn,
Kiel Keneo aŭ Eksadio aŭ Polifemo
265. Diosimila kaj dia Tezeo, la filo Egea.
Ili estis pli fortaj ol ĉiuj, sur tero naskitaj,
Kaj, plej fortaj estinte, batalis nur kontraŭ plej fortaj,
Kontraŭ montaj monstregoj, ilin fordetrante.
Kune kun ili mi estis milita kolego el Pilo,
270. El malproksima lando: alvokis min tiuj ĉi viroj;
Kune kun ili batalis mi, kaj kontraŭ ili nenia
Homo, sur tero naskita, havis kuraĝon batali.
Sed ankaŭ ili konsilon mian obee atentis.
Nun vi ankaŭ obeu: obei ja estas pli bone.
275. Vi, Atrido potenca, ne prenu de li la filinon,
Sed ĉe li lasu donacon, donitan de la Aĥajidoj,
Sed ankaŭ vi, Peleido, ĉesu kun reĝo disputi
Malpacante: konvenas ja honoro pli alta
Al sceptroportanta, kiun Zeŭso glorigas;
280. Kaj se vi estas pli forta kaj filo de dia patrino,
Estas li ja pli potenca, ĉar reĝas li multajn popolojn.

Vi, Atrid', humiligu la koron, mi mem vin petegas,
Kontraŭ Aĥilo demetu vian koleron: li estas
Forta apogo Aĥaja en pereigema milito.“

285. Diris al li respondante Agamemnono potenca:
„Vere! Vi, ho maljunulo, ĉion eldiris konvene,
Sed tiu viro deziras esti pli alta ol ĉiuj,
Volas estriĝi je ĉiuj, volas ordoni al ĉiuj
Kaj doni leĝojn, al kiuj, certe, neniu obeos.

290. Se lin la dioj eternaj instruis ĵetadi ponardon,
Ĉu ili ankaŭ pro tio permesis al li — nin insulti?“

Lin interrompis kaj diris diosimila Aĥilo:

„Ho, mi, certege, nur estus timulo kaj netaŭgulo,
Se mi vin kontentigadus je ĉio, kion vi volas.

295. Vi de aliaj postulu tion, tamen al mi vi
Ne ordonu, ĉar mi ne intencas al vi humiliĝi.
Tion mi diras al vi, kaj ĝin vi konservu en koro:
Mi la manon armitan ne levos pro la knabino
Kontraŭ vi aŭ aliaj: vi donis kaj vi ŝin deprenas.

300. Sed el mia cetera havo en ŝipoj rapidaj
Vi nenion deprenos kontraŭ mia bonvolo.
Sed se vi volas, elprovu, ke ĉiuj kune ekvidu,
Kiel el vi nigra sango ĉirkaŭ ponardo ekfluos.“

Tiel ili disputis per malamikaj paroloj

305. Kaj, leviĝinte, dislasis ĉe ŝipoj la kolektigitajn.
Peleido foriris al tendoj kaj ŝipoj rapidaj
Kune kun Menetiido kaj kune kun siaj kolegoj,
Sed Atrido surmetis sur maron ŝipon rapidan,
Dudek remistojn elektis kaj metis en ĝin hekatombon
310. Por la dio kaj ankaŭ la Ĥrizofilinon ruĝvangan,
Kaj Odiseo multsaĝa tie estis ŝipestro.
Ĉiuj sidiĝis kaj baldaŭ eknaĝis sur vojon malsekan.

Kaj al popoloj ordonis purigi sin Agamemnono.

Ili purigis sin kaj la malpuron en maron enĵetis,

315. Kaj sendifektajn hekatombojn oferis al dio:
Bovojn kaj kaprinojn ĉe bordo senfrukta de l' maro,
Kaj l' odoro ofera en fumo suriris ĉielon.

- Tiel ili penadis, sed dume Agamemnono
Tion ne lasis, per kio li ĵus Aĥilon minacis:
320. Vokis rapide li Taltibion kaj Eŭribaton,
Kiu estis liaj heroldoj kaj lertaj servantoj.
„Iru vi tien, en tendon de la Peleido Aĥilo,
Prenu vi la Brizeidon ruĝvangan kaj ŝin alkonduku,
Se do li ŝin ne redonos, mi mem ŝin jam tiam deprenos,
325. Al li venonte kun aro, kaj tio lin plu ektimigos“.
- Tiel dirinte, venigis li ilin kun vorto minaca.
Ili al bordo de l' maro senfrukta malĝoje foriris
Kaj al la tendoj kaj ŝipoj de Mirmidonoj alvenis.
Lin do ili ektrovis ĉe tendo, ĉe ŝipo nigreta
330. Tie sidanta, kaj ilin vidinte ne ĝojis Aĥilo.
Ekkonfuzitaj pro timo kaj respekto pri l' reĝo,
Ili starigis sen ia parolo, sen ia demando,
Sed li mem tion penetris per sia koro kaj diris:
„Bonan venon, heroldoj, senditoj de Zeŭso kaj homoj!
335. Alproksimiĝu, ĉar kulpaj estas ne vi, sed Atrido,
Kiu venigis vin pro la filino ruĝvanga de Ĥrizo.
Dia Patroklo, filinon vi elkonduku, ke ili
Ŝin ekdeprenu. Kaj estu ili mem la atestoj
Antaŭ la dioj feliĉaj, antaŭ homoj mortemaj,
340. Antaŭ la reĝ' furioza, ke kiam oni ankoraŭ
Mian helpon bezonos por malhonoron formeti
De aliaj! . . . Ho, certe, pro pereema malsaĝo
Li, Atrido, ne povas rigardi antaŭen, nek posten,
Por fortikigi Aĥajojn, batalantajn ĉe ŝipoj.“
345. Tiel li diris. Patroklo obeis la karan amikon:
Li elkondukis el tendo kaj donis knabinon ruĝvangan
Al la senditoj, kaj tiuj foriris al ŝipoj Aĥajaj;
Kaj ne volonte kuniris knabino. Dume Aĥilo
Iris plorante for de amikoj kaj tie sidiĝis,
350. Sur la bordo de l' maro; rigardis li maron malluman,
Manojn eltiris kaj sian karan patrinon petegis:
„Mia patrino, ĉar vi min por tempo mallonga
eknaskis,
Devus almenaŭ aljuĝi honoron al mi l' Olimpano

- Zeŭso altetondranta, sed li tute min ne honoras!
355. Jen Atrido, la vastereĝanta Agamemnono,
Min malhonoris estinte de mi forrabinta donacon.“
Tiel li diris plorante; atentis lin lia patrino,
La estiminda, en profundegaĵoj de maro, ĉe l' patro
Maljuniĝinta, kaj venis el maro ŝi kiel nebulo,
360. Kaj apud li, elverŝanta larmojn, ŝi alsidiĝis.
Lin karesante per mano, ŝi la parolon eldiris:
„Filo, pro kio vi ploras? pro kio la koro malĝojas?
Ho, vi kaŝu nenion, ke ambaŭ tion ni sciu.“
Diris, profunde ĝeminte, Aĥilo rapidapieda:
365. „Ĉion vi scias, patrino, pro kio rakonti konaton?
Tebon aliris ni, sanktan urbon de Eetiono,
Kaj ĝin detruis kaj ĉion tien ĉi forelkondukis;
La Aĥajidoj honeste l' akiron dividis, kaj oni
Ĥrizofilinon ruĝvangan elektis por la Atrido.
370. Ĥrizo do, pastro de malproksimegenĵetanta Apolo,
Venis al ŝipoj rapidaj de kuproarmitaj Aĥajoj,
Por deaĉeti filinon per netaksebla depago,
La florkronon portante de malproksimegenĵetanta
Dio sur ora scepro, kaj la Aĥajojn petegis,
375. Sed l' Atridojn, la ambaŭ ĉefojn popolajn — precipe.
Tiam ĉiuj Aĥajoj laŭtege konsentis honoron
Fari al pastro, de li deaĉeton riĉegan ricevi.
Tio ne plaĉis nur sole al koro de Agamemnono,
Li malhonore forpelis kaj lin minacis per vortoj.
380. La maljunulo foriris kolere, sed Febo Apolo
Lian petegon atentis, ĉar amis li multe la pastron.
Sendis li al Argoanoj sagojn malbonajn amase,
Tiam mortadis popoloj, ĉar sagoj de l' dio flugadis
Ĉie en vasta tendaro Aĥaja. Sciigis nin tiam
385. Antaŭdiristo scianta pri volo de dio Apolo;
Mi mem unua konsilis rapide pacigi la dion.
Sed Atrido koleris: subite levinte sin, diris
Li la parolon minacan, hodiaŭ plenumiĝintan.
La ĝojokulaj Aĥajoj ŝin, vere, venigas per ŝipo
390. Hejmen en Ĥrizon kaj ankaŭ donacojn por la Potenculo,

- Sed jus deprenis l' heroldoj de mi el mia tendo
La Brizeidon, donacon honoran de Aĥajidoj.
Helpu do vi vian filon noblan, se povas vi helpi.
Vi sur Olimpon suriru kaj Zeŭson petegu, se iau
395. Vi lian koron ĝojigis per paroloj aŭ agoj.
Ĉar mi vin ofte aŭdadis gloriĝi en domo de l' patro,
Ke l' ĉirkaŭitan de nigraj nubegoj Kronidon vi sola
El senmortema diaro de malhonora pereo
Igis for, dume kateni minacis lin ĉiuj aliaj:
400. Hero kaj Posejdon kaj ankaŭ Palas-Ateno.
Sed vi venis, diino, formetis de li la katenojn,
Sur Olimpon la vastan vokinte Centmanon, nomatan
Breareo de dioj kaj — Egeono de homoj,
Ĉar li estas multege pli forta ol lia patro;
405. Apud Kronido sidiĝis li fiero de gloro,
Kaj lin teruris la dioj kaj timis Zeŭson kateni.
Rememorigu lin, antaŭ li sidiĝu kaj liajn
Vi ĉirkaŭprenu genuojn, ke volu li helpi Trojanojn
Aŭ ĝis tendaro kaj ŝipoj la Aĥajidojn forpeli
410. Mortigatojn, ke ĉiuj sciigu la krimon de l' reĝo,
Ke li mem, Agamemnono Atrido, la ĉefo de viroj
Sciu l' ofendon, faritan al plej kuraĝa Aĥajo.“
Larmojn versante, respondis al sia filo Tetido:
„Ve al mi, ke edukis mi vin, por mizeroj naskitan!
415. Ho, se vi povus ĉe ŝipoj sen larmoj kaj sen malĝojo
Sidi, ĉar estos nelonge vi, tute ne longe vivanta.
Nun ne longtempa kaj pli malfeliĉa ol ĉiuj vi estas
Per unu fojo. Ho, mi vin por malfeliĉo eknaskis.
Tion al tondronjetanta Zeŭso, se volos li aŭdi,
420. Iras mi diri nun supren, sur multaneĝan Olimpon.
Vi do, sidante ĉe ŝipoj rapidaj, ne ĉesu koleri
La Aĥajidojn kaj tute detenu vin de la milito.
Zeŭso hieraŭ festeni al Etiopoj senpekaj,
Ĉe l' Okeano, foriris kaj kune kun li — la diaro,
425. Tamen la tagon dekduan revenos li hejmen, Olimpon.
Tiam eniros mi kupran domon de Zeŭso, mi liajn
Eĉirkaŭprenos genuojn, mi lin inkliniĝi esperas.“

- Tiel dirinte, foriris ŝi. Kaj li reestis, koleron
En la koro pro sia ruĝazonita knabino,
430. Malgraŭ li forkondukita perforte. Sed Odiseo
En Ĥrizourbon alvenis kun hekatombo la sankta.
En la havenon profundan veninte, tuj ili formetis
Velojn kaj ilin kunligis en ŝipoj kaj al la mastejo
Maston altiris, rapide ĝin sur ŝnuregojn mallevigis
435. Kaj en havenon enpelis per remiloj la ŝipon,
Tie ĉi ankron elĵetis kaj ligis al bordo ŝnuregojn.
Mem ili teron suriris kaj l' hekatombon kunprenis
Por dio Febo Apolo malproksimegenĵetanta,
Ankaŭ eliris Ĥrizido el ŝipo la martranaĝanta,
440. Ŝin al altaro kondukis nun Odiseo multsaĝa,
Kaj redoninte en brakojn de l' patro, li tiel eldiris :
„Ĥrizo, venigis min Agamemnono, la ĉefo de viroj,
Por la filinon redoni kaj hekatombon oferi
Al Apolo, ke por Aĥajidoj paciĝu la dio,
445. Kiu pezegajn mizerojn alsendis nun al Argoanoj.“
Tion li diris, ŝin donis en liajn manojn; la patro
Ĝoje ricevis la karan filinon. L' Aĥajoj al dio
La hekatombon majestan ordigis ĉirkaŭe l' altaro
Bonkonstruita, eklavis la manojn kaj prenis l' hordeon.
450. Ĥrizo do levis la manojn supren kaj laŭte ekpreĝis :
„Aŭdu, Arĝentopafarka, apogo de Ĥrizo kaj Kilo
Sankta, potence reĝanta la Tenedoson. Kiele
Vi jam antaŭe atentis mian petegon vokantan
Kaj min trankviligis, mizeriginte l' Aĥajojn,
455. Tiel same vi ree mian deziron plenumu
Kaj de Aĥajoj forigu la teruregajn mizerojn.“
Tiel li diris, preĝante, atentis lin Febo Apolo.
Sed post la preĝo, disĵetis ili la sanktan hordeon,
Kolojn defleksis al bestoj, ekbuĉis kaj felojn deprenis
460. Kaj femurojn eltranĉis, ilin envolvis per graso
Duobligite, de pecoj da kruda viando kovrinte;
Ilin bruligis la pastro sur ŝtipej kaj nigran vinon
Versis sur ili; lin knaboj kun kvindentiloj ĉirkaŭis.
Forbruliginte femurojn kaj l' internaĵojn provinte,

465. Ili distranĉis la reston pece kaj metis sur stangojn,
Rostis ĝin pene kaj fine demetis ĝin. Post la laboro
Ili aranĝis festenon, kaj tiam la koroj iliaj
En tiu bonaranĝita festeno mankis nenion.
Post kvietigo de la malsato kaj de soifo
470. Knaboj plenigis ĝis randoj kalikojn per la trinkaĵo
Kaj, komencinte de dekstre, al ĉiuj pokalojn disdonis.
Daŭre la tago l' Aĥajoj per kantoj pacigis la dion,
Belan peanon kantadis la maljunuloj Aĥajoj,
Glorigadante Apolon, kaj ĝojis li en sia koro.

475. Kiam la suno subiris kaj mallumo fariĝis,
Ili ĉe la ŝnuregoj, tenintaj la ŝipon, ekdormis.
Sed kiam la rozafingra Eos', el nebuloj naskita,
Levis sin, ili fornaĝis al vasta tendaro Aĥaja,
Venton favoran al ili donis Febo Apolo.

480. Ili starigis la maston, disstreĉis la velojn blankegajn,
Vento ekblovis en mezon de veloj, kaj ondo purpura
Ĉirkaŭ la kilo de l' ŝipo naĝanta fortege ekbruis,
Kaj ĝi ekkuris sur ondoj, rapide la vojon farante.
Poste, veninte al vasta tendaro de la Aĥajidoj,

485. Ili eltiris la ŝipon nigretan sur bordon la sablan
Kaj, ĝin subapoginte alte per traboj longegaj,
Ili ne malrapidante disiris en tendojn kaj ŝipojn.

Li do koleris, sidante ĉe ŝipoj rapidenaĝantaj,
Li, Peleido kuraĝa, la dia piedorapida.

490. Li en konsilojn, virojn glorigadantajn, ne venis,
Nek en batalojn. Sed lian koron mordetis malĝojo
Pro la restiĝo senaga: soifis li bruon, batalon.

Jen apenaŭ dekdua matencielruĝo aperis,
Sur Olimpon revenis l' eternevivanta diaro.

495. Zeŭs' antaŭiris. Tetido do ne forgesis la peton
De ŝia filo, ŝi iris el maro kaj levis sin kune
Kun frumatena nebulo ĉielon kaj altan Olimpon;
Tie ĉi trovis ŝi Zeŭson, aparte de dioj aliaj
Sur la supraĵo plej alta de multekapa Olimpo.

500. Ŝi alsidiĝis kaj ĉirkaŭprenis per mano maldekstra

Liajn genuojn, per dekstra liau mentonon ektuŝis,
Kaj potenculon Kronidon-Zeŭson ŝi ekpetegis:

- „Ho, patro Zeŭso, se mi al vi inter diaro ekplaĉis
Iam per vorto aŭ faro, plenumu vi mian deziron:
505. Vi mian filon ekvenĝu, mortonton pli frue ol ĉiuj;
Agamemnono, la ĉefo de viroj, lin malhonoris,
De li preninte donacon kaj mem ĝin forekrabinte,
Sed vi lin venĝu, Antaŭpripensanta, ho, Zeŭso potenca!
Vi al Trojanoj donacu venkadon, ĝis Aĥajidoj
510. Mian filon honoros kaj rekompencos lin glore“.
Tiel ŝi diris. Al ŝi ne respondis la nubopelanto
Zeŭso kaj longe silentis. Tetido do forte alpremis
Sin al ĉirkaŭprenitaj genuoj kaj reekpetegis:

- „Vi ne ŝancelu:“ promesu kaj donu al mi la konsenton
515. Aŭ do — rifuzu (ne timas ja vi), ke tuj nun mi sciu,
Ĉu mi el ĉiuj estas plej malestimata diino.“

- Al ŝi respondis indigne Zeŭso la nubkolektulo:
„Vere, malbona afero estos, se vi kontraŭ Hero
Igos min, kaj ŝi per vortoj insultaj min ekkolerigos;
520. Ŝi jam sen tio en rondo de ĉiuj dioj senmortaj
Kontraŭ mi ĉiam disputas, dirante, — mi helpas Trojanojn.
Tamen vi nun forrapidu, ke Hero vin ne ekvidu.
Mi jam prizorgos, por vian deziron plenumi, kaj al vi
Mi la kapon balanco, por ke al mi vi konfidu:
525. Tio ĉi estas de miaj promesoj por ĉiuj senmortaj
Garantiaĵo sanktega, ĉar estas ne redonebla,
Ne refarebla la vorto, donita dum kapobalanco.“
Ĉe tiuj vortoj mallevis Zeŭso la brovojn mallumaju,
Kaj l' ambroziaj bukharoj de l' Potenculo subfalis
530. De la kapo senmorta, la vasta Olimpo ekstremis.

- Tiel konsiliĝinte, ili disiris nun. Ŝi do
Maron profundan rapidis de la brilega Olimpa.
Zeŭso eniris palacon sian, kaj ekleviĝinte
Iris la dioj renkonte al patro ilia, neniu
535. Kuragiĝis atendi lin: ĉiuj renkonte aliris.

La Olimpano sidiĝis sur trono sia. Sed Hero
Ne preterlasis, ke li konsiliĝis kun la flino

- De maljunulo Nereo, l' argēntapieda Tetido,
Kaj tiajn vortojn pikemajn al Zeŭso potenca eldiris:
540. „Kiu el dioj, vi ruza, al vi sian donis konsilon?
Ĉiam plaĉas al vi ricevadi sekretajn decidojn,
Dum mi malestas de vi, kaj neniam al mi vi diras
Vole eĉ unu vorton de tio, pri kio vi pensas.“
- Al ŝi respondis la patro de la homaro kaj dioj:
545. „Hero, ne penu vi ĉiujn miajn pensojn sciigi,
Ĉar tio estas ne ebla por vi eĉ, por mia edzino.
Certe, neniu el dioj kaj homoj sciigos pri tio,
Antaŭ ol vi, kio estas por vi permesata sciigi;
Tamen do, kion mi volas aparte de dioj decidi,
550. Vi min ne devas demandi, vi min ne devas esplori.“
- Hero la bovookula ree respondis al Zeŭso:
- „Ho, kiajn vortojn eldiris vi, Kronido terura!
Mi ja neniam ĝis nun vin demandis aŭ esploradis,
Tute trankvile decidis vi ĉion, kion vi volas.
555. Sed mi nun timas en koro, ĉu vin ne ekkonvinkis
L' ido de griza Nereo, l' argēntapieda Tetido:
Ĉe vi sidante, ŝi viajn ĉirkaŭprenadis genuojn.
Al ŝi vi eble promesis per kapobalanco Aĥilon
Ekglorigi kaj multajn Aĥaĵojn ekstermi ĉe l' ŝipoj?“
560. Al ŝi respondis dirinte Zeŭso la nubkolektulo:
- „Stranga, vi ĉiam suspektas, ne povas de vi mi kaŝigi,
Sed vi nenion atingos, nur malproksimiĝos de koro
Mia, kaj tio por vi estos ja pli terura ankoraŭ.
Se tio estos, fariĝos tio laŭ mia deziro,
565. Sidu do vi nun trankvile kaj miajn ordonojn obeu!
Ĉar malcerte tuta diaro Olimpa vin helpas,
Se kontraŭ vin nevenkeblajn miajn manojn mi uzos.“
- Tiel li diris, kaj Hero la bovookula ektimis,
Sidis silente, koleron en sian koron bridinte,
570. Kaj eksopiris la Uranidoj en Zeŭsa palaco.
Jen nun eldiris Hefesto, la glora artisto, favore
Pri sia kara patrino Hero, diino blankmana:
- „Estos certege malbone kaj fine ne elsufereble,
Se vi tiel malice malpacos por la mortemaj

575. Kaj inter dioj vi semos ribelon. Ne ĝuos ja pli ni
Ĝojon festenan, se reĝos malpaco. Al mia patrino
Mi nun konsilas (kvankam ŝi mem havas multan prudenton)
Al kara patro obee submeti sin, por ke li ree
Ne ekkoleru, kaj pli ne konfuzi nin dume festeno.
580. Ĉar se li, la Olimpano tondronĵetanta, ekvolos,
Li nin deĵetos de tronoj: li estas pli forta ol ĉiuj.
Sed vi lin volu per vortoj delikataj moligi,
Kaj refariĝos favora baldaŭ al ni l' Olimpano“.
- Tiel dirinte, leviĝis li kaj pokalon dufundan
585. Donis al sia patrino kara kaj diris la vortojn:
„Kara patrino, elportu malĝojon malgraŭe sufero,
Ke mi vin, ho, la plej kara, ne vidu per propraj okuloj
Vin batata; ĉar vana, kiel ajn volus mi, estos
Mia helpo, ĉar Zeŭson kontraŭi estas ne eble.
590. Ĉar jam antaŭe, kiam fojon mi volis vin helpi,
Kaptis li min ĉe l' piedo, de sojlo la sankta min ĵetis.
Tutan la tagon mi flugis suben kaj dum sunsubiro
Mi sur Lemnoson surfalis, havante malmulte da vivo,
Sed la Sintoj ricevis la subenfalinton amike.“
595. Tiel eldiris li, kaj ekridetis Hero blankmana
Kaj ridetante ŝi prenis de sia filo pokalon.
Li do al ĉiuj ceteraj senmortaj, irante de dekstre,
Dolĉan nektaron enverŝis, el la kaliko ĉerpante,
Kaj inter dioj feliĉaj eksonis ridado senfina,
600. Kiam ili lin vidis kuradi kaj rekuradi.
Ĝis sunsubiro festenis ili dum tuta la tago,
Kaj nenio mankis al koroj dum festenado
Bonarangita: nek sonoj belegaj de liro Apola,
Nek l' harmonia kantado de Muzoj, kantantaj alterne.
605. Sed kiam ekestingiĝis la lumo de l' suno brilega,
Ĉiu el ili foriris dormi en sian loĝejon,
Kiun al ĉiu la lamapieda artisto Hefesto
Ekkonstruis per sia multescianta prudento.
Zeŭso do tondronĵetanta iris al sia kuŝejo,
610. Kie li ofte kuŝadis sub ago de dormo la dolĉa.
Tien veninte, li dormis, kaj apud li — Hero orkrona.

Dua kanto.

Songô. — Beotujo.

- Ĉiuj aliaj, diaro kaj viroj ĉevalorajdantaj,
Dum tuta nokto dormadis, nur Zeŭso ne ĝuis ripozon:
Li maltrankvile pensadis en koro, kiel Aĥilon
Reekhonoru kaj multajn Aĥajojn ĉe ŝipoj ekstermi.
5. Fine plej bona el ĉio ekŝajnis lin jena ideo:
Songon trompeman alsendi al Agamemnono Atrido.
Kaj alvokinte la songon, li diris la vortojn flugilajn:
„Kuru vi, songo trompema, al ŝipoj rapidaj Aĥajaj,
Iru en tendon de Agamemnono Atrido la ĉefo
10. Kaj lin precize sciigu l' ordonon komisiatan:
Al li ordonu armigi la buklokapajn Aĥajojn,
Diru, li jam ekposedos nun la larĝastratan Trojurbon
Kaj ke la Olimpanoj senmortaj nun jam ne disiras
En opinioj pri tio, ĉar Her' unuigis nun ilin
15. Ĉiujn per ŝia petego, — Trojanojn minacas mizeroj.“
Tiel li diris; la songo tuj, aŭskultinte la vortojn,
Kuris for kaj ekaperis ĉe ŝipoj rapidaj Aĥajaj.
Venis al Agamemnono kaj trovis l' Atridon dormanta
En lia tendo; lin dormo la ambrozia ĉirkaŭis.
20. Sur lia kapo stariĝis, ekstere al Neleido
Al Nestoro simila (ĉar lin altestimis l' Atrido
Pli ol ĉiujn), kaj jene aldiris lin songo la dia:
„Filo de saĝa Atreo ĉevalobridulo, vi dormas!
Sed tutan nokton ne devas dormadi la viro konsila,
25. Konfidigita de multaj popoloj kaj devoj gravegaj.
Vi min atentu: mi venas kiel kurjero de Zeŭso,
Kiu zorgadas pri vi kaj kompatas eĉ de malproksime.
Al vi ordonas li armi la buklokapajn Aĥajojn,
Povas vi nun ekposedi la larĝastratan Trojurbon,
30. Ĉar l' Olimpanoj senmortaj hodiaŭ jam ne disiras
En opinioj pri tio: Her' unuigis nun ilin

Ĉiujn per ŝia petego, — Trojanojn minacas mizeroj
De Kronido. Vi tion memoru en via animo
Kaj ne forgesu, kiam vin dormo la dolĉa forlasos.“

35. Tiel dirinte, forflugis la sonĝo, lin restiginte
Pripensadantan en koro pri la neefektivigonta,
Ĉar jam hodiaŭ esperis li ekalmiliti Trojurbon.
Malsaĝegulo! Projektojn de Zeŭso li tute ne sciis,
Ĉar reĝemigi kaj remizerigi nun volis la dio
40. En teruregaj bataloj Trojanojn kaj Aĥajidojn.
Jen, penetrita ankoraŭ tuta de dia parolo,
Li ekleviĝis kaj vestis sian ĥitonon molegan,
Novan kaj belan kaj sur ĝin surmetis larĝegan mantelon,
Poste alligis al blankaj piedoj sandalojn belegajn
45. Kaj sian glavon arĝentonajlan surpendis sur flanko,
Prenis en manon la patran sceptron, la nedetruieblan,
Kaj tuj aliris al ŝipoj de kuproarmitaj Aĥajoj.

- Jam la diino Eoso suriris sur altan Olimpon,
Por tagan lumon anonci al Zeŭso kaj dioj aliaj,
50. Kiam Atrido ordonis al altesonaj heroldoj
La buklokapajn Aĥajojn al konsiliĝo kunvoki,
Kaj ili vokis. Rapide la alvokitaj alvenis.
Sed li antaŭe kolektis la maljunulojn multsaĝajn
Apud la ŝipoj de reĝo Nestoro, loĝanto de Pilo.
55. Ili sidiĝis, kaj nun li proponis la saĝan konsilon:

- „Aŭdu, amikoj! Dum dormo alvenis al mi dia sonĝo
En la nokt' ambrozia; ĝi tute al dia Nestoro
Estis mirinde simila per kresko, figuro, grandeco;
Ĝi, stariginte ĉe kapo mia, eldiris la vortojn:
60. „Filo de saĝa Atreo ĉevalobridulo, vi dormas!
Sed tutan nokton ne devas dormadi la viro konsila,
Konfidigita de multaj popoloj kaj devoj gravegaj.
Vi min atentu: mi venas kiel kurjero de Zeŭso,
Kiu zorgadas pri vi kaj kompatas eĉ de malproksime.
65. Al vi ordonas li armi la buklokapajn Aĥajojn,
Povas vi nun ekposedi la larĝastratan Trojurbon,
Ĉar l' Olimpanoj senmortaj hodiaŭ jam ne disiras
En opinioj pri tio: Her' unuigis nun ilin

- Ĉiujn per ŝia petego, — Trojanojn minacas mizeroj
70. De Kronido. Vi tion memoru.“ Kaj tiel dirinte,
Ĝi ekforflugis, kaj de mi la dormo dolĉa foriris.
Ni pripensadu, amikoj, nun, kiel ni armos l' Aĥajojn.
Antaŭafere mi volas elprovi laŭmore per vortoj
Ilin, kaj en multremilaj ŝipoj forkuri proponos.
75. Vi do per vortoj restigu ilin ĉi tie kaj tie.“
Tiel dirinte sidiĝis li, kaj inter ili leviĝis
La maljunulo Nestoro, la reĝo el Pilo sablega;
Bonintencanta, li diris tiel al la kolektiĝo:
„Ho vi, amikoj kaj estroj kaj reĝoj de Argoanoj,
80. Se al ni sonĝon similan rakontus alia Aĥajo,
Nomus mensogo ni ĝin, malestime de li nin returnus.
Sed nun ĝin vidis la plej gloriĝanta el ĉiuj Aĥajoj.
Pensu do ni pri la peroj militigi l' Aĥajojn.“
Tiel li diris. Unua li el kolektiĝo foriris,
85. Kaj obeante la pastron ankaŭ leviĝis l' aliaj
Reĝoj sceptrotenantaj; rapide kuniris popoloj.
Kiel aregoj flugantaj de abelaroj elfugas
El elĉezita ŝtonego, amaso poste amaso,
Tufosimile flugante super floretoj printempaj,
90. Unuj ĉi tien venante, aliaj tien flugante:
Tiel same el ŝipoj kaj tendoj rapidis popoloj
Nekalkuleblaj laŭlonge la bordo vastega, amaso
Poste amaso. Kaj inter ili brulegis la Oso,
La kurjerino iganta de Zeŭso. Kaj ili kuniris.
95. Laŭte bruegis la aroj kaj sube la tero ĝemadis
Sub sidiĝintaj, bruantaj popoloj. Sed levis la voĉon
Tuj naŭ heroldoj, ke ĉiuj kriojn siajn ĉesigu,
Por ekaŭskulti la vortojn de reĝoj de Zeŭsoinfanoj.
Kaj jen apenaŭ sur benkoj la popolaroj sidiĝis
100. Kaj la kriado foriĝis, leviĝis la reĝo Atrido,
Sceptron en mano tenante; pretigis ĝin arte Hefesto
Kaj ĝin Hefesto fordonis foje al Zeŭso potenca;
Zeŭso fordonis ĝin al la Argoenkinto Hermeso,
Dia kurjero, kaj li — al Pelopso ĉevalobridulo;
105. Tiu ĉi donis ĝin al la popoloreĝanto Atreo,

Sed li mortante ĝin lasis al riĉa per brutoj Tiesto ;
Tiu ĉi ree ĝin donis al Agamemnono, por porti
Kaj kune reĝi insulojn multajn kaj mem la Aĥajojn.
Sin apoginte sur tiun ĉi sceptron, eldiris Atrido :

110. „Ho vi, amikoj, herooj Danaoj, Aresokolegoj!
Zeŭso Kronido surmetis sur min nun ŝarĝon pezegan.
Dio kruela! Li foje promesis al mi, kredigante,
Ke deĵetinto de Trojo fortmura mi hejmen revenos,
Sed li min volas perfidi, al mi ordonante — senglore
115. Argon reveni, estinte perdinta multegon da viroj.
Tiel sendube alplaĉas al Zeŭso la ĉiupotenca,
Kiu deĵetis jam multon da kapoj altegaj de urboj
Kaj deĵetados ankoraŭ: li havas potencon senfinan.
Certe! sed kia hontego, se eĉ antaŭuloj sciigis,
120. Ke tute vane ni, tia kaj granda popolo, Aĥajoj,
Tiel senfrukte militis kaj kontraŭ viroj batalis
Multplimalgrandaj laŭ nombro... Sed fino ne estas vidata...
Ĉar se ni volus, Aĥajoj, kune kun viroj el Trojo,
Ligon per ĵuro farinte, kalkuli la ambaŭ popolojn ;
125. Se kolektiĝus Trojanoj, havantaj proprajn kamenojn,
Kaj ni, Aĥajoj, dividus nin tiam po dekoj da homoj,
Kaj ĉiu viro el Trojo fariĝus por ni vinĉerpanto, —
Tiam al multoj da dekoj mankus vinenverŝantoj:
Tiel pli granda, mi diras, estas Aĥajoj laŭ nombro
130. Ol la urbanoj de Trojo. Sed ili havas ligojn
El multaj urboj, sciantajn ponardegojn ĵetadi,
Min demetantajn de celo, kaj kiel ajn mi soifadas,
Ili al mi ne permesas detrui Trojurbon fortmuran.
Estas naŭ jaroj de Zeŭso potenca jam nun forfluitaj,
135. Ligno de ŝipoj ekputris kaj jam defektiĝis ŝnuregoj,
Niaj edzinoj kaj kune kun ili l' infanoj malgrandaj
Hejme sidadas kaj nin atendadas, sed estas ankoraŭ
Ni malproksime de celo, pro kia ni tien ĉi venis.
Sed vi nun, kiel mi diras, al mia konsilo obeu:
140. Kuru ni for en la ŝipoj en nian amatan patrujon,
Ĉar larĝastratan Trojurbon ni almilitos neniam.“
Tiel li diris kaj tuj en popolo amasa ektuŝis

- Korojn de ĉiu, kiu la antaŭkonsilon ne aŭdis.
Malkvietiĝis l' amaso, kiel marondoj grandegaj
145. De Ikario, se l' ventoj Eŭro kaj Noto samtempe
Forte ekblovas, el nuboj de patro Zeŭso veninte;
Aŭ kiel vastan grenkampon Zefiro ondigas, ĵetinte
Sin kolerege kaj brue sur ĝin, subfleksante la spikojn:
Tiel same moviĝis la kolektiĝo. Kriante,
150. Ŝipojn alkuris l' amaso, kaj el sub piedoj leviĝis
Nuboj el polvo, kaj ekkuraĝigis unu alian
Preni la ŝipojn kaj ilin surmeti sur maron la sanktan.
Ili la kavojn purigas, kaj krioj de l' hejmencelantoj
Sonas ĉielon; jen ili eltiras la ŝipsubapogojn.
155. Nun ekfariĝus, eĉ kontraŭ la sorto, reveno al hejmo
De Argoanoj, se Hero al Palas-Ateno ne dirus:
„Kiel, filino potenca de Zeŭso ŝildotenanta!
Ĉu efektive hodiaŭ hejmen forkuros en karan
Landon de patroj l' Argoanoj sur spinoj vastegaj de maro,
160. Triumfigonte Priamon kaj ĉiujn Trojanojn per tio,
Forrestigonte Helenon, pro kiu multegaj Aĥajoj
Tie pereis, ĉe Trojo, kaj for de la kara patrujo?
Flugu al militistaro de kuproarmitaj Aĥajoj,
Per dolĉaj vortoj detenu vi ĉiujn kaj ne permesu,
165. Ke ili trenu sur maron la ŝipojn duflanke fleksitajn.“
Tiel ŝi diris. Obeis volonte Ateno potenca.
Kiel ventego deflugis ŝi de Olimpaj supraĵoj
Kaj al rapidenaĝantaj ŝipoj rapide alvenis.
Si Odiseon nun trovis, per saĝo simila al Zeŭso.
170. Pense li staris, kaj sian ŝipon belegan, nigretan
Tute ne tuŝis: malĝojo eniris en lian animon.
Kaj apud li stariĝinte, eldiris al li la diino:
„Ho, Laertid' Odiseo multegelpensema kaj dia!
Ĉu efektive vi volas hejmen en karan patrujon
175. Kuri for, sin enĵetinte en ŝipojn multeremilajn,
Triumfigonte Priamon kaj la Trojanojn per tio,
Forrestigonte Helenon, pro kiu multegaj Aĥajoj
Tie pereis, ĉe Trojo, kaj for de la kara patrujo?
Iru ne malrapidante al militistaro Aĥaja,

180. Per dolĉaj vortoj detenu ĉiun kaj ne permesu,
Ke ili trenu sur maron la ŝipojn duflanke fleksitajn“.

Tiel ŝi diris. L' heroo ekkonis la voĉon diinan,
Kaj li ekkuris, mantelon fordeĵetinte; ĝin levis
Eŭribato, Itaka heroldo, lin alsekvinta.

185. Kaj Odiseo, veninte al Agamemnono Atrido,
Prenis de li lian sceptron patran kaj ne pereeblian
Kaj al la ŝipoj de kuproarmitaj Aĥajoj aliris.

Kian ajn reĝon li vidis aŭ militiston gloregan,
Li al li venis, per dolĉa parolo lin detenante:

190. „Viro, ne al vi konvenas tremi nun kiel timulo,
Sed vi sidiĝu kaj ankaŭ ordonu aliajn sidiĝi,
Ĉar vi sendube ne scias l' intencon de Agamemnono;
Nun li elprovas l' Aĥajojn, sed baldaŭ li ilin ekpunos,
Ĉar en konsilo ne ĉiuj aŭskultis ja lian parolon.

195. Ke ne koleru li kaj ne ekpunu kruele l' Aĥajojn!
Estas terura kolero de reĝo, infano de Zeŭso,
Lia honoro devenas de Zeŭso kaj dio lin amas.“
Sed se li vidis kriantan viron el simpla popolo,
Li lin batis per sceptro kaj diris la vortojn minacajn:

200. „Vi, mizerulo, sidiĝu, kaj aŭdu vi virojn aliajn,
Pli estimindajn ol vi, malfortulo kaj nemilitema,
Vi, ne taŭgantá en ĉiu batalo, en ĉiu konsilo.

Tie ĉi ja ni ne ĉiuj Aĥajoj regas samtempe,
Ĉar potencaro ne donas bonon, kaj estu nur unu
205. Reĝo kaj unu nur ĉefo, al kiu Zeŭso multsaĝa
Donis sceptron kaj leĝojn, por ke li potencu aliajn“.

Tiel potence ordigis li ilin, kaj al la konsilo
For de tendaro kaj ŝipoj ili nun ree rapidis
Brue, kiel ondego de maro eternebruanta

210. Kontraŭ la bordo ĵetiĝas, kaj eĥo respondas al maro.

Ĉiuj aliaj sidiĝis trankvile sur lokoj iliaj,
Sole Tersito vantvorta nedeteneme kriadis;
Li, kies koro enhavis multajn parolojn malpurajn,
Por malpacigi senpense kaj malkonvene la reĝojn,

215. Se li nur trovis, ke tio la Argoanojn ridigis;
Li, plej malbela el viroj, venis kun ĉiuj al Trojo,



- Estis li strabokululo kaj ankaŭ lamulo, la ŝultroj Ĝibaj sur brusto kuniris, kaj supre leviĝis la kapo Akrafine, kovrita de kelkaj lanugoj maldensaj.
220. Lin ne suferis precipe Aĥilo kaj Odiseo:
Li ilin ĉiam insultis. Nun Agamemnonon Atridon Dian li pike kaj laŭte insultis. Kaj ĉiuj Aĥajoj Forte koleris kaj forte indignis en siaj animoj. Sed li, laŭtege kriante, Agamemnonon insultis:
225. „Ho vi, Atrido, pro kio vi plendas kaj kion vi volas? Estas ja plenaj de kupro viaj tendoj kaj ankaŭ De elektitaj virinoj, kiujn ni ĉiuj, Aĥajoj, Al vi unua donacas, kiam nur urbon ni rabas. Ĉu eble mankas vin oro de ia ĉevalobridulo
230. Trojurbano, portota pro deaĉeti la filon,
Kiun mi mem aŭ alia altrenus ekkatenitan?
Ĉu vi junetan virinon volas por ĝui volupton Unu kaj sola, aparte de ĉiuj? Ho ne, ne konvenas, Ĉefo estante, Aĥajojn en mizerojn trenadi.
235. Molaj, timuloj! Ne estas Aĥajoj vi, nur — Aĥajinoj!
Hejmen fornaĝu ni nun, sed lin ni forlasu ĉe Trojo,
Ke per donacoj satigu li tie ĉi, ke li sciigu,
Ĉu ni hodiaŭ lin helpas per io, aŭ eble — ne helpas,
Lin, kiu ĵus Peleidon, viron pli indan ol li mem,
240. Malhonoris, ŝtelinte donacon kaj nun ĝin havante.
Certe, Aĥilo ne havas galon aŭ eble kuraĝon,
Ĉar vi alie, Atrido, ofendus lin nun lastan fojon.“
Tiel insultis li Agamemnonon, la ĉefon de viroj.
Sed Odiseo la dia al li alvenis rapide
245. Kaj, rigardinte kolere lin, diris la vortojn minacajn:
„Ho, babilulo malsaĝa, kvankam tondrega kriulo!
Haltu, ne havu kuraĝon sola vi reĝojn disputi,
Ĉar mi ne pensas, ke estas iu pli malhonora
Ol vi inter venintoj al Trojo kun la Atridoj.
250. Tial ne devas vi nomi per via buŝo la reĝojn,
Nek kriadi insultojn, nek la revenon persisti,
Ĉar ni ne scias ankoraŭ, kiel finiĝos l' afero,
Ĉu ni, Aĥajoj feliĉe revenos aŭ malfeliĉe.

255. Ĉu vi nun Agamemnonon Atridon, la ĉefon de viroj,
Tie sidantan, insultas, ĉar al li l' herooj Danaoj
Multe donacas? vi tial lin en la konsilo insultas?
Mi al vi diras — kaj tio ĉi estos efektivigita —
Se mi vin yidos denove frenezi kiel hodiaŭ, —
Ke Odiseo ne havu plu sian kapon sur ŝultroj
260. Kaj ke neniu jam nomu min patro de Telemako,
Se, ekkaptinte vin, mi vian veston de vi ne forŝiros,
Vian mantelon, ĥitonon, kaj eĉ la kovrilon de honto
Kaj vin, plorantan, al ŝipoj rapidenaĝantaj ne sendos
For el konsilo, kovritan de frapoj malhonorantaj.“
265. Diris li kaj lin ekbatis sur spinon kaj ŝultrojn per
sceptro,
Kaj kunpremiĝis Tersito, larmojn elŝprucis l'okuloj,
Sanga cikatro montriĝis sur lia spino sub pezo
De ora sceptro. Tremante, sidiĝis li kaj, dolorante,
Li de malbela vizaĝo siajn larmojn forviŝis.
270. Kiel ajn ĉiuj malĝojis, ili pri li kore ridis
Kaj, rigardante unu aliajn, tiel parolis:
„Ho, Odiseo plenumis multegon da gloraj aferoj,
Saĝajn konsilojn donante kaj ordigante batalojn.
Sed li plenumis nun inter Aĥajoj plej bonan aferon,
275. Silentiginte la paroliston senbridan, malbonan.
Ĉar l' aroganta animo ree malcerte ekvolos
Reĝojn ofendi per sia parolado pikema.“
Tiel parolis l' amaso. Leviĝis la urbdetruisto
Odiseo kun sceptro; kaj apud li Palas-Ateno
280. Staris simila heroldon; ŝi ĉiujn ordonis silenti,
Por ke l'unuaj kaj lastaj vicoj de viroj samtempe
Lian parolon aŭdu kaj lian konsilon pripensu.
Li, bonpensanta, komencis paroli al la kolektiĝo:
„Ho vi, Atrido! L'Aĥajoj volas hodiaŭ vin, reĝon,
285. Ekmalhonorantaŭ ĉiuj popoloj homaraj
Kaj ne plenumas promeson, tiam al vi aldonitan,
Kiam al vi ili sekvis el la ĉevalriĉa Argurbo, —
Trojon fortmuran forlasi sole post ĝia detruo.
Nun do l' Aĥajoj, simile infanojn, simile vidvinojn,

290. Unu antaŭ alia ploras, volante en hejmon.
Ĉiu, certege, celadas al hejmo, sentante doloron,
Ĉar forestanto de sia edzino eĉ unu monaton
Plendas jam, kiam li estas en ŝipo multeremila
Detenata de vintraj ventegoj kaj maro bruanta.
295. Ni do, ni vidas nun forekruliĝi jam naŭan la jaron,
Ni, l'atendantoj. Kaj tial mi ne mallaŭdas l'Ahajojn,
Malĝojantajn eĉ ŝipoj kaj hejmen volantaj. Sed estus
Honto al ni longrestintoj, se ni kuu nenio revenus.
Ho, paciencu, amikoj, atendu vi, ke ni sciigu,
300. Ĉu almenaŭ Kalhaso al ni antaŭdiris la veron.
Ĉar ni en koro ja scias bonege, kaj estas atestoj
Ĉiuj vi, kiujn la Keroj de morto ne forelkondukis:
Ŝajne hieraŭ ankoraŭ (dum en Aŭlidon la ŝipoj
Niaj eniris, por Trojon kaj Priamon minaci),
305. Kiam ni fonton ĉirkaŭis kaj al senmortuloj oferis
Sendifektajn la hekatombojn sur sanktaj altaroj
Sub platano, el kiu akvo brilega ŝprucadis, —
Signo mirinda aperis. Drako kun skvamoj purpuraj
Terurega (lin mem Kronido en mondon venigis)
310. El sub altaro elsaltis kaj sur la platanon ĵetiĝis.
Sur la platano kuŝadis senplumaj paseridetoj,
Sur ĝia branĉo plej alta, inter folioj, kaŝitaj;
Ok ili estis, la naŭa estis ilia patrino.
Ilin, mizere pepintajn, englutis tiam la drako,
315. Kaj la patrino, ĉirkaŭe flugante, pri l'idoj sopiris.
Sed jen kurbiĝis la drako kaj ŝin eĉ flugilo ekkaptis.
Sed post manĝego de la paseridoj kaj de paserino
Faris la dio el drako alvenigita la signon:
El ĝi ekfaris li ŝtonon, la Kronido multsaĝa.
320. Ni tiam staris silente kaj la aperon admiris.
Ĉar la terura apero nian aferon malhelpis,
L'antaŭdiristo Kalhaso al ni rapide eldiris:
„Kial vi staras senvorte, vi, buklokapaj Ahajoj?
Zeŭso autaŭpripensanta per tiu ĉi signo anoncas
325. Longe daŭrontan aferon, sed gloron eternan havontan.
Kiel la drako l'idetojn de la paserino englutis

- (Ok ili estis kaj naŭ kun ilin naskinta patrino),
Tiel same naŭ jarojn ni antaŭ Trojo militos,
Tamen la dekan deĵetos ni larĝastratan Trojurbon.“
330. Tiel Kalĥaso parolis, kaj ĉio fariĝas hodiaŭ.
Tial atendu kaj restu, ĉiuj Aĥajoj kuraĝaj,
Tie ĉi ĝis al milito de granda urbo Priama.“
- Tiel li diris. L'Arganoj laŭte ĝojegis; ĉirkaŭe
Krioj iliaj de ĝojo terure resonis de ŝipoj,
335. Kaj Odiseon la dian ĉiuj Aĥajoj laŭdadis.
Poste al ili eldiris la estiminda Nestoro:
„Dioj! Vi en la konsilo kiel infanoj parolas,
Kiuj, malartaj, tute ne zorgas aferojn militajn.
Kio fariĝos el niaj kontraktoj, elniaj ĵuradoj?
340. Ĉu kiel fumo foriĝos konsiloj kaj zorgoj de viroj,
Kaj vinoferoj kaj manopremadoj neekrompeblaj?
Ĉar nur vanvorte disputas ni tie ĉi kaj ni ne povas
Peron eltrovi, kvankam de longe ni tie ĉi estas.
Estu malmola, decida, Atrido, kaj tiel autaŭe
345. Vi nin, Arganojn, denove konduku en sangan batalon,
Tiujn do (du — eble tri) lasu iri for, kiuj aparte
Volas (ne efektiviĝos tamen espero ilia)
Hejmen, en Argon, reveni antaŭe ol ili sciiĝos,
Ĉu estas vera aŭ ne la promeso de Zeŭso potenca;
350. Ĉar ni konfirmas, ke al ni Zeŭso balancis la kapon
Tiun ĉi tagon ĵus, kiam eniris ni ŝipojn rapidajn,
Argopopoloj, por porti al Trojo pereon kaj morton;
Ĉar dekstraflanken surĵetis li fulmon, la signon feliĉan.
Tial neniu el ni forrapidu hodiaŭ al hejmo,
355. Antaŭ ol tie ĉi kun ia Troja virino kunkuŝi,
Ke ni ekvenĝu malĝojon kaj larmojn de bela Heleno.
Se iu tamen fortege deziras en hejmon reveni,
Li kuraĝiĝu tuŝeti sian ŝipon nigretan,
Ke li antaŭ ol ĉiuj trovu pereon kaj morton.
360. Reĝo, proponu konsilon vi mem, sed nin ankaŭ aŭskultu.
Certe ne malestimeblan vorton mi volas eldiri:
Vi militistojn dividu laŭ popoloj kaj gentoj,
Ke al popolo — popolo helpu kaj gento al gento.

Se tion faros vi kaj l' Aĥajidoj obeos, vi scios,
365. Kiu el ĉefoj kaj kiu el popolaroj timemas
Kaj kiu estas kuraĝa, ĉar ĉiu batalos pro si mem.
Ankaŭ vi scios, ĉu laŭ dia volo ne prenas vi l' urbon
Aŭ pro timeco de viroj kaj manko de arto milita.“

Al li respondis la ĉefo de viroj, Agamemnono:

370. „Ree, grizulo, vi venkas per via konsilo l' Aĥajojn.

Ho, Kronido potenca, Apolo kaj Palas-Ateno!

Se dekon da konsilistoj similaj mi nur posedus,

Tuj inkliniĝus la urbo fortmura de reĝo Priamo,

Per niaj manoj prenita kaj disrabiĝa ĝis fino.

375. Sed nur mizerojn alsendis al mi la Ŝildotenanto,

Kiu en vanan disputon kaj malpacigon min ĵetas.

Tiel ni, mi kaj Aĥilo, pro la knabino disiris,

Unu alian insultis, mi faris ofendon l' unua.

Se iafoje kun li ni denove konsente konsilos,

380. Tiam ne unu minuton prokrastos pereco de Trojo.

Nun do vi tuj matenmanĝu, ke povu vi fari atakon;

Vi ponardegojn akriĝu ĉiu kaj ŝildojn pretigu,

Donu al viaj ĉevaloj rapidaj bonegan nutraĵon,

Ĉirkaŭrigardu kaleŝojn bone, prizorgu batalon,

385. Ke tutan tagon ni povu dediĉi al sanga batalo,

Ĉar jam ne estos ripozo tiam eĉ unu minuton,

Antaŭ ol nokto venonta disigos malicon de viroj;

Ŝvito de viroj riĉege tiam surkovros rimenon,

Ŝildon tenantan, kaj mano laciĝos ĉe ponardego,

390. Ŝvito surkovros ĉevalon, jungitan en bela kaleŝo.

Sed se ekvidos mi iun, for de la batalo starontan

Ĉe krutanazaj ŝipoj, estos al li jam ne eble

Sin forekkaŝi de hundoj kaj de birdaro rabema.“

Diris li. Laŭte ekkriis l' Aĥajoj; tiel ondegoj

395. Bruas ĉe bordo altega, ĵetitaj per Noto kolera

Kontraŭstarantan ŝtonegon, senĉese de ondoj batatan,

De kie ajn blovas ventoj, de ĉi tiu flanko aŭ tiu.

Ili leviĝis, disiris, rapide alvenis al ŝipoj.

Fumo leviĝis el tendoj: ili tuj prenis la manĝon.

400. Ĉiu el ili oferis al sia dio senmorta,

- Ĉiu petegis lin savi de morto kaj batoj Aresaj.
Ankaŭ oferis Agamemnono, la ĉefo de viroj,
Bovon kvinjaran kaj grasan al Kronido potenca;
Li plej maljunajn kaj plej eminentajn Aĥaĵojn invitis,
405. Antaŭ ol ĉiujn Nestoron kaj Idomeneon, la reĝon,
Poste ambaŭ Ajaksojn kaj Diomedon Tididon,
Sesan do — Odiseon, egalan al Zeŭso per saĝo.
Sed Menelao al li seninvite volonte alvenis:
Sciis en koro li, kiel la frato pri li zorgadis.
410. Ili ĉirkaŭis la bovon, prenis la sanktan hordeon,
Kaj Atrido potenca laŭte preĝante eldiris:
„Zeŭso, plej glora, plej granda, eterologant' nigranuba!
Ke ne kaŝigu la suno kaj ne subvenu mallumo
Antaŭ ol tute deĵetos ni la domegon Priaman,
415. Eknigrigitan de fumo, kaj forbruligos pordegojn;
Antaŭ ol mi ekdeŝiros kirason de Brust' de Hektoro,
Trabatita per kupro, kaj ĉirkaŭ li liaj amikoj
Tere, en polvo kuŝante, mordos per dentoj la koton.“
- Tiel li preĝis, sed lin Kronido ne volis atenti,
420. Sed, la oferon preninte, al li multajn zorgojn difinis.
Post la petego surŝutis ili la sanktan hordeon,
Kolon defleksis al bovo, ekbuĉis kaj felon deprenis
Kaj, eltranĉinte femurojn, ilin envolvis per graso
Duobligite, de pecoj da kruda viando kovrinte,
425. Tion ĉi ili sur ŝtupoj senfolietaj bruligis
Kaj, trapikinte internon, turnadis la korpon sur flamo.
Forbruliginte femurojn kaj internaĵon provinte,
Ili distranĉis la reston pece kaj metis sur stangojn,
Rostis penade kaj fine ili ĉion demetis.
430. Post la laboro ili aranĝis festenon, kaj tiam
Ili festenis, al koroj iliaj mankis nenio.
Post kvietigo de la malsato kaj de la soifo,
Tiel al ili aldiris la maljunulo Nestoro:
„Ho vi, Atrido plej glora, ĉefo Agamemnono,
435. Ke tie ĉi ni ne perdu pro vortoj la tempon, kaj pli ne
Malrapidigu l' aferon, de dio al ni konfiditan!
Ke la heroldoj la kuproarmitajn Aĥaĵojn per krio

- Tuj rapidege kunvoku ĉe ŝipoj rapidenaĝantaj.
Ni do, kolektiĝinte, en vasta tendaro Aĥaja
440. Tiam irados kaj tuj rapidigos batalon kruelan.
Tiel li diris; atentis lin Agamemnono la ĉefo
Kaj ordonis rapide l'heroldojn sonorekkriantajn
Voki por tuja batalo Aĥaĵojn la buklokapajn.
Laŭte l'heroldoj vokadis, l' Aĥaĵoj kuniris rapide.
445. La diaj reĝoj, starintaj ĉirkaŭe Agamemnono,
Ĵetis sin l'arojn ordigi, al ili aliĝis Ateno
Kun karega senmorta ŝildo nepereebbla,
Sur kiu pendis cent franĝoj, el pura oro plektitaj
Bele, kaj ĉiu el ili kostis po hekatombo;
450. Kun ĝi Ateno bruege traflugis la militistaron
Kaj ilin igis batali, en bruston de ĉiu enspiris
Fortan kaj ne laciĝantan deziron iri batali,
Kaj la milito al ĉiu en koro fariĝis pli dolĉa
Ol la reveno en ŝipoj rapidaj en landon de patroj.
455. Kiel fajrego eksterma senliman arbaron bruligas,
Sur supraĵojn de montoj sendante flamegon ĉirkaŭen,
Tiel same de l'aroj irintaj, el kupro brilanta
Lumo radia leviĝis ĉielon tra la aero.
Kiel sennombraj amasoj da birdaroj flugilaj
460. Da anseraroj sovaĝaj aŭ gruoj aŭ cignoj longkolaj
Super herbejo Azia ĉe larĝefluanta Kaistro
Svingas fiere flugilojn, ĉi tien kaj tien flugante,
Kaj malleviĝas, l'herbejon plenigante per krioj:
Tiel same rapidis aregoj el ŝipoj kaj tendoj
465. Sur la valon Skamandran, kaj ĝemis terure la tero
El sub piedoj de militistaro kaj de ĉevalaro.
Ili stariĝis sur valo floranta de la Skamandro,
Miloj, kiel folioj kaj floroj printempe naskitaj.
Kiel muŝaro sennombra, densega kaj nekalkulebla
470. Seninterompe sin turnas en tendo de ia paŝtisto
Dum la printempo, kiam en vazojn la lakto enfluas:
Tiel sen nombro nun staris belbuklokapaj Aĥaĵoj
Kontraŭ Trojanoj en kampo, ilin ekstermi volante.
Ilin do, kiel paŝtisoj de grandaj ŝafaroj senpene

475. Bestojn, miksintajn sin dume paŝtiĝo, ree elektas,
Tiel ilin ordigis la ĉefoj ĉi tie kaj tie,
Por la batalon komenci kune kun Agamemnono,
Al Kronido simila per liaj okuloj kaj kapo,
Al Areso per kresko kaj al Posejdono per brusto.
480. Kiel bovo majesta elstaras inter brutaro
Virafiere, ĉar li distingigis el ĉiuj bovinoj:
Tiel formis lin Zeŭso potenca en tiu ĉi tago
Kaj lin distingis altege el aro kaj ĉiuj herooj.
Nun vi sciigu min, Muzoj, Olimpajn supraĵojn loĝantaj,
485. Ĉar vi, diinoj, alestas ĉie kaj ĉion vi scias,
Nia do scio nenio estas, ni aŭdas nur famojn:
Kiaj estis la ĉefoj kaj la potenculoj Aĥajaj?
Sed mi ne povus sciigi aŭ nomi la virojn amasajn,
Se mi posedus eĉ dekon da gorgoj kaj dekon da langoj,
490. Voĉon senmalfortiĝeblan kaj bruston el kupro faritan,
Eĉ se la Muzoj, Olimpaj filinoj de Zeŭso potenca,
Min memorigus pri ĉiuj Aĥajoj venintaj al Trojo.
Tial mi sole nur la ŝipoestrojn kaj ŝipojn sciigos.
Regis la virojn Beotojn Peneleo, Leito,
495. Ankaŭ Arkezilao, Protoenoro, Klonio;
Kelkaj el ili loĝadis Hirion, ŝtonegan Aŭlidon,
Ŝhenon kaj Skolon kaj la Eteonon montege-arbaran,
Greon, Tespeon, la vastajn valegojn de Mikaleso;
Multaj elvenis Eritrojn kaj Harmon, kaj Ilezion,
500. Multaj el Eleono, Hileo kaj el Peteono,
El Okaleo kaj el Medeono la stratobelega,
El Eŭtrezurbo kaj Kapoj kaj Tizbo kolomboriĉega,
El Koroneo kaj el Haliarto herbejariĉega
Kaj el Plateo kaj ankaŭ el Gliso la urbo vastkampa;
505. Multaj el ili naskiĝis en la Hipotebo beldoma
Kaj en Onĥesto, sanktarbojn de dio Neptuno naskanta;
Kelkaj en Arno vinbera, en Niso sanktega, Mideo,
Fine en Antedono, sur limo de Beotujo.
Tiuj ĉi viroj kvin dekojn da ŝipoj ekarmis, en ĉiu
510. Estis po cent dudek junaj kaj fortaj Beotujanoj.
L'anojn de Aspledono kaj de Orĥomeno Minia

- Regis la Aresidoj Jalmeno kaj Askalafo,
De Astioho naskitaj en dom' de Aktoro Azido;
Ŝin, virgulinon honteman, supre en ĉambro plej alta
515. Foje Areso vizitis kaj kun ŝi sekrete kuniĝis.
Tiuj ĉi ambaŭ ekarmis tri dekojn da ŝipoj rapidaj.
Regis la virojn Fokeojn Ŝhedio kaj Epistrofo,
Filoj de reĝo Ifito, kiun naskigis Naŭbolo;
Multaj elvenis el Kipariso, el ŝtona Pitono,
520. El dia Kriso, Daŭlido, el kampoj de Panopeo;
Multaj elvenis el Anemoreo kaj el Hiampolo,
Kelkaj loĝadis laŭlonge Kefiso, la sankta rivero,
Kaj en Lileo, ĵus apud naskejo de tiu rivero.
Tiuj ĉi viroj ekarmis kvar dekojn da ŝipoj nigretaj.
525. Ambaŭ geĉefoj ordigis la vicojn de viroj-Fokeoj,
Kiu aligis al la Beotoj de flanko maldekstra.
Regis la Lokrojn Ajakso la Oleido rapida,
Pli malalta per kresko ol Telamonido Ajakso;
Sed, pli malgranda estante kaj tolan kirason portante,
530. Li ponardegon ĵetadis plej bone el ĉiuj Ahajoj.
Liaj popoloj eliris Konoson, Oponton kaj Beson
Kaj Kaliaron kaj Skarpon kaj la gajegan Aŭgeon,
Fine Tronion kaj Tarfon sur bordoj de Boagrio.
Regis la ĉefo Ajakso kvardekon da ŝipoj nigretaj
535. Kun Lokrujanoj, loĝintaj poste Eŭbeo sanktega.
La kuraĝegajn Abantojn, loĝintajn l'insulon Eŭbeon
Kaj okupintajn Halkidon, Histieon vinriĉan,
Heretreon, Kerinton ĉe maro kaj Dion fortegan,
Prilaboristojn de Stiro kaj anojn de urbo Karisto:
540. Ilin kondukis Aresposteulo Elefonoro
Halkodonido, la ĉefo de kuraĝegaj Abantoj.
Ili, nur kapopostajon lasantaj kovritan de haroj,
Sekvis lin, flame celante per ponardego fraksena
Kuprajn kirasojn disbati sur brustoj de malamikoj.
545. Tiuj ĉi viroj ekarmis kvar dekojn da ŝipoj nigretaj.
Poste alvenis la viroj el multementaj Atenoj,
De Hereŭteo kuraĝa regataj; li estis naskita
Simple el ter' fruktoporta, (lin nutris diino Ateno,

- Si lin kondukis en l'urbon, en ŝian belegan sanktejon,
550. Kie ĝis nun al diino ŝafojn kaj bovojn oferas
L'Atenojanoj en daŭro de jaroj ĉirkaŭturnigantaj).
Tiujn ĉi virojn kondukis la Peteid' Menesteo.
Al li neniu el homoj estis simila per scio
En batalo ordigi ĉevalojn kaj virojn armitajn.
555. Lin nur Nestoro konkuris, spertega pro aĝo altega.
Al Menesteo alsekvis kvar dekoj da ŝipoj nigretaj.
Telamonido Ajakso el Salamino kondukis
Dudek ŝipojn, kaj apud l'Atenoj starigis li ilin.
Virojn el Argo kaj el la fortmura urbo Tirinto
560. El Hermiono, Azino (ambaŭ havenoj ĉe maro),
El Heionoj, Trezeno kaj Epidaŭro vinbera,
El Eginurbo, Maseto (ĉiuj kuraĝaj Aĥajoj):
Tiujn ĉi virojn kondukis Diomedo kuraĝa
Kaj Stenelo, la filo de Kapaneo glorega.
565. La tria ĉefo estis Eŭrialo la dia,
Li, posteulo de Talaino kaj Mekisteido.
Ĉiujn Arganojn kondukis Diomedo kuraĝa.
Tiuj ĉi viroj ekarmis ok dekojn da ŝipoj nigretaj.
Virojn, venintajn el belkonstruita urbo Mikenoj,
570. El Korinturbo riĉega, el beldomegaj Kleonoj,
Prilaboristojn el Aretureo, el urbo Orneo,
El Sikiono, reĝita de la heroo Adrasto,
Virojn el Hiperezio kaj el Gonoeso fortega,
El Egiono, Peleno kaj Egialo, kaj virojn
575. El ĉirkaŭaĵoj vastegaj maraj de urbo Heliko:
Agamemnono la ĉefo kun cento da ŝipoj kondukis
Ilin, pli multajn per nombro kaj pli kuraĝajn ol ĉiuj.
Li do, Atrido, radiis, vestita en kupro brilanta,
Gloro, ĉar li distingigis inter ĉiuj herooj
580. Per kuraĝeco kaj multo da viroj, de li kondukataj.
Virojn el Lakedemono-vasturbo, en valo staranta,
Ankaŭ el Faro, el Sparto, el Meso (kun multaj kolomboj),
Prilaboristojn el gaja Aŭgeo kaj el Brizeo,
Virojn el Amiklejo kaj el la marurbo Elosa,
585. El Laaso kaj el ĉirkaŭaĵoj de urbo Etilo:

- Ilin kondukis la frato, Menelao kuraĝa,
Kun ses dekoj da ŝipoj, aparte tenataj de ĉiuj.
Unu li mem ilin regis, al unu nur si konfidante,
Kaj ilin igis batali, pli ol aliaj volante
590. Vengî sopiron kaj la forŝteligon de sia Heleno.
Virojn el Pilo venintajn kaj el multagraba Areno,
De la traïro Alfeo, Trio, belega Epio,
Virojn el Kipariseo, Amfigenio kaj Helo,
El Pteleo kaj el Doriono, kie la Muzoj
595. De la kantisto Tamiro Trakia talenton forrabis:
El Eŭhalio irante, kie Eŭrito reĝadis,
Li fanfaronis superi per sia kantado, se kontraŭ
Lin eĉ konkurus la Muzoj mem, la filinoj de Zeŭso.
Ekkolerintaj, blindigis ili lin kaj de li rabis
600. L' arton de dolĉa kantado kaj de tintado sur liro.
Tiujn ĉi virojn kondukis la maljunulo Nestoro,
Venis kun ili al Trojo naŭ dekoj da ŝipoj grandegaj.
L' Arkadujanojn, loĝantajn laŭlonge la montoj Kilenaj,
Apud la tomb' de Epito, patrujo de viroj kuraĝaj,
605. Anojn de kampoj Fenosaj kaj de Orĥomenoj multbrutaj,
Anojn de Ripo, Stratio, Enispo, blovata per ventoj,
Virojn el urbo Tegeo, el Mantineo gajega
Kaj el Stimfalo kaj fine el Parasio agraba.
Tiujn ĉi Agapenoro Akeïdo kondukis
610. Kun ses dekoj da ŝipoj; en ĉiu el ili alvenis
Multo da Arkadujanoj, lertegaj en arto milita.
Al ili donis mem Agamemnono, la ĉefo de viroj
Ŝipojn belege armitajn, por maron la nigran traïri
Al Trojurbo, ĉar ili la marajn aferojn ne sciis.
615. Virojn el Bupraziurbo, el Elidujo sanktega,
Virojn el landoj, havantaj Herminon, ŝtonegan Olenon,
Alizion kaj fine Mirzinon, limurbon de l' lando:
Tiujn ĉi virojn kvar ĉefoj kondukis, kaj sekvis al ili
Deko da ŝipoj, en kiuj estis multegaj Epeoj.
620. Du ĉefoj estis: Talpio kaj Amfimaĥo; la duan
Naskis Kteato, l' unuan la Arktorido Eŭrito.
L' Amarinkido Dioro kuraĝa estis la tria,

- Kaj Polikseno la kvara, belega, al dio simila;
Lin Agasteno naskigis, reĝ' Aŭgeido kuraĝa.
625. Virojn el Duliŝiono kaj el Eŝinadaĵ insuloj
Sanktaj, kuŝantaj en maro kontraŭe la Elidujo,
Tiujn ĉi virojn kondukis Megeso Aresosimila
La Fileido; lin naskis Fileo ĉevalobridulo,
Foje kurinta en Duliŝionon pro tio de l' patro.
630. Al li alsekvis al Trojo kvar dekoj da ŝipoj nigretaj.
Sed Odiseo kondukis la Kefalenojn kuraĝajn,
Parte loĝintajn Itakon, ĉe bruaj arbaroj Neritaj,
Parte el Krokileo kaj el sovaĝa Eglipo;
Kelkaj elvenis Lakinton kaj multeloĝitan Samoson,
635. Ankaŭ Epiron kaj l' bordon de tero kontraŭekuŝanta;
Kaj Odiseo, egala al Zeŭso, ilin kondukis.
Kun siaj viroj li venis en dekdu ŝipoj ruĝnazaj.
L' Etolujanojn kondukis Toaso la Andremonido.
Kelkaj el ili loĝis Pleŭronon, Olenon, Pilenon,
640. Kelkaj la maran Ĥalkidon kaj la Kalidonon ŝtonegan;
Jam plu ne vivis nek filoj de grandanima Eneo,
Nek mem Eneo, nek Melagoro, la blonda heroo;
Tial la supran estrecon ricevis post ili Toaso.
Al li alsekvis al Trojo kvar dekoj da ŝipoj nigretaj.
645. Kretojn kondukis l' heroo kuraĝa Idomeneo.
Tiuj ĉi viroj elvenis el Glosa, fortmura Gortino,
Likto, Mileto kaj ankaŭ el urbo blankmura Likasto;
Kelkaj elvenis la multeloĝitajn Riton kaj Feston;
Multaj aliaj elvenis el centoj da urboj sur Kreto.
650. Tiujn ĉi regis Idomeneo, la arta ĵetisto,
Kun Meriono, simila al virmortiganta Areso.
Ili kondukis al Trojo ok dekojn da ŝipoj nigretaj.
Sed l' Heraklido, la granda kaj alta la Tlepolemo
En naŭ ŝipoj kondukis la fieregajn Rodosojn,
655. Kiuj en sankta Rodoso dividas sin en tri popoloj
Kaj kiuj loĝis Jalison, Lindon kaj blankan Kamiron.
Ilin kondukis nun Tlepolemo, heroo potenca,
Al grandfortulo Herkulo naskita de Astioĥeo;
Ĝin en Epiro li prenis, sur bordo de Seleiso,

660. Detruinte urbaron de viroj — Zeŭsoamatoj;
Sed, viriĝinte apenaŭ en domo de patro Herkulo,
Li, Tlepolemo, subite mortigis Likimnionon,
L' onklon de l' patro, grizulon kaj Aresposteulon.
Tuj, konstruite rapide ŝipojn, kolektis li virojn
665. Kaj sur la maron forkuris, ĉar timis li venĝon: minacis
Lin la filaro kaj ankaŭ neparo de granda Herkulo.
Fine, vagante kaj doloradante, li venis Rodoson,
Tie ĉi koloniigis, trioble dividis la virojn,
Multeamatajn de Zeŭso, reganta la diojn kaj homojn.
670. Zeŭso al ili donacis multegajn, senfinajn riĉecojn.
Kun egalgrandaj tri ŝipoj elvenis el Simo — Nereo,
Li, de Aglao kaj reĝo Ĥaropa en mondon naskita;
Tiu Nereo, kun viroj armitaj veninta al Trojo,
Estis plej bela el ĉiuj Aĥajoj krom Agamemnono.
675. Sed dorlotita li estis kaj arojn malmultajn kondukis.
Virojn, loĝintajn Niziron, Karpaton, Kazoson kaj Koson,
Urbon de Eŭripilo kaj la insulojn Kalidnajn,
Tiujn ĉi virojn kondukis Fidipo kaj kun li — Antipo,
Ambaŭ filoj de reĝo Tesalo l' Herkulposteulo.
680. Ili kondukis tri dekojn da ŝipoj nigretaj fleksitaj.
Nun ni kalkulos la virojn el la Argujo Pelazga.
Virojn, loĝintajn Alopon, Aloson kaj Traĥinion,
Ankaŭ Ftion kaj gloran per belaj virinoj Heladon
(Tiuĵ ĉi nomis sin Mirmidonoj, Helenoj, Aĥajoj),
685. Ilin kun kvindek ŝipoj kondukis la glora Aĥilo;
Sed ili nun eĉ ne pensis pri iaj bataloj teruraj,
Ĉar estis for tiu viro, kiu ilin ordigus:
Kuŝis trankvile en ŝipoj Aĥilo rapidopieda,
Pro la knabino kolera, pro belabukla Brizido,
690. Kiun post longa batalo li el Lirneso forprenis,
Detruinte Lirneson kaj ankaŭ la murojn de Tebo
Kaj mortiginte Mineton kaj Apostrofon kuraĝajn,
Filojn de reĝo Eveno, naskita de Selepiono.
Li dolorante koleris, sed baldaŭ li ree leviĝos.
695. Virojn, loĝintajn Filakon kaj la florantan Pirason,
De Demetro amatan, Itonon la multebrutaran,

Maran Antronon kaj ankaŭ la riĉepaŝtejan Pteleon,
Tiujn ĉi Protezilao kuraĝa antaŭe kondukis,
Kiam li estis vivanta, nun kaŝis lin tero la nigra.

700. Hejme li lasis edzinon, vizaĝon al si disŝirantan,
Kun ŝi la domon dezertan, kaj falis de viro Dardana.
Kiam, unua el ĉiuj, li saltis el ŝipo sur bordon.
Lin liaj viroj sopiras, kvankam ĉefon havante.
Ilin Podarko kondukis, ido de dio Areso,

705. Filo de la Filakido Ifiklo brutaroriĉega,
Frato de la heroo kuraĝa Protezilao,
Sed pli juna ol li; la pli aĝa kaj la pli forta
Estis Protezilao. Perdinte lin, liaj popoloj
Havis ĉefon, certege, sed pri l'kuraĝulo sopiris.

710. Tiuj ĉi viroj armigis kvar dekojn da ŝipoj nigretaj.
Virojn, loĝintajn Ferurbon apud la lago Bebeo,
Virojn el Bebo, Glaŝiroj kaj urbo belega Jaolko,
Tiujn kondukis Eŭmelo, amata de l'patro Admeto,
Kune kun dek unu ŝipoj. Lin naskis en mondon Alkesto,
715. La plej bela virino el ĉiuj filinoj Peliaj.

Viroj, loĝintaj Metonon kaj kampojn de Taŭmakio,
Viroj el Molibeo kaj el Olizono sovaĝa
Estis de Filokteto l'artarkopafanta regitaj.

Li kun sep ŝipoj alvenis, en ĉiu po kvindek remistoj,
720. Kiuj artege pafadis per arkoj kaj estis kuraĝaj.
Sed Filokteto mem kuŝis sur sankta insulo Lemnos,
Suferanta fortege, lin tie l'Aĥajoj forlasis,
Turmentatan de vundo, al li de serpento farita.

Tie dolore li kuŝis. Sed baldaŭ la viroj Aĥajoj
725. Ĉe la ŝiparo memoros pri Filokteto la reĝo.
Ili sen ĉefo ne restis, sed multe sopiris l'antaŭan.
Ilin regis Medono, flankfilo de Oileo;
Al Oileo, la urbdetruanta, lin Reno eknaskis.

Viroj, loĝantoj de Triko kaj de Itomeno montega,
730. Viroj el Eĥalio, kie reĝadis Eŭrito,
Estis de Podaleiro kaj de Maĥono regataj,
Ambaŭ Eskulapidoj, sciantaj la arton kuracan.
Tiuj ĉi viroj kondukis tri dekojn da ŝipoj fleksitaj.

- Virojn el Ormeniono kaj fonto de Hipereo,
735. Virojn el Asteriono kaj el la blankdoma Titano,
Tiujn ĉi la brileganta Eŭemonido kondukis,
Kaj al li sekvis al Trojo kvar dekoj da ŝipoj nigretaj.
Virojn, loĝintajn Argison kaj ankaŭ la urbojn Girtonon,
Orton, Elonon kaj Oloosonon, la urbon blankdoman,
740. Tiujn ĉi la kuraĝulo Polipeto kondukis,
Filo de Peritoo, de Zeŭso mem naskigita.
Al Peritoo l' edzino Hipodameo lin naskis
Tiun ĉi tagon, en kiu la vilajn Kentaŭrojn li punis,
De Peliono forpuŝis kaj al Etikoj forpelis.
745. Regis ne unu li, sed kune kun l' Aresid' Leontio,
Filo de Koronio, el gento de Keneidoj;
Tiuj ĉi viroj kondukis kvar dekojn da ŝipoj nigretaj.
Dudek du ŝipojn rapidajn Guneo kondukis el Kifo.
Li kun Enioj alvenis kaj kun la kuraĝaj Pereboj,
750. Kun la loĝantoj sur tero de la malvarma Dodono,
Kun viroj prilaborantoj la kampojn ĉe Titarezio,
Kiu rapide enfluas en akvojn de la Peneo,
Ne miksigante kun akvo arĝenta de tiu rivero,
Sed surfluante simile oleon sur ondojn Peneajn,
755. Ĉar ĝi elvenas el Stikso, terura rivero de ĵuroj.
Troto, la Tendrodonido, kondukis la virojn Magnetojn
Ili ĉirkaŭe Peneo kaj Pelionon arbaran
Loĝis kaj estis regataj de sperta Tendrodonido.
Tiuj ĉi viroj kondukis kvar dekojn da ŝipoj nigretaj.
760. Tiaj estis la ĉefoj Aĥajaj kaj la potenculoj.
Sed kiu estis la plej eminenta, sciigu min, Muzo,
Per kuraĝeco kaj bonaj ĉevaloj el l' Atridoanoj?
La plej bonajn ĉevalojn Eŭmel' Feretido posedis;
Ilin flugigis Eŭmelo, kiel birdojn rapidajn,
765. Spinoebenajn kaj ĉiujn egalajn pri haroj kaj aĝo.
Sur Pieriaj herbejoj ilin eknutris Apolo.
Tiuj ĉevaloj portadis en la batalon teruron.
Viro do estis plej glora — la Telamonido Ajakso,
Dume koleris Aĥilo, la plej distingita el ĉiuj,
770. Kiel ankaŭ ĉevaloj, kiuj Aĥilon portadis.

- Li mem restadis en siaj ŝipoj rapidaj ĉe l' maro
Kaj koleradis en koro Agamemnonon, la ĉefon.
Lia do militistaro sur bordo de l' maro bruanta
Amuziĝadis, ĵetante diskojn kaj ponardegojn
775. Kaj arkpafante. Ĉevaloj ĉe kaleŝoj staradis
Kaj, senokupaj, manĝadis lotoson, malsekan apion;
Sed per kovriloj staradis kuŝitaj iliaj kaleŝoj
En la tendoj; la viroj do, prisopirante Aĥilon,
Forevitantan batalon, inter tendaro malagis.
780. Sed jen elpaŝis l' Aĥajoj, kaj kvazaŭ ekflamis la tero,
Forte ekstremis; kiel sub bato de Tondroĵetanto,
Kiam li sagojn alsendas sur la Tifeologejon
(Kiel oni rakontas), en la Ariman ŝtonegon:
Tiel same ekĝemis la tero sub viroj irintaj,
785. Ĉar sur la kampo rapidis la militistaro Aĥaja.
Sed al Trojanoj alvenis la ventorapida Iriso
Kun sciigo malĝoja de Zeŭso, de ŝildoportanta.
Ili do faris konsilon ĉe pordo de domo Priama.
Tie premiĝis amase junuloj kaj grizaharuloj.
790. Kaj apud ili stariĝis l' Iriso rapidefluganta,
Ekimitante la voĉon de la Priamido Polito,
Kiu, gardanto de Trojo, espere je siaj piedoj,
Sidis sur tombo altega de Ezieta maljuna,
Rigardante, ĉu iras de l' bordo l' Aĥajaj popoloj.
795. Lian figuron preninte, eldiris al ili Iriso:
„Ho, maljunulo, vin ĉiam alplaĉas longegaj paroloj,
Kiel en tempo de paco, sed nun proksimiĝas batalo.
Ofte jam, ofte mi estis en sangaj bataloj de viroj,
Sed tian grandan aregon neniam ankoraŭ mi vidis.
800. Kiel arbarfolietoj laŭ nombro kaj sablo de maro,
Ili alvenas sur kampon, por ekataki la urbon.
Vi, ho, Hektoro, precipe vi mian admonon obeu:
Multaj liganoj ja estas ĉi tie en urbo Priama,
Ĉiu popolo el ili lingvon alian parolas;
805. Ke ĉiu ĉefo nun regu la virojn, kun li kunvenintajn,
Ilin ordigu kaj ankaŭ en la batalon kondukku“.
- Tiel ŝi diris. Hektoro rekonis la voĉon diinan,

- La konsiliĝon ĉesigis, kaj ĉiuj rapidis sin armi,
Kaj malfermiĝis pordegoj, elvenis el ili Trojanoj,
810. Rajdaj kaj piediraj. Leviĝis laŭtega bruego.
Antaŭ Trojurbo troviĝas alta tomba monteto,
Tute izola en kampo kaj atingebla de ĉie.
L' homoj mortemaj de ĉiam ĝin Batieo nomadis,
Sed la dia — la tombo de lertesaltanta Mirino.
815. Tie ĉi sin la Trojanoj de la liganoj dividis.
La Trojurbanojn regis Hektoro la kaskobrilanta,
La Priamido; lin sekvis la plej kuraĝaj kaj nombraj
Viroj, avidaj batali kaj ponardegojn svingantaj.
La Dardanaron kondukis la eminenta Eneo,
820. La Anĥizido, naskita de Afrodito sur Idaj
Montoj arbaraj: ŝi tie kuniĝis kun homo mortema.
Tamen ne unu li regis, sed kune kun l' Antenoidoj,
Nome Akamo kaj Arĥiloĥo, lertegmilitistoj.
Virojn, loĝintajn Zelion ĉe fundamento de Ido,
825. Riĉajn urbanojn, trinkantojn la nigrajn akvojn Azopajn
(El Troja gento); ilin kondukis la glora Pandaro
Likianido, al kiu Apolo mem arkon donacis.
Virojn el Adrasteo, el gento de Apezidoj,
El Pitieo kaj ankaŭ de alta montega Tereo,
830. Tiujn Adrasto kaj la linkirasa Amfio kondukis,
Ambaŭ filoj de Perkozia Meropo, glorega
Antaŭdiristo, al siaj filoj malpermesinta
Iri en Trojon batali. Sed ili ne volis aŭskulti
Lian parolon: la sorto de l' morto ilin forlogis.
835. Prilaboristojn el urboj Perkoto kaj Praktiono,
El Abidoso, Sestoso kaj el sanktega Arizbo,
Tiujn ordigis Azio la Hirtakido, virĉefo,
La Hirtakido, el urbo Arizbo elveturiginta
Brilajn kaj grandajn ĉevalojn de sankta river' Seleiso.
840. Sed Hipotoo la ponardegoĵetistojn Pelazgojn
El Lariso kondukis, el tero multfruktoporta.
Kun Hipotoo kunregis la Aresido Pileo,
Ambaŭ la filoj de Leto Teŭtamido Pelazga.
Sed Akamoso kaj ankaŭ Pirvo regis Trakiojn,

845. Kies lando limigas la Helesponton bruegan.
La ponardegoĵetistojn Kikonojn regis Eŭfemo,
Filo de la Keido Trezeno, amata de Zeŭso.
Poste kondukis Pirehmo la kurbaarkajn Peonojn,
El Amidono venintajn ĉe la rivero Aksio,
850. Kies ondoj puregaj fruktoportigas la teron.
Sed Pilemeno kuraĝa regis Pafalagonojn
El la lando Keneto, naskanta la mulojn sovaĝajn.
Regis li ankaŭ la virojn, loĝintajn Kitoron, Sesamon,
La domaron belegan sur bordoj de Partenio,
855. Kromnon kaj Egialon kaj montojn de Eritino.
Sed Alizonoj kun ĉefoj Hodio kaj Epistrofo
El malproksima Alibo, l' arĝentonaskejo, alvenis.
Mizojn regis Ĥromo kaj l' birdoprofeto Enomo,
Sed profetado ne povis lin savi de l' sorto malluma:
860. Li ekpereis sub manoj de Eakido rapida
En la rivero, en kiu mortigis li multajn aliajn.
Frigojn kondukis Forkiso kaj Askonio kuraĝa
El Askanio, kaj ili flamege deziris batali.
Regis la virojn Meonojn Mestlo kaj kun li Antifo,
865. Filoj de Pilemonio kaj laga diino Gigeo.
Ili kondukis Meonojn, naskitajn ĉe Tmolo altega.
Karojn, havantajn barbaran lingvon, Nasteso
kondukis.
- Ili loĝis Mileton kaj montojn arbarajn de Ftiroj,
Ĉirkaŭ rivero Meandro kaj la krutaĵoj Mikalaj.
870. Ilin kondukis batali Nasteso kaj Amfimaĥo,
La kuraĝulo Nastes' kaj Nomianid' Amfimaĥo,
Eĉ en batalon irinta kiel knabino, de oro
Pribeligita. Malsaĝa! Eĉ oro ne povis lin savi.
Falis li sub forta mano de Eakido rapida
875. En la rivero, kaj l' oron prenis de li Peleido.
Sed Sarpedono kaj Glaŭko glora kondukis Likiojn
El Likiujo, el lando ĉe ondoj bruegaj de Ksanto.
-

Kanto tria.

Jurado. — Ĉirkaŭrigardo de muroj. — Duelo.

- Tuj post batala ordiĝo de ĉiuj popoloj kaj ĉefoj,
Kiel birdoj kriante kaj brue eliris Trojanoj:
Tiel sub la ĉielo resonas la krio de gruoj,
Kiam, post la forkuro de vintro kaj pluvo senĉesa,
5. Ili alflugas kriante al ondoj de la Oceano,
Morton-pereon portante al la malgrandaj Pigmeoj,
Kaj en matena aero ilin terure atakas.
Sed la batalospirintaj Aĥajoj trankvile aliris,
Ĉiuj brulante en koro por helpi unuj aliajn.
10. Kiel sur montosupraĵoj Noto nebulon etendas,
Kiu paŝtistojn timigas, sed ŝtelistarojn ĝojigas,
Ĉar oni vidas tra ĝi nur la spacon de ŝtono ĵetita,
Tiel nun supren leviĝis la pulvo sub la alirintoj
Densanubege, ĉar ili rapide trairis la valon.
15. Sed kiam l' aroj kurintaj unu alian aliris,
El Trojanaro elpaŝis la dia hero' Aleksandro
Kun kurba arkopafilo, kun fel' leoparda sur ŝultroj,
Ankaŭ kun glavo. Li du ponardegojn kun kupraj surpintoj
Svingis kaj la plej kuraĝajn el la Aĥajidoj alvokis
20. Kontraŭbatali lin nun en la terurega batalo.
Sed Menelao kuraĝa, apenaŭ li vidis proksime
La elirinton el l' aro per paŝoj rapidaj kaj larĝaj,
Ĝojis li kiel leono malsata, vidanta subite
Grandan akiron: aŭ cervon kornan, aŭ ĉamon sovaĝan.
25. Ĝi avidege manĝegas l' akiron, kvankam de ĉie
Pelas ĝin hundoj rapidaj kaj nelaciĝemaj ĉasistoj:
Tiel ĝojegis nun li, Menelao, la dian Parison
Vidi proksime, ĉar li la ofendon ekvenĝi volegis,
Kaj el kaleŝo rapide li kun la armaĵo elsaltis.
30. Tamen, apenaŭ lin vidis la dia hero' Aleksandro
Inter la vicoj unuaj, ektimis li en sia koro
Kaj reeniris en la amikaron, por morton eviti.
Kiel iu, serpenton en intermontoj vidinte,

Reekrapidas kaj liajn membrojn atakas tremado,
35. Kaj li forkuras rapide kun tute palega vizaĝo:
Tiel same enkuris en la Trojanaron kuraĝan
Diosimila Pariso pro timo de Menelao.

Sed lin Hektoro ekvidis kaj diris la vortojn riproĉajn:

„Ho, dorlotita belulo, timema, virindelogulo!

40. Se vi neniam naskiĝus aŭ senedziĝe pereus!
Ĉar tion ĉi mi preferas kaj tio ĉi estus pli bona,
Ol antaŭ ĉiuj ricevi nun malestimon, ofendon.
Certe, ridados pri vi Aĥajidoj la belbuklokapaj,
Opiniintaj vin kuraĝegulo, ĉar havas vi belan

45. Eksterajon, sed nun al vi mankas kuraĝo kaj forto.
Ĉu ankaŭ tiel timema vi estis, kiam, en ŝipoj
Martranaĝantaj, al vi kolektinte kolegojn fidelajn,
Vi al fremduloj aliĝis kaj ŝtelis la belan virinon
El tiu land', bofratinon de militamaj herooj,

50. Por malĝojigi la patron, la urbon, la tutan popolon
Kaj malamikojn ĝojigi kaj sole nur vin malhonoru?
Kial ne staras vi kontraŭ Atrido? Vi tiam sciigis,
Kian herooedzinon florantan vi havas hodiaŭ!

55. Nun vin ne helpos la liro, nek donoj de Afróditu,
Nek la beleco kaj bukloj, se li vin faligos en polvon.
Se ni Trojanoj ne estus timuloj, de longe jam kovrus
Ni vin per vesto el ŝtonoj pro viaj malbonfaritaĵoj.“

Al li respondis la diosimila hero' Aleksandro:

60. „Vi min, Hektoro, pravege mallaŭdas, mi tion meritas;
Nebalanciĝan vi havas koron, kiel hakilo,
Per kiu la ĉarpentisto por ŝipkonstruado forhakas
Arbon, kaj lia swingado nur forton en li pligrandigas:
Tiel same fortega estas en vi via koro.

65. Sed ne mallaŭdu la donojn de Afrodito la ora,
Nedeĵeteblaj ja estas la gloraj donacoj de dioj,
De dioj mem aldonataj, arbitre do ne riceveblaj.
Tamen, se volas vi, ke mi kuraĝe komencu batali,
Vi trankviligu nun ilin, l' Aĥajojn kaj la Trojanojn,
Por ke en mezo de ili mi kaj Menelao kuraĝa

70. Ambaŭ ni nun pro Heleno kaj ŝiaj trezoroj batalu.

- Kiu el ambaŭ fariĝos venkinto kaj estos pli forta,
Tiu en domon kondukos Helenon kun ŝiaj trezoroj;
Sed vi aliaj, farinte de nun amikecon kaj ligon,
Loĝu fruktportan Trojurbon, sed ili reiru en Argon
75. La ĉevalriĉan, kaj gloran per belaj virinoj Argujon.“
Tiel li diris. Hektoro multege ekĝojis en koro.
Jen li eliris antaŭen kaj la Trojanarojn detenis,
Mezon de la ponardego kaptinte; kaj haltis la viroj.
Kontraŭ lin tiris la arkopafilojn l' Aĥajoj belbuklaj,
80. La ponardegojn alcelis kaj al li ŝtonaron ekĵetis.
Tamen Atrido, la ĉefo de viroj, laŭtege elvokis:
„Haltu, amikoj Arganoj, ne pafu vi, viroj Aĥajoj,
Ĉar li intencas paroli, Hektoro la kaskobrilanta.“
Tiel li diris. L' Aĥajoj detenis sin, ree stariĝis
85. Ili silente, kaj inter ili Hektoro parolis:
„Ho, vi Trojanoj kaj kuproarmitaj Aĥajoj, aŭskultu,
Kion al mi Aleksandro militokaŭzinto eldiris.
Li nun proponas, ke ĉiuj Trojanoj kaj viroj Aĥajoj
Metu la belajn armaĵojn sur teron la multfruktoportan,
90. Por ke li kaj Menelao kuraĝe en mezo de ĉiuj
Nun pro Heleno kaj ankaŭ pro ŝiaj trezoroj batalu.
Kiu el ambaŭ fariĝos venkinto kaj estos pli forta,
Tiu en domon kondukos Helenon kun ŝiaj trezoroj;
Ni do ceteraj, ni faros de nun amikecon kaj ligon.“
95. Tiel li diris, sed ĉiuj ĉirkaŭe starintaj silentis.
Fine eldiris l' hero' Menelao, la viro kuraĝa:
„Aŭdu nun ankaŭ vi min, ĉar atakas kruele doloro
Mian animon; mi volas, ke fine vi pace disiru,
Vi, Argoanoj kaj Trojo; sufiĉe ĝis nun vi suferis
100. Pro la malpaco de mi kaj Pariso, la kaŭzo de tio.
Kiun el ni antaŭstaras pereco de sorto malluma,
Tiu pereu; sed ĉiuj ceteraj, vi baldaŭ paciĝu.
Nun du ŝafetojn alportu: blankan por dio Helio
Kaj por la Tero — nigran; al Zeŭso ni trian oferos.
105. Ankaŭ venigu Priamon, ke li la kontrakton priĵuru
(Ĉar liaj filoj montriĝas fieraj kaj perfidemaj),
Ke la ĵuradon al Zeŭso neniu perfide trarompu.

- Ĉiam junuloj posedas animon ŝanĝeman, kaj kiam
Ilin aliĝas grizulo, vidanta antaŭe kaj poste,
110. Penas li trovi utilon egalan por ambaŭ partioj.“
Tiel li diris. L' Aĥajoj kaj la Trojanoj ekĝojis,
Ekesperinte nun fini la pereigeman militon.
Ili en vicoj starigis ĉevalojn, elsaltis kaleŝojn
Kaj, formetinte armaĵojn, ilin kuŝigis sur teron
115. Unu apude alian: ĉar estis malvasta la loko.
Sed du heroldojn Hektoro rapide venigis en Trojon,
Por du ŝafetojn alporti kaj tien ĉi voki Priamon.
Ankaŭ la ĉefo Atrido tuj Taltibion forsendis
Al la rapidenaĝantaj ŝipoj, por ŝafon alporti,
120. Kaj Taltibio rapide obeis al Agamemnono.
Dum al Heleno blankmana aperis diino Iriso
Sub la figur' bofratina, l' edzino de Antenorido,
Reĝo de Helikaono; edziĝis li kun la ĉarmanta
Laodiko, plej bela filino de reĝo Priamo.
125. Dome Iriso ŝin trovis: ŝi tie teksaĵon laboris
Longan, purpuran, en kiun ŝi multajn batalojn enteksis
De la Trojanoj ĉevalobriduloj kaj de Aĥajidoj,
Kiu pro ŝi suferadis l' ekbatojn de dio Areso.
Al ŝi stariĝis Iriso facilepieda kaj diris:
130. „Venu do, kara fratino, kunvidi l' aferojn mirindajn
De la Trojanoj ĉevalobriduloj kaj de Aĥajidoj.
Nun ili, antaŭ nelonge militadintoj en valo,
Soifadinte batalon larmelvokantan kaj sangan,
Nun ili staras silente (milito finiĝis), sur ŝildojn
135. Sin apoginte kaj la ponardegojn en teron ŝovinte.
Sed Aleksandro kun la kuraĝulo hero' Menelao
Per ponardegoj la longaj pro vi la batalon komencos,
Kaj kiu venkos, al tiu vi estos la kara edzino.“
Tiel Iriso eldiris, ĵetinte en koron dolĉamon
140. Pro ŝia edzo unua, patrurbo' kaj ŝiaj gepatroj.
Kaj per arĝentaj kovriloj Heleno kovriĝis rapide,
Ĉambro forlasis kaj larmojn el siaj okuloj elverŝis.
Kaj al ŝi sekvis samtempe du servantinoj fidelaj,
Etra Piteofilino kaj l' bovookula Klimeno.

145. Baldaŭ ili alvenis al altaj pordegoj de Skeo.
Tie ĉi reĝo Priamo, Pantoo kaj ankaŭ Timeto,
Lampo, Klitio, Aresposteulo Hiketaono
Kune kun Ukalegono kaj Antenoro prudentaj —
Ĉiuj grizviroj — sidadis sur la pordegoj de Skeo,
150. Pro maljuneco ne kunbatalante, sed en konsiliĝo
Saĝe donante konsilojn; kiel libeloj arbaraj
Tie, sur arbo sidante, elmetas dolĉege la voĉon:
Tiel same sur turo kunsidis la ĉefoj Trojanoj.
Nun, ekvidinte Helenon al ili aliri al turo,
155. Inter si mem ili diris mallaŭte la vortojn flugilajn:
„Estas neeble mallaŭdi Trojanojn kaj Aĥajidojn,
Kiuj longtempe suferas mizerojn pro tia virino,
Ĉar laŭ beleco ŝi estas kiel diino senmorta.
Sed malgraŭ tio ŝi iru nun foren en ŝian patrujon,
160. Ke ŝi, restante, nin ne pereigu kun niaj infanoj.“
Tiel ili parolis. Priamo do vokis Helenon:
„Venu al mi pliproksime, filino, kaj ĉe mi sidiĝu,
Ke vi ekvidu la edzon unuan, l' amikojn, parencojn,
(Mi ne kulpigas vin tute, ĉar nur la senmortaj min tiris
165. En la militon malĝojan kontraŭ l' Aĥajoj kuraĝaj)
Ke al mi diru vi nomon de tiu ĉi viro grandkreska,
De tiu ĉi Aĥajido tiel majesta kaj granda:
Kvankam aliaj videble superas lin certe per kresko,
Tamen mi vidis neniam tian viron belegan,
170. Nek tian noblan figuron: li estas simila al reĝo.“
Al li respondis Heleno, diino inter virinoj:
„Mia bopatro, de mi estimata kaj kune timata,
Ho, se min morto maldolĉa atakus, kiam mi sekvis
Al via filo, lasinte domegon kaj miajn parencojn,
175. Mian filinon amatan kaj l' aron de la amikinoj! . . .
Sed tio ĉi ne fariĝis kaj mi suferadas plorante!
Tamen mi volas respondi vian faritan demandon.
Li estas ĉefo de viroj, Agamemnono Atrido,
Bona reganto kaj glora ĵetisto de ponardego;
180. Estis li al mi, senhonta, bofrato . . . Ho ve, li nur estis! . . .“
Tiel ŝi diris. Sed li ekmirinta laŭtege ekkriis:

„Ho vi, feliĉa Atrido, amata de dioj, benita!
Ĉar vin obeas sennombraj aroj de viroj Aĥajoj.

Iam mi ankaŭ vizitis Frigujon la riĉevinberan,
185. Kie mi vidis multegon da Frigoj ĉevalorajdantoj,
De dia reĝo Migdono kaj de Otreo regitaj,
Kiu tendaron starigis sur bordoj de la Sangario.

Mi inter ili troviĝis kaj estis al ili ligano,
Kiam alvenis la Amazonoj, al viroj similaj.

190. Sed ili estis ne tiom laŭ nombro, ol nun l' Aĥajidoj.“

Nun Odiseon ekvidis Priamo kaj ree demandis:

„Diru nun ankaŭ, filino, kiel ĉi tiu sin nomas?

Li plimalalta certege estas ol Agamemnono,
Sed liaj ŝultroj kaj brusto, mi vidas, montriĝas pli largaj.

195. Lia armaĵo kuŝas sur tero la fruktoportanta,
Sed li mem kiel reganto paŝas inter la viroj.

Li al mi ŝajnas simila al kapro kun lano riĉega,
Kiu trairas la mezon de blankalana ŝafaro.“

Al li respondas Heleno, filino amata de Zeŭso:

200. „Li estas Laertofilo, la Odiseo multsaĝa,
En la lando ŝtonega, en Itako naskita,

Arta kaj glora per multaj intrigoj kaj saĝaj konsiloj.“

Nun Antenoro, la saĝa grizulo, eldiris la vortojn:

„Vi efektive elmetis veran parolon, virino.

205. Antaŭ nelonge alvenis al ni tiu ĉi Odiseo,
Pro vi sendita, kaj kune kun li Menelao kuraĝa.

Mi ilin tiam akceptis, ĉe mi regalante en domo:

Tial mi konas figurojn kaj bonan prudenton de ambaŭ.

Tiam, veninte al nia konsilo inter Trojanoj,

210. Menelao per kresko estis pli alta, starante,
Sed Odiseo, dum ili sidis, pli noble elvidis.

Sed kiam ambaŭ elmetis saĝajn kaj ruzajn parolojn,
Li, Menelao, parolis ĉiam rapide, premite,

Forte, kvankam malmulte; ne amis li vortomalŝparon

215. Nek deklinantan parolon, kvankam li estis pli juna.

Sed kiam li, Odiseo multsaĝa, komencis paroli,

Staris senmove li kaj malleviste sur teron l' okulojn,

Ankaŭ la sceptron li tenis senmove, ĝin ne ŝancelante

- Tien kaj tien ĉi, al malspertulo tute simila ;
220. Vi opinius lin homo kolera aŭ tute malsaĝa.
Sed kiam lia potenca voĉo el brusto eliris
Kune kun vortoj, similaj al aroj de vintraj neĝeroj :
Tiam nenia mortema povus kontraŭ lin stari,
Kaj mi ne miris jam plu, rigardante lian figuron.“
225. Sed nun Ajakson vidinte, la maljunulo demandis :
„Kiu li estas, la viro tiel grandega kaj forta,
Kiu superas per kapo kaj ŝultroj ĉiujn Aĥajojn?“
Al li respondis Heleno la longevestita, diina :
„Tiu ĉi estas Ajakso, la defendulo Aĥaja.
230. Apud li Idomeneo inter la Kretoj troviĝas,
Kaj ĉirkaŭ reĝo kunstaras la kondukantoj de Kretoj.
Ofte regalis lin Menelao, l' heroo kuraĝa,
Kiam el Kreto venadis li en nian domegon.
Sed, kvankam ĉiujn Aĥajojn rapidaokulajn mi vidas,
235. Kiujn mi bone rekonas kaj povus tuj ilin eknomi,
Tamen neniel mi trovas ĉi tie du ĉefojn de viroj,
Ĉevalbridulon Kastoron kaj Polideŭkon fortmanan,
Miajn fratojn, naskitajn kun mi de unu patrino.
Ĉu ili restis ambaŭ en Lakedemono la dolĉa,
240. Aŭ ili, kvankam venintaj per ŝipoj la martrairantaj,
Nun ne volas miksiĝi en kunbatalo de viroj,
Ĉar ili timas l' insulton, la honton, al mi alfaritan?“
Tiel ŝi diris, sed ilin enprenis la tero-nutranto
Jam en la lando amata de patroj, en Lakedemono.
245. Sed la heroldoj jam portis la ligoferojn de dioj,
Du ŝafidojn tra l' urbo kaj vinon, dolĉfrukton de l' tero,
En ŝafofelo ; samtempe do la heroldo Ideo
Portis en mano brilegan vazon kaj orajn pokalojn.
Li, alirinte al la maljunulo, eldiris la vortojn :
250. „Filo de Laomedono, leviĝu, vin vokas la ĉefoj
De la ĉevalobridantaj Trojanoj kaj de Aĥajidoj,
Por tie sube, sur kampo, ĵuri la ligon fidelan.
Ĉar Aleksandro nun kaj Menelao l' Aresoamata
Pro la virino batalos per ponardegoj iliaj.
255. Kiu ekvenkos, alprenos virinon kun ŝiaj trezoroj.

Ni do, ceteraj, ni faros ligon kaj sanktan ĵuradon,
La fruktoportan Trojurbon loĝos, sed ili reiros
En ĉevalriĉan Argurbon, al belaj Aĥajaj virinoj.“

Tiel li diris. Priamo tremante ordonis amikojn
260. Jungi ĉevalojn, kaj ili la reĝon obeis fervore.
Li sur kaleŝon suriris kaj kondukilojn ekstreĉis,
Kaj apud li Antenoro starigis sur belan kaleŝon,
Kaj tra l' pordegoj de Skeo ambaŭ rapidis sur kampon.

Sed al Trojanoj kaj al Aĥajidoj alproksimiĝinte,
265. Ili elkaleŝigis sur teron ĉionaskantan,
Iris en mezon de la Trojanaroj kaj de Aĥajidoj.
Ne malrapide leviĝis la ĉefo de viroj, Atrido,
Kaj Odiseo multsaĝa. Sed la heroldoj majestaj
La ligoferojn alportis por ĵuro, kaj vinon en kruĉo,
270. Miksis ĝin, poste alverŝis akvon sur manojn de reĝoj.
Agamemnono do tiris per mano rapida la glavon,
Kiun li ĉiam portadis ĉe sia ingo longega,
Tranĉis la harojn de l' kapoj de ŝafoj, kaj tiam l' heroldoj
Ilin disdonis al ĉefoj de Trojo kaj de Aĥajidoj.

275. Sed Atreido laŭtege ekpreĝis, la manojn levinte:
„Ho, patro Zeŭso, reĝanta sur Ido, plejglora,
plejgranda!

Ankaŭ Helio, vi, ĉion vidanta kaj ĉion aŭdanta!
Ho, vi, Riveroj kaj Tero, kaj vi, la subteraj spiritoj,
Homojn mortintajn punantaj, kiuj perfidis ĵuradon!
280. Ĉiuj vi estu atestoj kaj gardu ĵuradon de l' ligo.
Se Aleksandro nun venkos tie ĉi lin, Menelaon,
Tiam li prenos Helenon kune kun ŝiaj trezoroj,
Ni do revenos en hejmon sur ŝipoj la martranaĝantaj.
Sed se l' hero' Menelao Aleksandron mortigos,

285. Tiam Trojanoj forlasas Helenon kun ŝiaj trezoroj
Kaj ankaŭ pagas al la Argoanoj proponon konvenan,
Ankaŭ donotan de la posteuloj estontaj iliaj.
Sed se Priamo kaj la Priamidoj tiam ne volos
Pagi proponon post tiu ĉi falo de Aleksandro,
290. Tiam denove mi kun miaj viroj, por venĝi l' ofendon,
Faros militon, restante, ĝis mi mian celon atingos.“

- Diris li, buĉis per kupro kruela la gorgojn de ŝafoj
Kaj ilin ambaŭ tremantajn suren sur teron kuŝigis,
Jam elspirantajn la forton de l' vivo, rabita de kupro.
295. Ĉiuj nun ĉerpas el kruĉo dolĉvinoon per ora pokalo
Kaj ĝin elverŝas kaj preĝas la diojn eternevivantajn.
Tiel preĝis al dioj l' Aĥajoj kaj la Trojanoj:
„Zeŭso plejglora, plejgranda, kaj vi, ĉiuj dioj
senmortaj!
- Kiu el ni la unua perfidos la sanktan ĵuradon,
300. Ties cerbon disverŝu kiel vinon sur tero,
Lian kaj liajn infanajn, kaj fremdaj ofendu l' edzinojn.“
Tiel la viroj parolis. Sed Zeŭso ilin ne aŭdis.
La Dardanido Priamo tamen eldiris la vortojn:
„Ho vi, Trojanoj kaj kuproarmitaj Aĥajoj, aŭskultu!
305. Mi nun denove en Trojon la ventoblovatan revenos,
Ĉar mi ne havas kuraĝon vidi per propraj okuloj
Mian filon batali kun Menelao kuraĝa.
Scias nur Zeŭso kaj kun li ĉiuj aliaj senmortaj,
Kiu el ambaŭ al morto estas antaŭdifinita.“
310. Tiel li diris kaj metis l' oferojn en sian kaleŝon,
Iris en ĝin kaj ekstreĉis la kondukilojn rapide,
Kaj apud li Antenoro stariĝis sur belan kaleŝon,
Kaj returninte sin, ambaŭ veturas rapide en Trojon.
Sed Priamido Hektoro kaj Odiseo la dia
315. Nun batallokon mezuris kaj poste rapide enĵetis
En kupran kaskon lotaĵojn, por scii, al kiu la sorto
Pli antaŭe permesos la ponardegon aljeti.
Sed la popoloj preĝadis kun manoj levitaj ĉielon.
Multaj el ili, Trojanoj kaj Aĥajidoj, preĝadis:
320. „Ho, patro Zeŭso, reĝanta sur Ido, plejglora,
plejgranda!
- Kiu el ili elvokis malpacon de ambaŭ popoloj,
Tiun vi ekpereigu kaj ĵetu Aidoloĝejon,
Ke al ni estu la ligo fidela kaj la amikeco.“
Ili preĝadis. La granda kaj kaskobrilanta Hektoro
325. Ne rigardante skuadis; eliris la loto Parisa,
Ĉiuj do viroj sidiĝis en vicoj, kie troviĝis

- Ĉies rapidaj ĉevaloj kaj multekoloraj armajoj.
L' edzo de la belabukla Heleno, la dia Pariso,
Sur siajn ŝultrojn surmetis siajn armajojn belegajn,
330. Alfortikigis al siaj piedoj tibidefendaĵojn
Belajn, per bukoj arĝentaj ilin fortege li fermis,
Poste li metis ĉirkaŭe sur bruston kirason de frato
Likaono (ĝi estis laŭ lia brustolarĝeco),
Poste pendigis sur ŝultrojn la arĝentonajlan glavegon
335. Kuprotrancantan kaj prenis la ŝildon fortikan kaj grandan,
Kaskon ĉevalokolharan surmetis sur kapon potencan
Kaj, balancante terure tiun ĉi kaskopenikon,
Li ponardegon ekprenis, la plej oportune leveblan.
Tiel same sin armis l' Aresoamat' Menelao.
340. Tiel arminte sin (ĉiu en mezo de sia viraro),
Ambaŭ elpaŝis inter Trojanoj kaj viroj Aĥajoj
Kun minacantaj rigardoj, kaj ilin miregis vidintoj,
Kuproarmitaj Aĥajoj, Trojanoj ĉevalobriduloj.
Nun ili alproksimiĝis al loko ĉirkaŭmezurita,
345. La ponardegojn svingante kaj de koler' plenigitaj.
La ponardegon longombran ekĵetis Pariso l' unua
Kaj ĝin faligis en ŝildon rondetan de Menelao,
Sed ne trahakis la kupron, ĉar refleksiĝis la pinto
Kontraŭ la ŝildo malmola. Sed levis nun la ponardegon
350. Li, Menelao Atrido, kaj Zeŭson laŭtege ekpreĝis:
„Zeŭso potenca, vi donu, ke mi l' ofendinton nun punu,
Ke mia mano lin venku, la dian heroon Parison,
Por ke de tiu ĉi tempo timu eĉ la posteuloj
Malutiligi amikon, kiu montriĝas gastama.“
355. Diris li kaj ponardegon longombran svingitan ekĵetis,
Kaj ĝi entrasis la ŝildon rondetan de la Priamido.
La ponardego fortega trahakis la ŝildon brilantan,
Ankaŭ trairis la arte ĉirkaŭbeligitan kirason,
Apud ingveno disŝiris ĥitonon de la heroo,
360. Sed deturniĝis Pariso kaj morton la nigran evitis.
Tiam l' Atrido eltiris la glavon kun najloj arĝentaj
Kaj ĝin svinginte surbatis la kaskon, sed tamen la glavo
Tuj ekrompiĝis triope, kvarope, kaj falis el mano,

- Kaj l' Atreido ekĝemis, ekrigardinte ĉielon.
365. „Ho, patro Zeŭso, vi estas la plej kruela el dioj!
Mi Aleksandron malnoblan esperis puni hodiaŭ,
Sed la glavego peciĝis kaj la ponardego elfalis
El mia mano senfrukte, kaj tute mi lin eĉ ne vundis.“
Diris li kaj lin atakis kaj kaptis ĉe kaskopeniko
370. Kaj lin rapide fortiris al kuproarmitaj Aĥajoj.
Forte la gorgon alpremis rimeno la artebrodita,
Kiu sub lia mentono servis por kaskoligilo.
Lin Menelao fortirus kaj havus gloriĝon eternan,
Se Afrodito, filino de Zeŭso, ne vidus ĉi tion.
375. Si la rimenon disŝiris, el felo fortega de bovo,
Kaj nur la kasko alsekvis tiam la manon potencan,
Kaj la heroo ĝin ĵetis al kuproarmitaj Aĥajoj,
Alteksvinginte; ĝin levis liaj amikoj fdelaj.
Nun li denove alkuris, por lin jam fine mortigi
380. Per ponardego la kupra. Sed lin Afrodito fortiris,
Kiel diino facile, kaj lin per nebulo ĉirkaŭis
Kaj lin sidigis en domo lia bonegeodora.
Ŝi do mem iris tuj serĉi Helenon, kiu ankoraŭ
Estis kun aro da Trojavirinoj sur turo altega,
385. Kaj, ĉe vestaĵo la boneodoran mallaŭte tuŝinte,
Diris ŝi, similiginte al la teksistino maljuna,
Kiu en tempo pasinta por ŝi en Lakedemono
Belajn lanaĵojn laboris kaj kiun ŝi amis tre multe.
Tiun ĉi similiginte, eldiris nun Afrodito.
390. „Iru, vin vokas Pariso, por veni kun mi en domegon.
Kuŝas li en dormoĉambro, sur la belega kuŝejo,
Bela, en vesto ĉarmanta, kvazaŭ li nun ne revenis
De la batalo, kaj kvazaŭ preparas sin iri al danco
Aŭ sidiĝis, por iom ripozi de la dancado.“
395. Tiel ŝi diris kaj tuj ŝian koron en brusto ekmovis.
Tamen apenaŭ ekvidis ŝi nukon diinan la belan
Kaj l' ĉarman bruston kaj ŝiajn agrable brilantajn okulojn,
Ŝi ekmiregis kaj diris, tiel al ŝi turniginte:
„Ho vi, kruela, pro kio vi volas min ree delogi?
400. Ĉu vi denove nun volas en urbojn multegeloĝitajn,

- En Meonion ĉarmantan aŭ en Frigion min treni?
Ĉu ankaŭ tie vi havas favoritojn mortemajn?
Ĉar Menelao ĵus venkis la dian heroon Parison
Kaj nun min, la malamatan, volas en hejmon konduki,
405. Ĉu vi pro tio ĉi venis kun viaj trompemaj ruzajoj?
Al li sidiĝu vi mem, deturniĝu de dioj senmortaj,
Vian piedon ne metu plue sur sanktan Olimpon,
Maltrankviliĝu por li kaj prizorgu kaj gardu lin ĉiam:
Eble li prenos vin kiel edzinon aŭ kiel sklavinon!
410. Mi do, neniam mi iros tien, ĉar ja malhonore
Estus dividi la liton kun li, ĉar tiam min ĉia
Troja virino insultos, kaj mi jam sen tio doloras.“
Ekkolerinta, al ŝi Afrodito diina respondis:
„Min ne ekscitu, malsaĝa, mi povas kolere vin lasi
415. Kaj ekmalami vin, kiel mi vin ĝis hodiaŭ amegis.
Baldaŭ mi ĵetos la flamon malpacan en ambaŭ popolojn,
En la Aĥaĵojn kaj Trojon, kaj vi pereos mizere.“
Tiel ŝi diris. Ektimis Heleno la Zeŭsonaskita
Kaj per arĝentokovrilo kovriĝis kaj iris silente.
420. Nerimarkita de ĉiuj, ŝi Afroditon alsekvis.
Kiam ŝi venis en belan domegon de Aleksandro,
La servantinoj rapide sin metis al domlaborado.
Ŝi do, la dia virino, eniris en ĉambron altegan.
Tie la ravridetanta Kiprido seĝon ekprenis,
425. Ŝi, la diino, ĝin metis kontraŭ l' heroo Pariso,
Sur ĝin sidiĝis Heleno, filino de Zeŭso potenca,
Siajn okulojn deturnis kaj jene riproĉis la edzon:
„Jen de batalo vi venis! Ho, se vi pereus mizere
Tie, de l' viro potenca, de mia edzo unua!
430. Vi fanfaronis multfoje, ke vi Menelaon kuraĝan
Per ponardego kaj mano kaj per kuraĝeco superos,
Iru do nun kaj elvoku vi Menelaon kuraĝan,
Por lin kontraŭbatali. Sed ne! Mi konsilas, trankvile
Restu, evitu vi tiun ĉi blondan heroon Atridon
435. Kaj arogante vi ne kuraĝiĝu lin kontraŭbatali,
Se vi ne volas tuj morti sub la ponardego potenca.“
Tamen Pariso respondis, al ŝi eldirinte la vortojn:

- „Ho vi, edzino, ne piku la koron per vortoj maldolĉaj!
Nun, Menelao min venkis per helpo de dia Ateno,
440. Sed mi repagos al li, ĉar la dioj nin ankaŭ favoras.
Venu do nun, ni kunkuŝos kaj ĝuos ambaŭ la amon.
En mia koro neniam tiel la fajro flamegis,
Eĉ en la tago, en kiu de Lakedemono agrabla
Naĝis mi, vin kondukante for en niaj ŝipoj rapidaj,
445. Kaj sur insulo Kranao ni ĝuis kundormon kaj amon,
Kiel hodiaŭ mi flamas, pikita de dolĉa deziro.“

Diris li, kaj al kuŝejo aliris; lin sekvis l' edzino.
Ambaŭ ili ripozis kune sur lito belega.

- Sed Atreido vagadis, simila al besto rabema,
450. Ĉu ne fariĝos vidita la dia hero' Aleksandro.
Sed el Trojanoj neniu, neniu el gloraj liganoj
Povis ekmontri Parison al li, Menelao kuraĝa.
Se ili vidus lin, certe lin pro amikeco ne kaŝus,
Ĉar lin nun ĉiuj malamis, kiel la nigran pereon.

455. Tiam la reĝo de viroj Agamemnono elvokis:

„Vi min aŭskultu, Trojanoj, Dardanoj kaj vi, liganoj!
Estas vidata al ĉiuj la venko de Menelao.

- Tial vi nun l' Arganinon Helenon kun ŝiaj trezoroj
Al ni redonu kaj kune monon proponan konvenan,
460. Kiun ankaŭ pagados la posteuloj estontaj.“

Tiel Arido eldiris, kaj lin la Aĥajoj laŭdadis.

Kanto kvara.

Rompo de juro. — Trarigardo de militistaro de Agamemnono.

- Sed la diaro, ĉe Zeŭso sidante, interparoladis
Sur ora planko, kaj Hebo la glora al ili ĉirkaŭe
Verŝis nektaron. La dioj, prenante la orajn pokalojn,
Unu aliajn regalis kaj suben, sur Trojon, rigardis.
5. Jen l' Olimpano Kronido ekvolis Heron inciti

Per parolado korpika kaj diris malrektmaniere:

- „Du helpantinojn-diinojn havas l' hero' Menelao,
Heron Arganan kaj Alalkomenan diinon-Atenon.
Sed, forestante de li kaj de tie ĉi lin rigardante,
10. Ili estas kontentaj; dum la dolĉridanta Kiprido
Helpas Parison kaj de li la Kerojn terurajn forpelas.
Ankaŭ hodiaŭ ŝi lin, al la morto proksiman, eksavis,
Kvankam l' Aresoamato hero' Menelao lin venkis.
Ni do nun devas prijuĝi, kiel ni finos l' aferon,
15. Ĉu la malbonan militon kaj la teruregan batalon
Ni reekigos, aŭ pacon al ambaŭ popoloj donacos.
Se tio lasta al ĉiuj estas agrabla kaj kara,
L' urbo de l' reĝo Priamo konservos en si la loĝantojn.
Kaj Menelao kondukos for l' Arganinen Helenon.“
20. Tiel li diris. Sekrete murmuris Ateno kaj Hero,
Kune sidante kaj kontraŭ Trojanoj mizerojn nutrante.
Certe, Ateno silentis, ŝi eĉ unu vorton ne diris,
Kvankam ŝi Zeŭson koleris, ŝin prenis sovaĝa malico.
Sed ne detenis la brusto de Hero koleron. Ŝi diris:
25. „Ho vi, Kronido kruela, kian vi vorton eldiris!
Ĉu vi nun volas forlasi senfrukte kaj vane penadojn,
Ŝviton de mia laciĝo? Mi miajn ĉevalojn lacigis,
Virojn vokante por ekpereigi Priamon kun filoj!
Faru ĝin, sed ni, aliaj dioj, ĝin certe ne laŭdos.“
30. Al ŝi respondis indigne Zeŭso la Nubkolektulo:
„Ho, malicega vi, kion Priamo kaj la Priamidoj
Kontraŭ vi faris, ke ĉiam vi brulas per flama deziro
Trojon detrui, ĉi tiun urbon belegkonstruitan?
Se vi trairus pordegojn kaj murojn altegajn de l' urbo
35. Kaj ekmanĝegus la vivan Priamon kaj la Priamidojn
Kun la Trojanoj, nur tiam satigus vi vian malicon.
Faru vi, kiel vi volas, ke poste ĉi tiu disputo
Inter ni ambaŭ ne estu la kaŭzo de granda malpaco.
Sed mi nun diras alion, kaj vi ĝin konservu en koro:
40. Se ankaŭ mi havos grandan deziron por urbon detrui,
Kie homoj loĝadas, al vi estantaj amikoj,
Mian koleron vi ne detenu, sed lasu min agi.

- Mi al vi cedas nun, kontraŭ mia deziro, la urbon,
Ĉar kiom ajn sub la suno kaj la multestela ĉielo
45. Estas da urboj, loĝataj de teronaskitaj mortemaj,
Estis de ĉiam al mi plejamata la sankta Trojurbo,
Ankaŭ Priamo kaj l' viroj de tiu ĉi reĝo kuraĝa;
Tie ne mankis al mi ĉe altaro festenoj komunaj
Nek vinverŝado, nek timiano, konvena al dia.“
50. Al li la bovookula Hero majesta respondis:
„Trio da urboj ekzistas, amataj de mi pli ol ĉiuj,
Argo kaj Sparto kaj la larĝestrata urbo Mikenoj.
Ilin detruu vi, se ekmalamos vi ilin en koro,
Kaj ne defendos mi ilin, kaj kontraŭ vi ne maliciĝos.
55. Se mi kolerus kaj kontraŭ ilia detruo agadus,
Miaj penadoj ja restus senfruktaj: vi estas pli forta.
Sed ankaŭ mian laboron kontraŭi ne estas konvene:
Mi estas ankaŭ diino, de l' gento, vin mem elnaskinta,
Mi, plej majesta diino, de patro Krono naskita,
60. Glora duoble: laŭ gento kaj ankaŭ ĉar mi la edzino
Estis nomita al vi, kiu inter senmortaj regadas.
Sed reciproke ni cedu nun unu al la alia,
Mi al vi kaj vi al mi, kaj imitos nin poste aliaj
Dioj. Sed vi nun ordonu plej tuje al Palas-Ateno
65. Veni en mezon de la Aĥajidoj kaj de la Trojanoj;
Kaj ŝi ektentu, ke la Trojurbanoj l' Aĥajojn fierajn
Nun la unuaj ofendu, agante kontraŭ la ĵuro.“
- Diris ŝi. Ne malobeis la patro de dioj kaj homoj
Kaj al diino Ateno li diris la vortojn flugilajn:
70. „Iru en mezon de la Aĥajidoj kaj de la Trojanoj
Kaj vi ektentu, ke la Trojurbanoj l' Aĥajojn fierajn
Nun la unuaj ofendu, agante kontraŭ la ĵuro.“
- Diris li kaj li ekscitis Atenon, de longe flamantan.
Tuj ekrapidis ŝi suben de l' altaj supraĵoj Olimpaj.
75. Kiel stelo, sendita de la multesaĝa Kronido
Al ŝipnaĝantaj aŭ ia granda armeo por signo,
Brilas kaj daŭre l' flugado disŝutas multegajn fajrerojn:
Al ĝi simile rapidis al tero Palas-Ateno.
Inter la militistaro mirego ekprenis vidintojn,

80. La kuprarmitajn Aĥaĵojn kaj ĉevalbridulojn Trojanojn,
Kaj, rigardinte, unu alian tiel parolis:
„Certe, nun ree malbona milito, terura batalo
Estos, aŭ ligos per paco ambaŭ militistarojn
Zeŭso, kiu decidas militon inter mortemaj.“
85. Tiel multaj Trojanoj kaj Aĥaĵidoj parolis.
Sed ĉe Trojanoj penetris Ateno, preninte figuron
De Laodoko kuraĝa, filo de Antenoro,
Diosimilan Pandaron serĉante, ĉu ŝi lin eltrovos.
Trovis ŝi lin, Likianon la fortan kaj neriproĉeblan ;
90. Staris li, kaj lin ĉirkaŭis arego da ŝildotenantoj,
Viroj, sekvintaj al li de rivero sanktega Esepo.
Apudiĝinte, Ateno eldiris la vortojn flugilajn :
„Ĉu vi obeos hodiaŭ al mi, Likiano kuraĝa ?
Ĉu kuraĝiĝos vi en Menelaon sagon enpafi ?
95. Tiam vi dankon kaj gloron akirus de ĉiuj Trojanoj
Kaj pli precipe de la Priamido, de l' reĝo Pariso.
De li plejfrue vi certe brilegajn donacojn ricevus,
Se Menelaon, l' Aresoamaton Atridon, li vidus
De via sago venkitan, metitan sur brulan lignaron.
100. Nu, vi rapidu, ellasu la sagon en gloran Atridon,
Kaj al Apolo Likia, la Arkoportanta, promesu
Grandhekatombon el ŝafoj unuanaskitaj oferi
Post reveniĝo en domon de patro, en sanktan Zelion.“
Tiel ŝi diris kaj koron de la malprudenta ekmovis.
105. Tuj li arkpafon ekprenis, faritan el kornoj de kapro,
Kiun li mem, la sovaĝan, entrasis en bruston, de sube,
Kiam de ŝtono ĝi saltis (li ĝin en embusko atendis) ;
Kaj ĝin entrasis en bruston, — per dorso ĝi falis sur ŝtonon.
Havis sur kapo ĝi kornojn de dek ses manplatoj laŭ longo.
110. Ilin artege aranĝis kaj fleksis kornaĵmetiisto
Kaj, polurinte, almetis al ili hoketon el oro.
Ĝin nun Pandaro ekstreĉis, atente starigis, al tero
Alapoginte ; l' amikoj kuraĝaj lin kaŝis per ŝildoj,
Por ke la viroj Aĥaĵaj ne venu en movon pli frue,
115. Ol Menelao Aresoamato estos trafita.
Jen li tegmenton sagujan malkovris kaj sagon elprenis,

- Neuzitan, flugilan, la kaŭzon de nigraj doloroj,
Kaj tuj alfaris la sagon maldolĉan al l' arkotendeno
Kaj al la arkoportanta Apolo Likia promesis
120. Dankhekatombon el ŝafoj unuanaskitaj oferi,
Kiam li estos veninta en domon, sankturbon Zelion;
Kaptis samtempe la bovotendenon kaj sagenfendaĵon
Kaj apudigis feraĵon al l' arko, tendenon al brusto.
Baldaŭ, apenaŭ li streĉis la grandan pafarkon rondforman,
125. Jen la tendeno bruege ekkrakis, elflugis la sago
La akrapinta, avida eniĝi en militi-taron.

- Sed, Menelao, pri vi ne forgesis la dioj feliĉaj
Kaj pliprecipe l' akiroprenanta filino de Zeŭso,
Kiu, antaŭstariĝinte, forigis la sagon maldolĉan.
130. Ŝi ĝin formetis de l' korpo, kiel amanta patrino
Pelas muŝeton de l' filo, ĝuanta dormon la dolĉan.
Sed la diino direktis ĝin tien, kie sur zono
Oraj ligaĵoj aliĝis kaj estis duobla kiraso.
Falis sur zonon la fortalfaritan la sago maldolĉa,
135. Kaj tra la zono la bonaranĝita trairis la sago;
Ĝi unutempe trahakis kirason la artefaritan
Kaj kupran platon, la sagrebatilon, sur korpo portatan;
Ĝi lin defendis plej bone, sed ĝin eĉ trairis la sago,
L' haŭton eksteran gratinte de la heroo Atrido;
140. Kaj el la vundo elfluis rapide la sango nigreta.

- Kvazaŭ la oston de elefant' purpurigas virino
El Meonlando aŭ Karo por vangornamaĵoj ĉevalaj,
Kaj ĝi en domo kuŝadas kaj multaj ĉevalorajdantoj
Volas por si ĝin forpreni, sed ĝi, difinita por reĝoj,
145. Reĝon rajdantan glorigas kaj lian ĉevalon ornamas:
Tiel same koloris la sango vin, Menelao,
Viajn femurojn, piedojn kaj maleolojn belegajn.

- Tiam timegis la reĝo de viroj, Agamemnono,
Kiam li vidis la nigran sangon, fluintan el vundo,
150. Kaj ektimegis li mem, Menelao Aresoamata;
Sed malinterne vidinte la sagajn pikilojn kaj ŝnuron,
En lia brusto denove la koro ricevis trankvilon.
Jen, sopirante profunde, eldiris Agamemnono,

- Manon de l' frato tenante; ĉirkaŭe ĝemadis l' amikoj.
155. „Frato karega, por via mortigo mi faris la ligon,
Vin elmetinte la solan kontraŭbatali Trojanojn.
Nun ili trafis vin kaj ekperfidis la sanktan ĵuradon,
Sed tute vanaj ne estas ĵurado kaj sango de ŝafoj,
Nek vinverŝado, nek manopremado, de ni konfiditaj;
160. Ĉar kvankam la Olimpano ĉi tion ankoraŭ ne faris,
Iam plenumos li tion ĉi, kaj ili kare depagos
Ĉiuj per kapoj iliaj kaj per virinoj, infanoj.
Ĉar mi nun scias certege en mia animo kaj koro:
Iam alvenos la tago, — kaj falos la sankta Trojurbo,
165. Reĝo Priamo kaj viroj de l' reĝo ponardotrafema;
Zeŭso Kronido, la alta reĝanto, l' eterologano,
Mem kontraŭ ili ŝancelos sian ŝildon teruran
Pro la perfido ilia. Kaj nepre ĉi tio fariĝos.
Sed al mi estos kruela doloro pri vi, Menelao,
170. Se vi ekmortos kaj nun ektransiros la limon de vivo:
Malhonorita mi iros en multsoifatan Argujon!
Ĉar eksopiros nun certe l' Aĥajoj pri tero patruja
Kaj ni forlasos Priamon kaj la Trojanojn gloriĝi
Per Arganino Heleno, kaj via ostaro ekputros,
175. En la Trojlando kuŝante, ne plenuminte l' aferon.
Tiam eldiros ne unu el la fieregaj Trojanoj,
Suren saltinte, sur tombon de Menelao la glora:
„Ke tiel same li ĉiam venĝu, la reĝo Atrido,
Kiel li tien ĉi vane kondukis la virojn Aĥajojn!
180. Ĉar li jam estas irinta en sian patrujon amatan
Kun la ŝiparo malplena kaj Menelaon lasinte.“
Estos dirata de iu, kaj tiam englutu min, tero!“
Sed konsolante eldiris la blonda hero' Menelao:
„Vi trankviliĝu, neniel timigu l' Aĥajan popolon,
185. Ĉar ne en loko danĝera vundis min sago la akra:
Supre defendis min mia zono brilanta, kaj sube
Mia bindaĵo kaj plato, forĝita de kuproartistoj.“
Al li respondis la ĉefo de viroj, Agamemnono:
Ho, Menelao, amata, ke tio ĉi tiel nun estu!
190. Sed kuracisto esploros la vundon, sur ĝin li almetos

Sanigilajon, kiu la nigrajn dolorojn ĉesigos.“

Diris kaj turnis sin al Taltibio, la dia heroldo:

- „Vi, Taltibio, alvoku plej tuje al ni Maĥaonon,
La Asklepidon gloregan, la kuraciston perfektan,
195. Por ke li nun Menelaon Aresoamatan esploru:
Trafis per sago lin ia artega pafisto Trojano
Aŭ Likiano, por lia glorego, por nia doloro.“

- Tiel li diris, kaj ne malobeis al li la heroldo,
Kaj li rapide trairis la kuproarmitajn Aĥaĥojn,
200. Ĉirkaŭrigardis serĉante kaj jen Maĥaonon ekvidis
Inter la vicoj kuraĝaj de ŝildotenantaj herooj,
Kiu lin sekvis el Triko, riĉega per belaj ĉevaloj.
Alproksimiĝis li kaj al li diris la vortojnflugilajn:

- „Asklepofilo, vin vokas Agamemnono la reĝo,
205. Por Menelaon esplori, la ĉefon de Aĥaĥidoj:
Trafis per sago lin ia artega pafisto Trojano
Aŭ Likiano, por lia glorego, por nia doloro.“

- Tiel li diris kaj en Maĥaono la koron frapigis.
Ambaŭ rapide trairis l' amasojn de la Aĥaĥidoj.
210. Tie veninte, kie troviĝis la blonda heroo
Ekvundita (ĉirkaŭis lin viroj la plej eminentaj,
Li do, la dia heroo, staris en mezo de ili),
Baldaŭ li tiris la sagon el zono la denalfarita.
Dum l' eltirado kurbiĝis posten la sagopikiloj;
215. Tiam deligis li zonon la artefaritan, kaj sube
Lian bindaĵon kaj platon, forĝitan de kuproartistoj,
Poste, vidinte la vundon, kaŭzitan de l' sago maldolĉa,
Suĉis la sangon kaj arte ĝin kovris per kuracigaĵo,
Iam donita al lia patro de bona Ĥirono.

220. Dum la zorgado pri la kuraĝega hero' Menelao
Iris antaŭen la vicoj de ŝildotenantaj Trojanoj.
Ankaŭ l' Aĥaĥoj reprenis l' armaĵojn, ekflamis milite.
Nun vi ne vidus la dian Agamemnonon dormanta
Nek ekstremanta kaŝiĝi aŭ iri nevole batali:
225. Kuris li en la batalon, la virojn kovrantan per gloro.
Lasis li for la ĉevalojn kaj kuprobrilantan kaleŝon;
Ilin, la fortespirantajn, poste detenis proksime

Eŭrimedono la Ptolemeido kaj Pirenepo.

230. Al li l' Atrido ordonis atendi ne malproksime,
Ĉar eble lin dum la virordigado atakos laciĝo.

Li mem piede rapidis ĉirkaŭe la vicoj de viroj

Kaj al ĉevalorajdantoj, en la batalon celintaj,

Li proksimiĝis kaj diris la kuraĝigantan parolon:

235. „Ke ne ĉesigu vi vian noblan kuraĝon, Arganoj,
Ĉar la Kronido ne estos helpanto al mensoguloj;

Kiuj l' unuaj ekrompis nian sanktan ĵuradon,

Korpoj de tiuj fariĝos certege vulturoakiro.

Ni do la karajn edzinojn iliajn kaj junajn infanojn

En niajn ŝipojn kondukos post la al milito de l' urbo.“

240. Kiujn li vidis timeme irantaj al sanga batalo,

Tiujn li laŭte mallaŭdis per tiuj ĉi vortoj insultaj:

„Ĉu vi ne hontas, Arganoj, kuraĝaj nur sole per sagoj?

Kial vi staras timeme, similaj al junaj cervetoj,

Kiuj laciĝis post longa kurado sur kampo vastega

245. Kaj ekstariĝis, perdinte la forton la vivan en brusto?

Tiel frapitaj vi staras kaj en la batalon ne iras.

Ĉu vi atendas, ke la Trojamasoj atingu la lokon

De ŝipoj belumbilikaj sur bordo de maro saŭmanta,

Por ke vi vidu, ĉu super vi Zeŭso etendos la manon?“

250. Tiel la vicojn Aĥajajn ĉirkaŭiradis la ĉefo.

Jen, trairante l' amasojn, li al Kretoanoj aliris.

Ili armiĝis ĉirkaŭe Idomeneo kuraĝa,

Kiu en vicoj antaŭaj similis al apro laŭ forto,

Kaj apud li Meriono igis la postajn falangojn.

255. Ilin vidinte, ĝojiĝis Agamemnono la ĉefo

Kaj al Idomeneo eldiris la vortojn mielajn:

„Idomeneo, mi vin pli estimas ol ĉiujn Danaojn

En batalado kaj ankaŭ en ĉia alia afero,

Eĉ en festeno, kiam la vinon honoran nigretan

260. La Aĥajidoj plej noblaj en kalikoj dissolvas;

Ĉar efektive, dum ĉiuj aliaj belbuklaj Aĥajoj

Trinkas nur laŭ mezurilo, ĉiam via pokalo

Estas plenega per trinko senĉesa, kiel la mia.

Flugu do en la batalon kun la antaŭa kuraĝo.“

265. Idomeneo, la ĉefo de Krotoanoj, respondis :
„Ĉiam mi restos, Atrido, via fidela amiko,
Kiel mi al vi promesis kaj jam de longe certigis.
Sed vi aliajn Aĥajojn la belabuklajn ekigu,
Por rapidigi batalon, ĉar la ĵuradon perfidis
270. La Trojurbanoj, pro tio al ili mizero kaj morto
E-tos, ĉar ili l' unuaj agis kontraŭe ĵuradon.“
Tiel li diris, kaj Agamemnono korgoĵe foriris.
Nun, trairante la arojn militajn, li venis Ajaksojn ;
Ambaŭ armiĝis, sekvitaj de nubo da pieduloj.
275. Kiel sur monta supraĵo paŝtisto ekvidas nubegon,
Kiu super la maro pelas Zefiro blovanta,
Kaj ĝi, de malproksime, montriĝas pli nigra ol gudro
Kaj, super maro flugante, kondukas ventegon teruran,
Kaj la paŝtisto timanta enpelas la brutojn en groton :
280. Tiel kun la Ajaksoj la viroj junaj de Zeŭso
Celis al la malamika batalo en densaj falangoj
Malklariĝintaj, kun ŝildoj kaj ponardegoj levitaj.
Ili rigardis kun ĝojo Agamemnono la ĉefo
Kaj, turniĝinte al ili, li diris la vortojn flugilajn :
285. „Ambaŭ Ajaksoj, vi, ĉefoj de kuproarmitaj Arganoj,
Al vi mi ne ordonas, ĉar vi tion ĉi ne bezonas,
Ĉar vi ja mem la popolon igas kuraĝe batali.
Ho, patro Zeŭso kaj dio Apolo kaj Palas Ateno,
Se tian koron kuraĝan ĉiuj brustoj enhavus,
290. Baldaŭ subfalus la urbo fortmura de reĝo Priamo,
Per niaj manoj prenita kaj de ni disrabita.“
Tiel dirinte, forlasis li ilin, aliajn irinte ;
Vidas li la dolĉavoĉan viron Nestoron el Pilo,
Ordigadantan amikojn kaj ilin igantan batali ;
295. Tie ĉi estis Ĥromi', Alastoro kaj Pelagono,
Ankaŭ la ĉefo Memono kaj l' reĝo de viroj Biaso.
Li la rajdantojn, ĉevalojn kaj kaleŝojn antaŭen
Metis, kaj poste la piedulojn multnombrajn, kuraĝajn,
La apogon batalan ; timemajn li metis en mezon,
300. Ke ili estu igitaj batali eĉ ankaŭ nevole.
Li la ĉevalorajdantojn antaŭe admonis, petante

Bone deteni ĉevalojn kaj ne amasiĝi malorde.

„El vi'neniu esperu la arton de rajdo kaj forton,
Por pli antaŭe ol ĉiuj kontraŭ Trojanoj batali
305. Aŭ deturniĝi returnen, ĉar tiel vi nur malfortiĝos.
Kiu per sia kaleŝo atingos alian kaleŝon,
Li ponardegon elmetu, ĉar tio ĉi estas pli bone.
Per tia ago la patroj deĵetis urbegojn kaj murojn,
Tian prudenton, spiriton en brustoj kuraĝaj havante.“

310. Tiel konsilis la viro maljuna, militospertega.
Lin ekvidinte, ĝojegis la reĝo Agamemnono,
Kaj turniĝinte al li, li eldiris la vortojn flugilajn:

„Ho, maljunulo, se al via koro en brusto kuraĝa
Viaj genuoj obeus, kaj restus la forto en korpo!
315. Sed maljuneco la homa vin premas. Ho, se nur aliaj
Viroj fariĝus maljunaj kaj vi restus inter junuloj!“

Al li respondis Nestoro, Gerena ĉevalorajdanto:
„Reĝo Atrido, mi mem deziregus tia estadi,
Kia mi estis, venkinte la dian Eretalionon,
320. Sed ĉion al unu homo ne donas la dioj senmortaj.

Se tiam juna mi estis, min premas nun la maljuneco,
Sed, eĉ maljuna, mi sekvos ĉevalorajdantojn, kaj igos
Ilin per vortoj, konsiloj; ĉi tio konvenas grizulon.
Ke ponardegojn longombrajn ĵetu la junaj Aĥajoj,
325. Kiuj naskiĝis post mi kaj al sia forto konfidas.“

Tiel li diris. Atrido foriris kun ĝojo en koro
Kaj Menesteon ekvidis, la filon de l' glora Peteo,
Stari senage en mezo de viroj kuraĝaj Atenaj;
Kaj Odiseo multsaĝa estis kun Menesteo,
330. Kaj ĉirkaŭ li Kefalenoj, en vicoj neŝanceligeblaj,
Staris, ĉar ili ankoraŭ ne aŭdis la vokon batalan,
Ĉar nur de ĵus ekrapidis renkonten la vicoj militaj
De la ĉevalobridantoj Trojanoj kaj viroj Aĥajoj;
Ili atendis, ke ia alia falango Aĥaja

335. Kontraŭ Trojanoj ĵetiĝu, kaj tiel komencu batalon.
Ilin vidinte, insultis la ĉefo de viroj, Atrido,
Kaj, sin turninte al ili, eldiris la vortojn flugilajn:
„Ho, Peteido, vi, filo de reĝo la Zeŭsoamata,

- Kaj ankaŭ vi, plenigita de ruzoj, intrigoj malbonaj!
340. Kial, kaŝinte vin, vi militistojn aliajn atendas,
Kvankam certege konvenas al vi kun la vicoj antaŭaj
Stari kaj en la flamantan batalon rapide celiĝi.
Mi ja vin ambaŭ plej tuje invitas al mia festeno,
Kiam mi faras festenon por maljunuloj Aĥajaj!
345. Ho, tio estas agrabla — manĝi viandon rostitan,
Trinki pokalojn da vino dolĉega laŭ volo de koro!
Nun kun la sama plezuro vi vidas, ke dek Aĥajvicoj
Vin antaŭiras batali kun fero la malkompatema.“

Sed Odiseo multsaĝa rigardis kolere kaj diris:

350. „Kia parolo, Atrido, elfugas nun el viaj lipoj?
Kial vi diras, ke ni la batalon evitas? Ni ĉiuj
Kontraŭ Trojanoj tuj metos koleron de dio Areso,
Kaj se vi volas kaj se pri l' afero vi zorgas, vi vidos
Kiel en vicoj antaŭaj la patro de Telemako
355. Ĵetos sin al la Trojanoj. Sed vi ne prudente parolis.“

Sed ridetante respondis al li Atreido la ĉefo,
La kolerantan vidinte; li ŝanĝis l' antaŭan parolon.

- „Ho, Odiseo multsaĝa, vi, filo de dia Laerto!
Mi tute vin ne riproĉas kaj tute al vi ne ordonas,
360. Ĉar mi ja scias, ke via koro en brusto la kara
Nutras intencojn tre bonajn, kaj ambaŭ ni pensas egale.
Iru do, ni plibonigos poste, se io malbona
Estas dirita; la dioj volu ĉi tion detrui.“

Tiel dirinte, forlasis li ilin, kaj iris aliajn.

365. Li Diomedon ekvidis kaj la Tideidon fieran,
Kiu staris sur bela kaleŝo ĉevalojungita;
Tie ĉi apud li staris Stenelo la Kapaneido,
Kaj, ekvidinte lin, Agamemnono la ĉefo insulte
Al li elmetis parolon kaj diris la vortojn flugilajn:
370. „Ve al mi, filo de l' forta Tideo ĉevalobridulo!
Kial vi tremas kaj vojojn de la batalkampo rigardas?
Certe, Tideo ne havis kutimon tiel tremegi:
Kontraŭbatalis li malamikaron malposte amikoj.
Tiel rakontas vidintoj de lia milita laboro.
375. Mi mem ne vidis lin, sed oni diras, li ĉiujn superis.

- Li kun intencoj amikaj iam vizitis Mikenojn,
Gaste; li kun Poliniko la dia kolektis viraron,
Ĉar ili kontraŭ la sanktaj muroj de Teboj sin armis,
Kaj ili petis Mikenojloĝantojn pri gloraj liganoj.
380. Tiuj ĉi volus konsenti kaj peton ilian plenumi,
Sed tion Zeŭso deturnis per antaŭsigno minaca.
Kiam ili foriris kaj marŝis la vojon returnen
Kaj ekatingis denskanan Asopon, kun bordoj herbejaj,
Sendis l' Aĥajoj al ili Tideon kun rea demando.
385. Iris Tideo kaj trovis grandnombron da Kadmeanoj;
Ili festenis en domo de Eteoklo potenca.
Sed tie ne ektimiĝis Tideo ĉevalobridulo,
Kvankam li estis fremdulo kaj sola ĉe la Kadmeanoj.
Li ilin por vetbatalo elvokis kaj venkis en ĉio
390. Sen ia peno: Ateno estis por li helpantino.
Sed ekkoleris la Kadmeanoj ĉevalospronantaj
Kaj kontraŭ li, foririnta returnen, aranĝis embuskon
De kvindek viroj junuloj, kiujn du ĉefoj kondukis,
La Hemonido Meono, simila al dio senmorta,
395. Kaj la hero' Polifonto, la Aŭtofonido kuraĝa.
Sed malhonoran sorton Tideo al ili pretigis:
Ĉiujn mortigis kaj sole nur unu li sendis al hejmo;
Lasis Meonon li for, obeinte al signoj de dioj.
Jen kia estis Tideo la Etoliano. Sed filo
400. Lia malpli militema estas kaj pli babilema.“
Tiel li diris. Nenion respondis l' hero' Diomedo
Kontraŭ farita riproĉo, pro alta estimo al ĉefo.
Tamen rediris la filo de Kapaneo glorega:
„Vi ne mensogu, Atrido, ĉar bone vi scias la veron.
405. Jes, ni nin gloras, ke ni per kuraĝo superas la patrojn;
Ni almilitis la Tebojn, fortajon la sepepordegan,
Kvankam ni malpli da homoj kondukis al muroj Aresaj,
Al diaj signoj kredante kaj danke al helpo de Zeŭso,
Dum la laŭditoj de vi ekpereis per propra malsaĝo.
410. Tial vi ne egaligu la gloron de l' patroj al nia.“
Lin ekrigardis kolere kaj diris l' hero' Diomedo:
„Kara amiko, silentu kaj mian konsilon obeu,

- Ĉar ne kulpigas mi Agamemnonon, la ĉefon de viroj,
Ke li ekscitas la kuproarmitajn Aĥaĵojn batali.
415. Al li kuniĝos ja gloro, se la Trojanojn Aĥaĵoj
Venkos kaj ekalmilitos fine la sanktan Trojurbon,
Kaj li senfine malĝojos, se estos venkitaj l' Aĥaĵoj.
Sed ni rapidu kaj nian kuraĝon ni ekrememoru!"
- Diris li kaj kun armaĵ' el kaleŝo li saltis sur teron,
420. Kaj terurege eksonis la kupro sur brusto de l' ĉefo
Ekrapidinta: timiĝus eĉ la plej kuraĝa el viroj.
Kiel al bordo de maro laŭtege-eĥema ondego
Unu alian postsekvas, pelata de l' vento Zefiro;
En la komenco fortege leviĝas sur maro, sed poste
425. Falas ĝi tondre al bordo kaj sur promontoro de maro
Kurbefleksiĝas plej alte kaj ŝaŭmon la salan forkraĉas:
Tiel l' Aĥaĵoj moviĝis, kaj aro post aro rapidis
En la batalon senĉese. La ĉefoj potencis l' amasojn.
La militistoj silentis. (Kaj tiam neniu eldirus,
430. Ke tiom multe da viroj voĉon posedas en brusto).
Ili honoris la ĉefojn per silentado; sur ĉiuj
Brilis koloraj armaĵoj, kiujn la viroj surmetis.
Sed la Trojanoj, simile al aro sennombra da ŝafoj,
Kiuj, donante la lakton en ŝtalo de viro riĉega,
435. Blekas senĉese, aŭdante la voĉon de idoj iliaj:
Tiel miksita kriado leviĝis nun inter Trojanoj;
Ili ne ĉiuj posedis egalan kriadon kaj lingvon,
Ĉar tio estis miksaĵo de lingvoj kaj fremdaj popoloj.
Ilin ekscitis Areso, l' Aĥaĵojn movigis Ateno
440. Kaj ankaŭ Timo, Teruro kaj la Disigo malsata,
La amikino-fratino de l' vormortigulo Areso:
Tiu Disigo, komence malgrande, rampetas, sed poste
Ĝis la ĉielo eklevas la kapon, irante sur tero;
Tiu ĉi ĵetis malpacon komunan en mezon de l' viroj,
445. Inter amasoj vagante kaj pligrandigante ĝemadon.
Apudiĝinte apenaŭ kune sur loko komuna,
Tuj kunpuŝiĝis la ŝildoj kaj ponardegoj kaj aroj
De militistoj la kuproarmitaj; la ŝildoj fleksitaj
Unuj aliajn renkontis, kaj bruo terura eksonis.

450. Jen unutempe leviĝis ĝemado kaj krio de venko
De mortigantoj kaj de mortigatoj, kaj l' tero sangiĝis.
Kiel riveroj, nutritaj per neĝoj, de montoj fluinte,
Akvojn bruantajn en valon de intermiksiĝo enĵetas,
El grandaj fontoj venante en mezon de kavo ĉizita;
455. Kaj malproksime en montoj aŭdas la bruon paŝtisto:
Tiel fariĝis teruro kaj krioj de l' kunpuŝiĝintoj.
Nun Antiloĥo l' unua mortigis Trojan-militiston;
Li Eĥopolon la Talizidon en vicoj antaŭaj,
Frapis en kaskosupraĵon, kovritan de haroj ĉevalaj,
460. Kaj lian frunton trapikis; kaj en la oston eniĝis
La kupra pinto; kaj liajn okulojn ĉirkaŭis mallumo;
En la batalo terura, simile al turo, li falis.
Per la piedoj ekkaptis lin Elefonoro la reĝo
Ĥalkodonido, la ĉefo de la grandanimaj Abantoj,
465. Tiris lin for de la sagoj kun brula deziro plej tuje
Preni l' armaĵojn, sed lia penado mallonge nur daŭris,
Ĉar dum tirado de l' korpo ekvidis l' hero' Agenoro,
Ke de l' klininto la flanko montriĝis ekstere de l' ŝildo,
Ŝovis en ĝin ponardegon la kupran, kaj vivon forigis.
470. Tiel forlasis lin vivo, kaj super li bruis batalo
Inter la viroj Aĥajaj kaj Trojaj; simile al lupoj
Viro ĵetiĝis sur viron, kaj homo homon mortigis.
Telamonido Ajakso mortigis l' Antemionidon
Simoision la junan, florantan: lin lia patrino
475. Iam, irante de l' Ido, sur bord' Simoisa eknaskis,
Kiam, por vidi la ŝafojn, ŝi sekvis al siaj gepatroj;
Tial ŝi Simoisio lin nomis. Sed al la gepatroj
Karaj li ne rekompencis l' edukon, nelonge li vivis,
Ĉar lin mortigis Ajakso kuraĝa per ponardego;
480. Li tuj komence ektrafis en bruston al li, apud mamoo
Dekstra, kaj la ponardego la kupra tra ŝultro kontraŭa
Iris. Kaj falis li teren en polvon, simila al poplo,
Kiu ja ankaŭ en valo de marĉo grandega elkreskis,
Glata sur trunko kaj nur sur supraĵo la branĉojn levante;
485. Ĝin nun kaleŝkonstruisto fortranĉis per fero brilanta,
Por el ĝi radoĉirkaŭon kurbigi por bela kaleŝo;

- Nun ankaŭ ĝi sekigante kuŝas sur bordo rivera :
Tiel pereis nun Simoisio Antemionido
De Zeŭsamata Ajakso. Antifo, en brila kiraso,
490. La Priamid', en lin ĵetis tra ar' ponardegon la akran,
Sed, pro maltrafo, al Leŭko, kuraĝa amik' Odisea,
Flanken treninta mortinton, ĝi en la ingvenon eniris.
Sur la mortinton li falis, kaj l' korpo ruliĝis el manoj.
Nun Odiseo, kolera pro la mortigita amiko,
495. Iris tra vicoj antaŭaj, armita de fero brilanta,
Alproksimiĝis kaj ĵetis la ponardegon brilantan,
Ekrigardinte ĉirkaŭe; deiris la viroj Trojanoj
De l' ekbatinta heroo, sed vana ne estis l' ekbato :
Demakaonon ĝi trafis, bastardon de reĝo Priamo,
500. El Abidoso venintan, el land' de ĉevaloj rapidaj.
Lin Odiseo ektrafis, kolera pro sia amiko,
En la tempion, kaj tra la tempio kontraŭa eliris
La kuprapinto, kaj liajn okulojn ĉirkaŭis mallumo.
Falis li brue sur teron, kaj lia armaĵo eksonis;
505. Posten la vicoj antaŭaj kaj l' brila Hektoro deiris.
Laŭte l' Arganoj ekkriis kaj tiris al si la mortintojn
Kaj ekrapidis antaŭen. Sed nun ekkoleris Apolo.
De la altaĵo Pergama ekscitis li virojn Trojanojn :
„Celu, ĉevalobriduloj Trojanoj, ne cedu la kampon
510. Al Argujanoj, ne estas ja ili el fero aŭ ŝtono,
Por malatenti l' ekbatojn de kupro, pikanta la korpon.
Certe, Aĥilo, la filo de la belabukla Tetido
Nun ne batalas; kolero mordetas lin apud la ŝipoj.“
Kriis la dio terura de l' urbo. Sed la Aĥajarojn
515. Tritogonio la glora, Zeŭsido, ekscitis batali,
Tra la amaso irante kaj malrapidantajn vidante.
Nun ĉirkaŭvolvis la morto Dioron la Amarinkidon :
En maleolon ektrafis lin ŝtono kruele-dentita
En la piedon la dekstran: ĝin ĵetis la ĉefo de Trakoj,
520. La Imprazido Piroso, kiu eliris el Eno,
Kaj ambaŭ venojn kaj ostojn la ŝtono kruela, senhonta
Tute pecigis, kaj sur sia dorso li suben, en polvon
Falis; leviĝis la ambaŭ manoj al karaj amikoj,

- Kaj lia spiro ĉesiĝis. Sed la vundiginto alkuris
525. Kaj ekenigis en li ponardegon, en la umbilikon,
Eksteriginte l' intestojn, kaj liaj okuloj fermiĝis.
Lin, l' alkurinton, Toaso la Etoliano ekbatis
Super la mamu en bruston, kaj trafis la kupro en pulmon;
Poste Toaso alkuris kaj la ponardegon elkaptis
530. El lia brusto, kaj baldaŭ eltiris la glavon akregan
Kaj en mezventron ĝin ŝovis, kaj rabis de li lian vivon.
Sed li ne prenis l' armaĵojn, ĉar staris ĉirkaŭe la Trakoj
Kun altfrizitaj kapharoj, tenante ponardegegojn,
Kioj nun, malgraŭ fortego, kreskego kaj lia kuraĝo,
535. Tamen forpuŝis lin posten, — la forto lin for deirigis.
Tiel nun ambaŭ en polvo kuŝis, la unu kaj dua,
Ĉefe de Trakoj kaj ĉefe de kuproarmitaj Epeoj.
Kaj ĉirkaŭ ili ankoraŭ multaj aliaj pereis.
Tiun ĉi akton militau mallaŭdus neniam veninto,
540. Kiu, sen malutiliĝo, ŝparita de kupro la akra,
Agus en mezobatalo sub rego de Palas-Ateno,
Kiu lin prenis per mano, metante for sagojn kolerajn.
Ĉar tiun tagon multegaj Trojanoj kaj viroj Aĥajaj
Suben en polvon ekfalis, unu apud alia.

Kanto kvina.

Heroaĵoj de Diomedo.

- Palas-Ateno denove al Diomedo Tidido
Donis kuraĝon kaj forton, ke brilu li inter la aroj
Da militistoj-Arganoj kaj gloron grandegan akiru;
Sur lia kasko kaj ŝildo ŝi fajron senĉesan bruligis,
5. Tute similan al stelo aŭtuna, kiu per pleja
Lumo brilegas, estinte lavinta sin en Oceano:
Tiel same ŝi lian kapon kaj ŝultrojn lumigis
Kaj lin enmetis en mezon, kie l' aregoj batalis.
Estis riĉega kaj neriproĉebla Trojano Dareso,
10. Pastro de dio Hefesto; li havis du filojn kuraĝajn,

- Nome Ideo kaj Fego, spertegajn en artoj militaj;
Ili nun iris de l' aro kaj al li renkonten rapidis,
Sur la kaleŝo starante; sed li alekkuris piede.
Jen, kiam ili kunvenis, la viroj kurintaj antaŭen,
15. Fego l'unua alĵetis la ponardegon longombran,
Sed ĝi la ŝultron maldekstran de la Tideid' preterflugis,
Lin maltrafinte. Kaj nun siavice ekĵetis la feron
La Tideido, kaj vana ne estis l' ekĵeto de l' mano:
Inter la mamoj en bruston vundita, sin Fego renversis.
20. Baldaŭ elsaltis Ideo kaj lasis la belan kaleŝon,
Ĉar li ne havis kuraĝon defendi la fraton falintan;
Mem li malcerte nun povus eviti la Kerojn malblankajn,
Se lin ne savus Hefesto, ĉirkaŭe li nokton volvinte,
Ke la maljunan Dareson ne tute ataku malĝojo.
25. Nun la ĉevalojn ekkaptis la filo de l' glora Tideo,
Kaj ilin liaj amikoj kondukis al ŝipoj fleksitaj.
Sed la kuraĝaj Trojanoj, vidinte la du Daresidojn,
Unu kurantan kaj duan senvivan ĉe lia kaleŝo,
Ĝemis malĝoje en koro. Sed la bluokula Ateno
30. Prenis Areson per mano kaj diris al la tumultama:
„Urbdetruisto Areso, ho, vormortigulo sangama,
Ĉu ni ne lasos l' Aĥaĵojn kaj la Trojavirojn tut-sole
Fari disputon, al kiu Zeŭso donacos la venkon,
Kaj ni mem iros nun for kaj evitu koleron de Zeŭso?“
35. Tiel ŝi diris kaj la tumultaman Areson fortiris
Kaj ĉe Skamandro sur bordo, de herboj kovrita, sidigis.
Sed la Danaoj premegis Trojanojn, kaj po unu homo
Ĉefojn iliajn mortigis. L' unua la reĝo Atrido
Ĵetis sur teron Odion, la ĉefon de Halizonoj,
40. Lin, turniĝintan l' unua; li ĵetis ponardon en dorson
Supran, en mezo de ŝultroj; la kupro tra brusto eliris,
Kaj li bruege ekfalis, soninte per siaj armiloj.
Idomeneo mortigis la filon de Boro Meona,
Feston, venintan de lando Tarno la fruktoportema;
45. Idomeneo, la lerta ponardoĵetisto, trapikis
Lin, kiam li sur kaleŝon suriris, en ŝultron la dekstran.
Li de l' kaleŝo defalis, mallumo terura lin prenis.

Liajn armaĵojn forprenis l'amikoj de Idomeneo.

Sed Skamandron, gloregan ĉasiston Strofio-naskiton,

50. Per ponardego multakra mortigis l'Atrid' Menelao,
Lin la ĉasiston lertegan. Lin mem Artemiso instruis
Ĉasi la bestojn sovaĝajn, nutratajn de montoj arbaraj;
Sed al li helpis nun nek Artemiso la sagamantino,
Nek lia arto ĵetadi tre malproksimen la sagojn.

55. Nun Menelao Atrido la glora ponardoĵetisto
Lin forkurintan trapikas per ponardego la dorson
Supran en mezo de ŝultroj, kaj ĝi tra la brusto eliris.
Falis li teren vizaĝe, kaj sur li armiloj eksonis.

Sed Meriono mortigis Fereklon; lin naskis artisto

60. Nome Harmono, sciinta diversajn artegajn objektojn
Fari, ĉar lin pli ol ĉiujn amis Palas-Ateno.
Li ankaŭ por Aleksandro konstruis la ŝipojn nigretajn,
Fonton de grandaj malbonoj, malbono por la Trojoviroj
Kaj por li mem: li neniel komprenis la diron de dioj.

65. Nun Merion' persekutis lin kaj lin atingis kurante
Kaj en la dekstran postvangon entrasis, kaj jen, trapikinte
L'urinvezikon, la fero eliris el osto kontraŭa,
Kaj genuflekse li falis, lin ombro de morto ĉirkaŭis.

Mego mortigis Pedeon, la filon de Atentoro,

70. Filon bastardan, sed zorge de l'dia Teano nutritan
Kiel la propraj infanoj, por plaĉi al edzo amata;
Al li alkuris Filido la glora ponardoĵetisto,
Trafis lin rekte en nukon per la ponardego multakra,
Kaj tra la dentoj irinte la kupro subtranĉis la langon;
75. Li per la dentoj ekpemis la kupron kaj falis en polvon.

L'Evemonido Eŭriplo mortigis Hipsenoron,
Filon de la kuraĝul' Dolopi' de Skamandro estinta
Pastro, de sia popolo kiel di' adorita.

Nun la glorega naskito de Evemono, Eŭriplo

80. Lin forkurintan alkuris, atakis kaj trafis en ŝultron
Apudiĝinte kun glavo, kaj manon la fortan forhakis;
Valen la mano plensanga subfalas, kaj liajn okulojn
Fermis la Mojro potenca kaj morto la sangfluiganta.

Tiel ili laciĝis en la terura batalo.

85. Sed vi ne sciis por kia popol' la Tidido batalis,
Ĉu kontraŭ la Aĥajidoj, ĉu kontraŭ viroj Trojanoj,
Ĉar furioza li kuris sur val' kiel plena rivero
Kuras, nutrita de vintraj neĝoj, kaj pontojn fortiras;
Ĝian kuradon ne povas deteni la pontoj fortegaj
90. Nek la bariloj de kampoj, kovritaj de riĉaj kreskaĵoj,
Kiam la pluvoj de Zeŭso multigas subite la akvon,
Kaj la laboro de multaj junuloj pereas sur bordo:
Tiel de la Tideido nun estis ĵetitaj la aroj
De Trojaviroj, paŝintaj returnen malgraŭ grandnombro.
95. Kiam lin vidis la filo de Likaono glorega,
La rapidantan sur valo kaj ĉie pelantan la vicojn,
Kontraŭ Tidido li streĉis la arkopafilon kurbitan,
Sagon alcelis kaj trafis lin rekte en ŝultron la dekstran,
En la kiraso-kaveton; la sago maldolĉa traflugis
100. Flankon kontraŭan, kaj lian kirason ruĝigis la sango.
Laŭte ekkriis la glora filo de Likaono:
„Ho vi, kuraĝaj Trojanoj, antaŭen ĉevaloŝpornintoj,
Ĉar la plej bona Aĥajo estas trafita; mi diras,
Li kontraŭstaros nelonge la sagon potencan, se vere
105. Filo de Zeŭso min vokis ĉi tien de lando Likio“.
Tiel ĝojkriis li; tamen tiun la sago ne bridis,
Li posten paŝis kaj antaŭ sia jungita kaleŝo
Metis sin kaj al Stenelo la Kapaneido eldiris:
„Kapaneido amata, rapidu el via kaleŝo
110. Ke vi eltiru el mia ŝultro la sagon maldolĉan.“
Tiel li diris; Stenel' el kaleŝo sur teron elsaltis
Kaj apudiĝis kaj tiris el ŝultro la sagon pafitan.
Tuj tra l'plektitaj kiraso-ringetoj elŝprucis la sango.
Nun Diomedo, l'heroo kuraĝa, laŭte ekpreĝis:
115. „Aŭdu, diin' nevenkebla, filino de l'Ŝildotenanto!
Se vi min kaj mian patron iam ameme bonfaris
En malamika batalo, vi amu min nun, ho Ateno,
Ke mi mortigu la viron kaj trafu lin per ponardego,
Lin, kiu nun la unua min vundis kaj vantas ĝojkrie
120. Ke mi neniam pli vidos la lumon brilantan de l'suno.“
Tiel li diris preĝante. Atentis lin Palas-Ateno

Kaj liajn membrojn, piedojn kaj manojn ekfaris pli fortaj,
Alproksimiĝis al li kaj eldiris la vortojn flugilajn:

„Nun, Diomedo, konfidu kaj kontraŭ Trojanoj batalu;

125. En vian bruston mi metis vian patran potencon,
Kiun havis Tideo, li la ŝildoskuinto;
Mi ankaŭ metis de viaj okuloj la nubon antaŭan
Por ke vi povu nun bone rekoni homojn kaj diojn.
Tial se al vi aperos dio por vin ektenti,

130. Gardu vin kontraŭbatali iel la diojn senmortajn;
Sole nur se Afrodito la Zeŭsofilino envenos
En la batalon, vi povas ŝin vundi per kupro la akra.“

Tiel dirinte, la bluaokula Ateno foriris,
Kaj Diomedo rapidis ree en vicojn antaŭajn.

135. Se li pli frue flamegis kontraŭ Trojanoj batali,
Nun lin triobla flamego atakis kiel leonon,
Kiun paŝtisto, gardanta sur kampo ŝafojn riĉlanajn,
Vundis, sed ne plenmortigis, kaj besto transsaltas barilon
Li en ĝi nur pligrandigis koleron, sed helpis nenion
140. Kaj nun en ŝtalo kaŝiĝas, lasinte la bestojn timantajn,
Kiu sen ordo sin premas unu kontraŭ alia,
Sed la leono avida forsaltas tra l'alta barilo:
Tiel Tidid' furioza en la Trojaron eniĝis.

Li Astinoon mortigis kaj Hipenoron la reĝon,
145. Tiun frapinte malsube en mamon per la ponardego,
Tiun ĉi per la glavego en la ŝlosiloston sur ŝultro
Tiel ke l'ŝultro de lia kolo kaj dorso disiĝis.

Ilin lasinte, li kuris al Poliid' kaj Abaso,
Filoj de la maljunulo songklarigist' Eŭridamo
150. Kiu al la foririntoj tamen ne songoklarigis.
Ilin mortigis Tidido kaj prenis l'armilojn de ili.
Nun li atakis Toonon kaj Ksanton — du Fenopoidojn,
Kiujn Fenop' maljunaĝe embriis, kaj nun li grizulo
Pli jam ne naskos aliajn por lasi al ili l'heredon.

155. Ilin Tidido atakis kaj vivon la dolĉan forrabis
Kaj al la patro — nur sole kruelan malĝojon kaj ĝemon
Lasis: ĉar ilin, vivantajn kaj de la milito venantajn,
Li pli ne vidis; fremduloj ilian heredon ricevis.

Nun li du filojn de la Dardanido Priamo atakis,
160. Kune starintajn kaleŝe, Ĥromion kaj Eĥemenon.
Kiel leono, kuranta al bovoj, forŝiras la kolon
De bovideto aŭ bovo, sin en arbaro paŝtantaj,
Tiel Tidido faligis la ambaŭn de l'bela kaleŝo
Malgraŭ la kontraŭstarado, kaj rabis de ili l'armilojn;
165. Sed la ĉevalojn fortiris liaj amikoj al ŝipoj.

Nun lin Eneo ekvidis ekstermi la vicojn de viroj,
Kaj tra l'batalo li kuris al mez' de l'armiloj-krakado,
Diosimilan Pandaron serĉante, ĉu li lin eltrovos.
Li lin eltrovis, la fortan kaj neriproĉeblan heroon,
170. Kaj apud li stariĝinte eldiris al li, parolante:

„Kie vi kaŝas, Pandaro, la arkopafilon kaj sagojn
Kaj vian gloron, kiun neniu kuraĝas konkuri
Kiun de vi en Likio neniu povas forpreni?
Levu la manojn al Zeŭso kaj pafu en tiun ĉi homon,
175. Kiu ajn estas li, la triumfant', ekstermanta multege
Da Trojaviroj: al multaj herooj li rompis genuojn.
Sed ĉu ne estas li dio, kiu Trojanojn koleras
Pro nefarita ofero, ĉar dio terure ja venĝas?“

Al li la glora Likaonido respondis dirinte:
180. „Nobla Ene', konsilisto de kuprearmitaj Trojanoj,
Tute li estas simila al filo de l'glora Tideo,
Ĉar mi rekonas la ŝildon kaj kaskon kun tri por-okuloj
Kaj la ĉevalojn; cetere li estas eblege diaĵo.
Tamen, se estas li hom', la dirita kuraĝa Tidido,
185. Li ne sen dio certege batalas, sed ĉe li proksime
Staras senmorta, volvita de nubo ĉirkaŭe la ŝultroj
Kaj formetinta la sagon, pli frue de mi alcelitan,
Ĉar mi alsendis jam sagon, kiu lin trafis en ŝultron
Dekstran, kaj ĝi ekeniĝis, irinte tra kav' de l'kiraso.
190. Mi jam esperis ke mi lin enĵetis en la Aidon,
Tamen ne venkis lin. Kontraŭ ni agas nun dio kolera.
Mi nun ne havas ĉevalojn, ne havas batalokaleŝon;
Dome Likie mi lasis dekunu belegajn kaleŝojn,
Nove kaj bone faritajn kaj de tapiŝoj kovritajn
195. Kaj apud ĉia po du unujugaj ĉevaloj troviĝas,

- Kiuj multnanĝas hordeon blankan kaj spelton nutrantan.
Certe min multe admonis l'hero' Likaono maljuna
Tie en bela domego, kiam mi tien ĉi iris,
Multe konsilis kunpreni ĉevalojn kaj ankaŭ kaleŝon
200. Por Trojanarojn konduki en la batalon teruran,
Tamen mi lin ne obeis (sed tio ĉi estus pli bone);
Mi ilin ŝparis, timante ke mankos al ili nutraĵo
Inter la granda arego, ĉar ili kutumis manĝegi.
Tial mi venis piede sen miaj ĉevaloj en Trojon,
205. L'arkopafilon fidante. Sed ĝi al mi servis neniel!
Ĉar mi ensendis jam en du ĉefojn gloregajn po sago,
En la Tididon kaj en l'Atreidon, de l'ambaŭ elŝprucis
Sango el vundoj, sed mi ilin sole pli furiozigis.
En malfeliĉa momento de najlo la arkopafilon
210. Mi tiun tagon forprenis, kiam al Trojo amata
Mi alkondukis Trojanojn por dian Hektoron honori.
Se mi en hejmon revenos kaj vidos per miaj okuloj
Mian patrujon, l'edzinon kaj domon la alttegmentitan,
Ke mian kapon de l'korpo homo fremdulo fortranĉu,
215. Se mi la arkopafilon ne ĵetos en fajron brulantan,
Ĝin disrompinta estinte, la senutilan servanton.“

Sed al li baldaŭ rediris Eneo la ĉefo Trojana:

- „Ho, ne parolu vi tiel. L'afero nun ne aliĝos
Ĝis ni ambaŭ, kaleŝe starante, al tiu ĉi homo
220. Kontraŭmetiĝos por lin nun elprovi per niaj armiloj.
Iru do, iru en mian kaleŝon por ke vi sciigu
Kiaj estas la Trojaj ĉevaloj, povantaj sur kampo
Persekutegi kurantojn kaj ankaŭ forkuri rapide.
Ili nin savos certege, en urbon tironte, se ree
225. La Tideido de Zeŭso novan gloron ricevos.
Iru, la vipon kaj la brilegantajn ĉevalkondukilojn
Prenu, kaj tuj mi komencos batali sur la kaleŝo,
Aŭ vi mem lin batalu, kaj mi la ĉevalojn kondukos.“

Al li respondis la glora Likaonido dirinte:

230. „Prenu, Ene', kondukilojn vi mem por ĉeval-
kondukado.

Ili pli bone rapidos, de manoj kutimaj regataj,

- Se eble nin Diomedo Tidido denove kurigos.
Ĉar ili povas ektimi kaj perdi la vojon kaj kampen
Tiri nin for, vian voĉon pli apud si ne aŭdante;
235. Tiam la glora Tidido al ambaŭ ni baldaŭ rapidos
Kaj nin mortigos kaj prenos viajn belegajn ĉevalojn.
Tial konduku vi mem la kaleŝon kaj la ĉevalojn;
Lin, la venonton, mi mem per la kupro akrega ricevos.“
Tiel ili parolis kaj iris sur belan kaleŝon,
240. Flame pelinte la bestojn rapidajn al Diomedo.
Ilin ekvidis Stenelo la Kapaneido glorega
Kaj al Tidido eldiris tiujn ĉi vortojn flugilajn:
„Ho Diomedo Tidido, vi, al mia koro plaĉanta,
Vidu, flamcelas vin kontraŭbatali du homoj-fortuloj,
245. Nemezureble kuraĝaj, l'unua, pafisto lertega
Nome Pandaro, gloranta sin esti Likaonido,
Kaj la alia — Eneo, de neriproĉebla Anĥizo
Kaj de patrin' Afrodito gloranta sin esti la filo.
Iru, ni ambaŭ forkuru, ĉesigu vi nun furiozi
250. En la falangoj antaŭaj por ke vi la vivon ne perdu.“
Sed lin rigardis minace kaj diris l'hero' Diomedo:
„Vi ne parolu pri kuro, mi eĉ al vi mem ne obeos,
Ĉar mia gento ne havas kutimon forkuri batalon
Aŭ pro timo kaŝiĝi; mi havas ankoraŭ la forton;
255. Mi en kaleŝo enuas staradi kaj kiel mi estas,
Mi kontraŭiros; Ateno al mi malpermesis forkuri.
Ilin de ni ne fortiros iliaj rapidaj ĉevaloj
Tre malproksimen, se unu el ili de ni eĉ forkuros.
Sed mi vin diras, kaj tion ĉi vi en memoro konservu:
260. Se al mi donos la bonkonsilanta Ateno la gloron
Ilin ambaŭ mortigi, vi niajn ĉevalojn detenu,
La kondukilojn liginte al ronda tenil' de l'kaleŝo,
Poste vi al la ĉevaloj de Eneo rapidu
Kaj ilin de la Trojanoj pelu al viroj Anĥajaj;
265. Liaj ĉevaloj devenas de l'gento, al Troso de Zeŭso
Kiel ŝanĝon donita por fil' Ganimedo, pli bonaj
Ol ĉiuj bestoj, lumataj de l'suno kaj ruĝo ĉiela.
Reĝo de viroj, Anĥizo, akiris ĉi tiujn ĉevalojn,

Ilin metinte kun inoj sekrete de Laomedono.

270. Ses ĉevalidoj naskiĝis poste en lia domo,
Kvaron de ili li havas kaj nutras zorgege en ŝtalo
Kaj al Eneo li donis la du teruraĵojn restintajn.
Ilin forkapti — ĉi tio estus por mi bela gloro.“

Tiel l'herooj parolis, intersanĝante la vortojn.

275. Sed l'ambaŭ viroj alvenis kun la rapidaj ĉevaloj.
Al Diomedo eldiris la Likaonido l'unua:

„Ho, militema heroo, kuraĝa kaj glora Tidido,
Certe la sago maldolĉa de l'arkopafil' vin ne venkis.
Nun ni elprovos, ĉu la ponardego vin trafos pli bone.“

280. Diris kaj ĵetis skuinte la ponardegon longombran,
Kiu eniĝis en ŝildon de Diomedo, kaj tra ĝi
Flugis la akra pintaĵo kaj en la kirason enfrapis.
Laŭte ekkriis la glora filo de Likaono:

„Mi nun travundis l'ingvenon al vi, ho mi nun pli
ne pensas

285. Ke vi longtempe suferos, vi certe min multe glorigos.“

Sed la Tidido kuraĝa eldiris al li ne timante:

„Vi min maltrafis, vi ĵetis pretere, sed nun al mi ŝajnas,
Vi ne foriros pli frue ol unu el vi nun subfalos
Kaj satigos per sango Areson la mallacigeblan.“

290. Diris kaj ĵetis ponardon; ĝin Palas-Ateno direktis.
Apud okuloj, en nazon ĝi iĝis tra l'dentoj la blankaj,
Nedeteneble trahakis la langon ĉe l'sama radiko
Kaj eliris denove kun forto el sub la mentono.

295. De la kaleŝo li falis, kaj sonis sur li la armiloj
Brilaj, movemaj; pro timo depaŝis de li la ĉevaloj
Bone kurantaj, sed lin tuj forlasis l'animo kaj forto.

Jen ekrapidis Eneo kun ŝildo kaj longa ponardo,
Ĉar li tre timis ke la Aĥajidoj la korpon fortiros.

Li ĉirkaŭiris ĝin kiel leono fiere-potenca,

300. Streĉis antaŭen la long-ponardegon kaj ŝildon rondetan,
Ĉiun minacis per morto, kiu al li apudiĝus,
Kaj terurege kriegis. Sed kaptis Tidido ŝtonegon
Tian multpezan ke ĝin eĉ ne povus eklevi du homoj
El nun vivantaj, sed li unu sola ĝin svingis facile

305. Kaj en femuroartikon ĝin ĵetis, kie la osto
En la femuro turniĝas kaj havas la nomon kotulo;
Kaj la kotulon pecigis, ambaŭ vejnojn disŝiris,
Haŭton forŝiris la ŝtono kruela, kaj falis l'heroo
Genufleksinte; li sin per la mano fortega apogis
310. Kontraŭ la tero, kaj liajn okulojn ĉirkaŭis la nokto.
Tie li nepre pereus, Eneo la reĝo de viroj,
Se lin ne vidus la Zeŭsofilino, diin' Afrodito,
Ŝi, lin metinta en mondon per juna paŝtisto Anĥizo.
Ĉirkaŭ la filo amata ŝi volvis la brakojn blankegajn,
315. Antaŭ li faldojn de sia brila vestaĵo dismetis
Kontraŭ sagaroj de viroj, ke ia rajdanta Danao
Bruston al li ne trapiku kaj ne forigu la vivon.
Tiel ŝi de la batalo fortiris la filon amatan.
Tamen la Kapaneido neniel la vortojn forgesis,
320. Kiujn eldiris al li Diomedo Tidido kuraĝa.
Flanken li foren kondukis siajn belegajn ĉevalojn
Ekster batal', kondukilojn al rondo kaleŝa alligis,
Al bel-kolharaj ĉevaloj de Eneo rapidis
Kaj de Trojanoj forpelis ilin al viroj Aĥajaj,
325. Al Deipilo, sia amiko, pli multe ol ĉiuj
Samaaĝuloj amata pro kunharmonio de sentoj,
Por ilin al la ŝiparo konduki; sed li mem l'heroo
Iris en propran kaleŝon kaj la kondukilojn ekkaptis
Kaj rapidigis la fortajn ĉevalojn al Diomedo.
330. Tiu ĉi nun persekutis Kipridon per kupro kruela,
Ĉar li bonsciis, ŝi estis timema kaj ne el diinoj,
Kiuj en la milito regas virojn mortemajn
Kiel Ateno aŭ kiel Enio la urbdetruanta.
Kiam, ŝin persekutante tra aroj, li ŝin ekatingis,
335. Li ponardegon etendis, la filo de l'glora Tideo,
Svingis ĝin kaj per la kupro ekvundis la manon diinan
Tra la kovraĵ' ambrozia, plektita por ŝi de Ĥaritoj,
En manoplaton ĉe l'fingroj. Elŝprucis la sango diina,
Pura fluaĵo, estanta en vejnoj de dioj feliĉaj,
340. Ĉar ili panon ne manĝas kaj vinon nigretan ne trinkas
(Tial ja ili ne havas homsangon kaj nomas sin dioj).

Nun la diino laŭtege ekkriis kaj ĵetis la filon,
Sed al li venis tuj Febo-Apolo, lin prenis per manoj,
345. Kovris per nubo ke ia Aĥaja heroo rajdanta
Bruston al li ne trapiku kaj vivon de li ne forprenu.
Nun la kuraĝa Tidido ekkriis per voĉo laŭtega:

„Zeŭsofilino, vi iru nun for de l'batalo kaj bruo!
Ĉu vin pli ne kontentigas trompadi timemajn virinojn?
350 Se vi denove eniĝos en la batalon, mi pensas
Tiam vin prenos teruro ĉe sola parol' pri milito.“

Diris li; ŝi konfuzita foriris kun forta doloro,
Ŝin de ĉi tie fortiris Iriso piedorapida
La dolorantan, sur kiu la haŭto blankega nigriĝis.
355. Nun, de l'batalo maldekstre, ŝi trovis Areson brueman,
Kies ĉevalojn kaj ponardegon ĉirkaŭis nubego.

Ŝi genuflekis rapide antaŭ la frato amata
Kaj lin petegis por liaj ĉevaloj kun oraj ornamoj.
„Frato amata, ho helpu kaj donu al mi la ĉevalojn
360. Ke al Olimpo mi iru al la loĝejo de dioj.
Min dolorigas la vundo, ĉar trafis min tie mortema,
La Tideido, povanta nun kontraŭbatali eĉ Zeŭson.“

Diris ŝi, kaj la ĉevalojn kun oraj ornamoj li donis.
Ŝi sur kaleŝon suriris, sentante en koro malĝojon.
365. Apud ŝi estis Iriso, preninta ĉevalkondukilojn
Kaj kuriginta per vip' la ĉevalojn, volonte kurintajn.
Ili atingis la altan Olimpon, loĝitan de dioj.
Jen la ĉevalojn haltigis Iriso piedorapida,
Ilin maljungis kaj la ambrozian nutraĵon alportis.

370. Sed genufleksis la dia Kiprido antaŭ Diono,
Sia patrino, kaj tiu ĉi prenis l'idinon en brakojn
Kaj karesante per mano jenan parolon eldiris:

„Kia senmorta vin tiel ofendis, amata filino,
Kvazaŭ vi antaŭ okuloj de ĉiuj farus krimaĵon?“
375. Sed Afrodito-ridetamulino eldiris responde:

„Vundis min la fierega Tidido, l'heroo kuraĝa,
Ĉar de l'batalo mi tiris Eneon la filon amatan,
Kiu al mi la plej kara estas inter la homoj.
La Aĥajidoj ĉesigis batali kontraŭ Trojanoj,

380. Nun la Danaoj metiĝis kontraŭ la dioj senmortaj.“
Al ŝi respondis Diono, diino inter diinoj:
„Ho, paciencu, filino, kaj viglu malgraŭe doloro,
Ĉar ne malmulte da anoj Olimpaj ĝis nun jam suferis
Pro mortemuloj, kaj unu alian malutilegis.
385. Tiel suferis Areso, ĉar lin Efialt' kaj Atoso,
Du Aloidoj, per multepezantaj katenoj kunligis;
Dektri monatoj li kuŝis, ligita en kupra fermejo;
Tie li nepre pereus la nesatigebla Areso,
Se Eribeo, ilia bela duonopatrino
390. Ne eksciigus Hermeson, kaj tiu ĉi savis la dion,
Kiu jam estis sen forto sub ŝarĝo die siaj katenoj.
Filo de Amfitriono Heron ne malpli turmentis;
Li la diinon per sago tripinta en mamon la dekstran
Vundis, kaj ŝi suferegis dolorojn neelporteblajn;
395. Ankaŭ Aido la tre timigema dio suferis,
Ĉar tiu sama mortema, la filo de l'Ŝildotenanto,
Apud la pord' de mortintoj lin tre kruele ekvundis,
Sed li leviĝis al domo de Zeŭso, sur vastan Olimpon,
Korsuferante kaj de dolorego prenita, ĉar estis
400. En lia ŝultro potenca la sago, lin turmenteginta;
Sed surmetinte rimedon dolorforigantan, Peono
Lin elkuracis, ĉar li ja ne estis naskita por morti.
L'arogantul' abomena, ne timeganta malpie
Sagojn direkti en diojn, anojn de l'supra Olimpo!
405. La bluokula Ateno lin kontraŭ vi tiel ekscitis.
Ho, malsaĝulo! ne sciis li, filo de l'glora Tideo:
Kiu kontraŭas la diojn, ne vivas en mondo longtempe;
L'idoj sur liaj genuoj ne sidos, nomante lin patro,
Lin, de milito kaj de terurega batalo venontan.
410. Kiel ajn la Tideido estus kuraĝa, li timu
Ke kontraŭ li ekaperu iu pli forta ol vi
Kaj ke Adrastofilino Egialeo la saĝa
Iam de dormo leviĝu kaj veku plorante la sklavojn,
Bedaŭregante la edzon, la plej eminentan Aĥajon,
415. Ŝi la noblega edzin' de l'ĉevalobridulo Tidido.“
Tiel ŝi diris kaj viŝis la sangon per manoj diinaj

- Baldaŭ saniĝis la mano kaj la dolorego foriĝis.
Tamen ĉi tion ekvidis diinoj Ateno kaj Hero
Kaj ili Zeŭson Kronidon ekscitis per vortoj pikemaj.
420. La bluokula Ateno l'unua al li ekparolis:
„Ho, patro Zeŭso, ĉu vi min pro mia parolo koleros?
Certe Kiprido reigis belegan Aĥajan virinon
Iri nun al la Trojanoj, kiujn ŝi tiel multamas,
Sed karesante la belan vestaĵon de la Aĥajino,
425. La delikatan maneton ŝi gratis ĉe ora hoketo.“
Tiel ŝi diris. La patro de homoj kaj dioj ridetis
Kaj alvokinte ŝin diris al Afrodito orita:
„Viaj agadoj, filino, ne tuŝas aferojn militajn,
Vi vin okupu per dolĉaj aferoj de gajaj edziĝoj.
430. Tiujn prizorgas Ateno kaj la bruama Areso.“
Tiel la dioj senmortaj unu alian parolis.
Sed la kuraĝa 'Tidid' Diomedo atakis Eneon,
Kvankam li sciis ke Febo-Apolo lin kovris per mano;
Sed li ne timis la dion potencan kaj ĉiam deziris
435. Tiun mortigi kaj preni de li la armilojn gloregajn.
Li jam trifoje atakis, flamante Eneon mortigi
Kaj lian ŝildon brilantan la dio trifoje rebatis,
Sed kiam diasimile li faris la kvaran atakon,
Al li ekkriis minace la Malproksimenpafanto:
440. „Gardu vin nun, ho Tidido, foriru! Neniam al dioj
Vi egaligi pretendu neniam similis la gento
De senmortuloj al homoj mortemaj, sur tero irantaj!“
Tiel li diris, kaj iom depaŝis l'heroo Tidido,
Ĉar li ektimis koleron de la Malproksimenĵetanto.
445. Dum Feb-Apolo Eneon de la batalo fortiris
Tien, en sanktan Pergamon, kie li havis sanktejon.
Tie diin' Artemizo sagama kaj Leto lin flegis,
Bone kuracis kaj en la sanktejo vastega honoris.
Tamen la di' kun l'arĝenta pafarko ekkreis fantomon,
450. Kiu precize similis Eneon kun liaj armiloj.
Apud ĉi tiu fantomo Trojanoj kaj diaj Aĥajoj
Unuj aliajn frapegis en brustojn, en bovajn felegojn
De bonronditaj ŝildegoj kaj de malgrandaj ŝildetoj.

- Tiam eldiris Apolo al la bruegema Areso:
455. „Virmortigulo Areso, ho urbdestruisto sangama,
Ĉu vi ne volas fortiri nun el la batalo ĉi tiun.
Viron Tididon, povanton eĉ Zeŭson Kronidon ataki?
Li jam ekvundis pli frue Kipridon en manoradikon,
Poste min mem li atakis simile al dio kolera.“
460. Tiel li diris kaj iris sidiĝi sur supron Pergaman.
La furioza Areso nun celis eksciti Trojanojn;
Li similiĝis Akamon, la ĉefon teruran de Trakoj
Kaj ekparolis al diaj naskitoj de l'reĝo Priamo:
„Filoj de reĝo Priamo, de Zeŭso Kronido amataj,
465. Kiom da tempo ankoraŭ Aĥajoj mortigos Trojanojn?
Ĉu ĝis ili atingos pordegojn la belkonstruitajn?
Tie ja kuŝas heroo, egala al dia Hektoro,
Filo de la grandanima Anĥizo, la glora Eneo,
Iru ni kaj de l'batalo ni savu la anon kuraĝan.“
470. Tiel li diris kaj vekis en ĉia animo kuraĝon,
Sed Sarpedono komencis riproĉi la dian Hektoron.
„Kie, Hektoro, kaŝiĝis via antaŭa kuraĝo?
Vi ja intencis defendi la urbon sen iaj ligoj,
Sola, helpata nur de la bofratoj kaj fratoj samsangaj.
475. Tamen mi vidas nun kaj eĉ rimarkas el ili nenion.
Ĉiuj nun timas simile al hundoj, vidantaj leonon,
Dume ni, simplaj ligoj, kontraŭbatalas kuraĝe.
Vi min rigardu: mi estas ligano el land' malproksima,
De l'malapuda Likio eĉ Ksanto kun akvoj bruantaj,
480. Kie mi lasis l'amatan edzinon kun fil' en lulilo,
Ankaŭ riĉaĵojn, de ĉiu malriĉegulo volatajn,
Sed malgraŭ tio mi igas Likanojn kaj mem mi volegas
Kontraŭbatali la virojn, kvankam mi havas nenion,
Kion l'Aĥajoj de tie ĉi foren kondukus aŭ prenis:
485. Vi do, vi staras sen movo kaj ne ekscitas aliajn
Virojn kuraĝe batali kaj la virinojn defendi.
Timu ke, kiel per reto ĉion prenema, kaptitaj,
Vi ekfariĝu akiro de la malamikoj venkontaj,
Kiuj tre baldaŭ detruos la Trojon, densege loĝitan!
490. Sole nur vin ja konvenas zorgadi dum tago kaj nokto,

Peti la ĉefojn-liganojn, venintajn de malproksime
Seninterrompe batali kaj vortojn riproĉajn ne diri.“

Tiel li diris kaj pikis la koron de l'dia Hektoro.

Li el kaleŝo elsaltis sur teron kun siaj armiloj

495. Kaj, ponardegon svingante, rapidis tra l'aroj da viroj,
Al la batalo vokante, kaj vekis kruelan batalon.

Jen returniĝis Trojanoj kaj iris renkonten Aĥajoj,

Sed l'Argoanoj kuntiris la vicojn kaj ilin atendis.

Kiel la vento forblovas gren-ŝelojn de sanktaj draŝejo

500. Apud la grenventumistoj, kiam l'orbukla Demetro
Ŝelojn de grenoj formetas, blovigadante la venton,

Kaj la draŝejoj blankiĝas sub ili: tiel l'Aĥajoj

Tute kovriĝis per polvo, kiun inter l'amasoj

Alte al kupra ĉielo forlevis la hufoj ĉevalaj,

505. Kiuj batalon reiris, per direktintoj igitaj.

Jam ili metis la manojn al malamikoj, sed nokton

Faris Areso bruema ĉe ili por helpi Trojanojn,

Tra la aregoj irante kaj plenumante l'ordonon,

Al li donitan de Febo-Apolo, portanta orglavon —

510. Igi Trojanojn batali, se Palas-Atenon li vidos

Iri de tie, ĉar ŝi al Danaoj estis helpanta.

Sed Feb-Apolo Eneon el sia riĉega sanktejo

Elforkondukis kaj lin refortigis, la ĉefon popolan,

Kaj li aperis en mezo de viroj, kaj ĉiuj ĝojegis

515. Ree vidante lin vivi kaj iri al ili sen vundoj

Kaj per kuraĝo flamegi, sed li demandita ne estis:

Ilin zorgigis alio, sendita de Febo-Apolo

Kaj de Ares' mortigulo kaj de terura Malpaco.

Sed Odise' kaj Tidido kune kun ambaŭ Ajaksoj

520. Igis Danaojn batali, kvankam ĉi tiuj sen igo

Nek la atakojn nek kriojn de Trojoviroj ektimis:

Ili kuraĝe atendis simile al nuboj, de Zeŭso

Supremetitaj sur montaj supraĵoj en tempo malventa

Tute senmove, se dormas Boreo kun ĉiuj aliaj

525. Ventoj brueme-koleraj, kiuj la nubojn mallumajn

Sur la ĉielo dismetas per brueganta blovego:

Tiel Danaoj sen timo kuraĝe atendis Trojanojn,

Kaj la Atrido trakuris la virojn kaj multe konsilis:

„Estu vi viroj, amikoj, kaj prenu kuraĝon en korojn!

530. Unu alian honoru vi en la terura batalo:

Ĉe reciproka honoro pli multe saviĝas ol falas,
Nur forkuranto ricevas nenian helpon kaj gloron.“

Diris kaj la ponardegon alĵetis kaj viron autauan,
Deikoonon, l'amikon de l'glora Eneo, enbatis,

535. La Pergasidon, lin kiel idojn Priamajn Trojanoj

Multe estimis: li ĉiam batalis en vicoj antaŭaj.

Agamemnono lin trafis per ponardego en ŝildon;

Ĝi ne debatis la frapon, la kupro ĝin tute trapikis

Kaj tra la zono traigis en lian ventron malsupre.

540. Brue li falis sur teron, eksonis sur li la armiloj.

Nun la plej bonajn Aĥaĵojn mortigis la viro Eneo,
Du Dioklidojn, Kretonon kaj fraton de li — Orsilohon.

Patro ilia, loĝanto de l'belkonstruita Ferurbo,

Estis tre riĉa gentano de la rivero Alfeo,

545. Kies akvoj vastegaj fluas sur kampoj Piliaj;

Ĝi Orsilohon eknaskis, reĝintan grandegan popolon,

Kaj Orsiloho eknaskis Dioklon la grandaaniman,

Kaj de ĉi tiu Dioklo devenis la dunaskitidoj

Orsiloh' kaj Kretono, sciantaj batali multspece.

550. Nun virigantaj estante, ili sur ŝipoj nigretaj

Sekvis Aĥaĵojn kontraŭ ĉevaloriĉega Trojurbo,

Gloron al Agamemnono kaj al Menelao Atridoj

Almilitante: nun ilin ĉirkaŭis la morto malluma.

Kiel sur alta supraĵo de monto du fortaj leonoj,

555. De leonino nutritaj en densa malluma arbaro,

Bovojn kaj ŝafojn grasegajn for de brutaroj rabadas

Kaj dezertigas la ŝtalojn de homoj, ĝis mem ili poste

Falas, al fin' mortigitaj per kupro akrega de homoj:

Tiel, venkitaj per manoj de la heroo Eneo,

560. Ambaŭ subfalas sur teron, similaj al pinoj altegaj.

Ilin vidinte subfali, ekĝemis l'hero' Menelao,

Kuris tra l'aroj antaŭaj, armita de kupro brilanta,

La ponardegon svingante: Areso lin multkuraĝigis,

Ĉar li esperis sekrete, ke lin nun Eneo mortigos.

565. Sed Antiloĥo, la filo de l'nobla Nestoro, lin vidis
Kaj li alkuris antaŭen: li timis ke l'ĉefo de viroj
Iel suferu kaj ĉiuj laboroj de l'viroj vaniĝu;
Ili jam ambaŭ la manojn kaj la ponardegojn akregajn
Unu kontraŭ alian eklevis, volante batali,
570. Sed Antiloĥo alkuris al ĉefo de la Danaidoj,
Kaj ne atendis Eneo malgraŭ la granda kuraĝo,
Kiam li vidis du virojn kune irintaj renkonten.
Tial al viroj Aĥajoj ili fortiris la korpojn
Kaj la du malfeliĉulojn redonis en manojn amikajn
575. Kaj re alkuris batali en la falangoj antaŭaj.
Nun ili Pilemenon Aresosimilan mortigis,
Ĉefon de Pafalagonoj kuraĝaj, armitaj de ŝildoj;
Lin Menelao Atrido la glora ponardoĵetisto
Per ponardego atakis kaj pikis lin tra l'ŝlosilosto,
580. Kaj Antiloĥo entrafis Midonon ĉevalkondukanton
L'Atimniidon (li forrapidigis la fortajn ĉevalojn),
Lian kubuton trafinte per ŝtono, la kondukiloj
Blankaj elfalis sur teron en polvon el liaj manoj;
Tuj Antiloĥo per glavo lian tempion trapikis,
585. Kaj li ĝemante subfalas de l'bonefarita kaleŝo
Kapomalsupren sur polvon kaj haltis per verto kaj ŝultroj.
Tiel li staris longtempe, tenita de l'sablo profunda
Ĝis la ĉevaloj lin puŝis kaj teron la korpon renversis,
Ĉar Antiloĥo alpelis ilin al viroj Aĥajoj.
590. Ilin tra l'vicoj Hektoro rimarkis kaj kuris al ili,
Laŭte kriante, kaj lin postekuris la vicoj Trojanaj
Fortaj, sekvante Areson kaj la sangoaman Enion,
Kiu kondukis la furiozegan malpacan Tumulton
Dume Ares' ponardegon teruran per mano altsvingis,
595. Apud Hektoro irante jen antaŭ l'heroo jen poste.
La Tideido kuraĝa lin vidis kaj forte ekstremis.
Kiel migranto malsperta, iranta sur kampo vastega
Apud rapida rivero, kuranta en maron, stariĝas
Ĉe ŝaŭmoaro bolanta kaj iras returnen kun timo:
600. Tiel depaŝis Tidido kaj kriis al Argopopolo:
„Kial, amikoj, ni tiel miregas ke l'dia Hektoro

Estas glorega ponardoĵetisto kaj tiel kuraĝa?
Ĉiam ja dio lin sekvas kaj for de li metas la morton
Kaj ankaŭ nun lin Areso kvazaŭ mortema alsekvas!
605. Tial depaŝu vi, ĉiam per Brust' renkontantaj Trojanojn.
Ke ne intencu vi diojn kontraŭbatali hodiaŭ."

Tiel li diris, sed la Trojaviroj sin pli proksimigis
Kaj jam du virojn kuraĝajn kaj spertajn Hektoro mortigis,
Ambaŭ sur unu kaleŝo, Meneston kaj Anhialon.

610. Tiujn mortigojn bedaŭris la Telamonido Ajakso,
Li apudiĝis kaj ĵetis sian ponardon la kupran
Kaj Selagidon Amfion entrasis, kiu en Peso
Loĝis, havante riĉaĵojn kaj kampojn; sed tamen la sorto
Lin bataligis pro reĝo Priamo kaj la Priamidoj;

615. Lin nun la Telamonido Ajakso entrasis en zonon,
La ponardego longombra eniĝis en ventron malsupran;
Brue li falis sur teron, kaj kuris la glora Ajakso
Liajn armilojn forpreni, sed ĵetis Trojanoj ponardojn
Akrajn kaj brilajn, — en lian ŝildon tre multaj eniĝis.

620. Li per piedo surpaŝis la viron kaj la ponardegon
Kaptis de l'korpo, sed li la belegan armaĵon ne povis
Preni de l'ŝultroj, ĉar lin ĉirkaŭŝutis de ĉie sagaro;
Timis li ke la fieraj Trojanoj lin povos ĉirkaŭi
Kaj, grandonombraj, kuraĝaj lin per ponardegoj atakos.

625. Kiel ajn granda li estis, potenca kaj multglorigita
Tamen li devis depaŝi pro la grandegeco de l'aro.

Tiel ili laboris en la terurega batalo

Dum Tlepolem' Heraklido, viro grandkreska kaj forta
Al Sarpedono la dia pro sorto malbona puŝiĝis.

630. Sed kiam ili kunvenis, la viroj kurintaj renkonten,
Ili — la filo kaj nepo de Zeŭso la nubkolektulo —
La Heraklid' Tlepolemo eldiris l'unna la vortojn:

„Kio devigis vin, ho Sarpedon', konsilisto Likia,

Tien ĉi veni tremadi, fremdulo pri l'arto batali?

635. Nur mensoguloj vin nomas ido de Zeŭso tondranta
Ĉar vi tro malsuperas tiujn virojn gloregajn,
Kiu de Zeŭso naskiĝis en tempo de homoj antaŭaj.
Oni rakontas ke tia estis la viro Heraklo,

Mia patro kuraĝa, koron leonan havinta.

640. Li tien ĉi por ĉevaloj de Laomedono alvenis
Sole kun seso da ŝipoj kaj kun malmulte da homoj;
Li ĉirkaŭrabis Trojurbon kaj dezertigis la stratojn.
Vi do, vi estas timema kaj vane vi ĉefas la virojn.
Ne, al mi ŝajnas ke vi al la viroj Trojanaj ne helpos,
645. El Likilando veninte; kaj se vi eĉ estus pli forta, —
Vi nun, de mi plenvenkita, foriros al pordo Aida.“

Sed Sarpedono, la reĝo Likia, eldiris renkonten:

- „Jes, Tlepolemo, ĉi tiu detruis la sanktan Trojurbon,
Sed nur pro la malsaĝeco de Laomedono malpia,
650. Kiu insultis lin, la bonfarinton, per vortoj malpiaj
Kaj la ĉevalojn ne donis, pro kiuj li estis veninta.
Sed mi al vi antaŭdiras la morton kaj sorton malluman,
Kiun vi prenos de mi, kaj venkita de mi, vi gloregon
Donos al mi, sed l'animon al la ĉevalriĉa Aido“.
655. Tiel li diris, sed levis la ponardegon fraksenan
Tlepolemo, kaj ambaŭ ili samtempe ekĵetis
La ponardegojn longombrajn kaj jen Sarpedono entrasis
La Heraklidon en kolon kaj traen la pinto eliris
Kaj mallumego plennigra liajn okulojn ĉirkaŭis.
660. Sed Tlepolem' en maldekstran femuron l'alian entrasis
Per ponardego multlonga, kaj ĝi en la korpon eniĝis
Ĝis la osto. Nur Zeŭso eksavis la filon amatan.

- Nun Sarpedonon la dian fortiris la noblaj amikoj
De la batalo, sed ŝargis lin la ponardego grandega,
665. Kiun li trenis: neniun rimarkis ĝin aŭ ekintencis
Tiri ĝin el la femuro, ke povu li iri facile:
Tiel liaj amikoj rapidis kaj estis zorgintaj.

- De sia flanko l'Aĥajoj Tlepoleonon fortiris
De la batalo. Sed lin Odiseo la dia ekvidis
670. La kuraĝulo; en li ekflamiĝis la koro en brusto.
Inter du pensoj ŝancelis sin lia prudento kaj koro,
Ĉu persekuti pli frue la filon de Zeŭso tondranta,
Aŭ atakinte Likiojn, el multaj forrabi la vivon.
Sed ne al li, Odiseo la glora, la sorto decidis
675. Filon kuraĝan de Zeŭso mortigi per kupro la akra.

Palas-Ateno ekscitis lin kontraŭ la viroj Likiaj,
Kaj li mortigis Keranon, Hromion kaj Alastoron,
Poste Alkandron, Halion, Pritanon kaj Noemonon;
Li, Odiseo la dia, mortigus pli multajn Likiojn,
680. Se lin rapide ne vidus Hektoro la kaskobrilanta.
Tuj tra la vicoj antaŭaj, armita de kupro radia,
Kuris li teruriganta l'Ahajojn, sed pri li ekĝojis
Nun Sarpedono Zeŭsido, kaj diris per voĉo plendema:

„Ho, Priamido, ne lasu min esti akiro Danaa,
685. Vi min defendu, ke flugu de mi pli malfrue la vivo
Tie, ĉe vi, en Trojurbo, ĉar al mi ne estas la sorto
En mian domon, en mian amatan patrujon reveni
Por mian karan edzinon kaj filon junetan ĝojigi“.

Tiel li diris. Hektoro, al li respondinte nenion,
690. Tuj rapidegis antaŭen, de flamo interna puŝita
La Argujanojn rebati kaj multajn animojn forrabi.
Sed Sarpedonon, je dio egalan, l'amikoj kuraĝaj
Metis sub fagon belegan de Zeŭso la ŝildotenanto;
La ponardegon fraksenan el lia femuro eltiris
695. La kuraĝul' Pelagono, lia amata amiko,
Kaj lin forlasis la spiro kaj nokto ĉirkaŭis l'okulojn,
Sed li respiris kaj baldaŭ la blovo de l'norda Boreo
Ĉirkaŭventumis freŝecon al lia animo tremanta.

Tamen l'Arganoj, premitaj de l'dia Hektor' kaj Areso,
700. Tute ne kuris al siaj ŝipoj nigretaj ĉe l'bordo,
Sed ankaŭ ne antaŭiĝis; nur iom post iom senĉese
Ili depaŝis, vidante Areson inter Trojanoj.

Sed kiu estis l'unua kaj lasta, de kiu l'armilojn
Rabis Hektoro, la fil' de Priamo, kaj kupra Areso?
705. Ili, je dio egala Teŭtras' kaj Oresto kuraĝa,
Treh'o l'heroo el lando Etolo kaj Enomao,
Post l'Enopido Eleno kaj Oresbi' belzonita,
Amasiginta riĉaĵojn; li estis loĝanto de Hilo
Apud la lago Kefiso, kaj tie ankaŭ aliaj
710. Beotujanoj, havintaj multegajn riĉaĵojn, loĝadis.

Sed kiam la blankamana diino Hero rimarkis
Multe da viroj Arganoj en la batalo perej,

Tuj ŝi eldiris al Palas-Ateno la vortojnflugilajn:

„Ve al mi, ho nevenkebla filino de l'Ŝildotenanto,

715. Vanan promeson ni estis donintaj al Menelao:

Hejmen venigi lin ruiniginto de l'Trojo belmura,

Se ni permesos Areson kruelan nun furiozegi.

Ne, ankaŭ ni nun pripensu por helpon potencan alporti“.

Tiel ŝi diris; atentis ŝin la bluokula Zeŭsido.

720. Dume rapide ekvestis la oroarmajajn ĉevalojn

Hero, la glora diino, — filino de l'granda Kronido.

Hebo, ĉirkaŭe l'kaleŝo almetis la radojn rondetajn

Kuprajn kaj okeradiajn, rulatajn de akso el fero;

Oro nedefektiĝebla brilis sur rondoj, sed supre

725. Bandoj el kupro troviĝis kaj ili ĉarmegis okulojn,

La radradioj arĝentaj estis beleg-rondigitaj,

La konduksidon brilantaj arĝentaj kaj oraj ŝnuregoj

Alfortikigis, kaj antaŭ ĝi levis sin arko duobla,

El ĝi eliris timono arĝenta, al kies finiĝo

730. Hebo alligis la jugon belegan, tra ĝi kondukilojn —

Ankaŭ el oro — traĵetis, kaj Hero submetis sub jugo

Diajn ĉevalojn rapidajn, flamantajn batali kaj brui.

Dum la filino de Zeŭso la Ŝildoportanto, Ateno

Lasis ruliĝi ĝis sojlo de l'patra domo la veston

735. Belan kaj multekoloran, de ŝi mem artege faritan;

Poste, vestinte kirason de l'nubkolektulo Kronido,

Prenis armilojn, la fonton de plorelvokanta milito

Kaj sur la ŝultron surĵetis la ŝildon, de franĝ' ornamitan

Timoportantan kaj de teruraĵoj de ĉie sekvitan:

740. De la Disigo kaj Forto, de la Persekuto terura,

Kaj de l'Gorgona kapego, ĉi tiu monstrego terura,

La mirindaĵo minaca de l'ŝildoportanta Kronido.

Poste ŝi sur sian kapon surmetis kvartufan kaskegon,

Oran, povantan surkovri viraron el cento da urboj.

745. Jen en la flaman kaleŝon ŝi iris kaj prenis ponardon

Grandan, multpezan, potencan, per kiu amason da viroj,

Kolerigantaj ŝin, punas l'idino de l'Patro potenca.

Hero, svinginte la vipon, kurigis la belajn ĉevalojn,

Kaj malfermiĝis krakinte la pordo ĉiela, al Horoj

750. Alkonfidita por gardi ĉielon kaj altan Olimpon,
Por ĝin malfermi kaj poste refermi per nubo densega,
Tra tiu pord' la diinoj pelis la belajn ĉevalojn.

Jen ili trovis Kronidon aparte de dioj aliaj
Sur montosupro tre alta de la multekapa Olimpo.

755. Tie ĉi Hero blankmana siajn ĉevalojn haltigis
Kaj la potencan Kronidon tiel demandis, dirinte:

„Ho, patro Zeŭso, ĉu vi ne koleras Areson kruelan?
Kiom da viroj Ahajaj kaj kiajn ĝis nun li ekstermis
Arogantege, maljuste! Suferas mi, sed sen zorgeto

760. Ĝojas Kiprido kaj Febo-Apolo l'argĉentopafarka,
Kiu ekscitas la malbonfarulon, kontraŭan al leĝoj.
Ho patro Zeŭso, ĉu vi min kolerus, se mi nun Areson
De la batalo forpelus per ekbatego kruela?“

Al ŝi eldiris responde Zeŭso la nŭbkolektulo:

765. „Bone, vi iru eksciti Atenon l'akirforportantan,
Kiu kutimis lin ĵeti en ĉiajn malbonajn dolorojn.“

Diris li; ne malobeis al li la blankmana diino,
Svingis la vipon, kaj tuj la ĉevaloj volonte ekflugis
Inter la tero kaj la ornamita de steloj ĉielo.

770. Kiom da spaco aera travidas okuloj de homo,
Kiu, sur supro sidante, rigardas sur maron malluman,
Tiom per unu eksalto trapaŝis la diaj ĉevaloj.
Sed alveninte al Trojo, kie la ambaŭ riveroj
Kunemetiĝas, Skamandro kun Simoiso rapida,

775. Hero, diino blankmana, siajn ĉevalojn haltigis,
Ilin maljungis kaj per multedensa nubajo ĉirkaŭis,
Kaj Simois' ambrozion elmetis por ilin nutradi.

Ili nun iris, similaj per paŝoj al timaj kolomboj,
Kaj flamdeziris tuj helpi al la herooj Arganoj.

780. Sed alveninte al tie, kie plej multaj, plej gloraj
Viroj ĉirkaŭis Tididon, kuraĝan ĉevalobridulon,
Amasiĝintaj, similaj al bestmanĝegantaj leonoj
Aŭ al aproj kun forto, facile ne kontraŭbatebla,
Hero blankmana haltinte ekkriis per voĉo laŭtega,

785. Similiĝinte Stentoron potencan kun voĉo el kupro,
Kiu kriegis laŭtege kiel dekkvino da homoj:

„Honto al vi, malhonoraj Arganoj, nur ŝajne tre belaj!
Kiam la dia Aĥilo partoprenadis batalon,
La Trojoviroj ne havis kuraĝon el pordo Dardana
790. Iri, ĉar ili timegis lian ponardon teruran.

Nun malproksime de l'urbo, ĉe ŝipoj ili batalas.“

Tiel ŝi diris; ekscitis kuraĝon en koro de ĉiu.
Sed al Tidido rapidis Ateno la bluaokula.

Ŝi lin tuj trovis ĉe lia ĉevalojungita kaleŝo
795. Dum li la vundon freŝigis, al li de Pandaro faritan,
Ĉar lin la ŝvito tre ŝargis kaj ankaŭ la larĝa rimeno
De lia ŝildo, la mano kruel-rigidiĝis pro laco;
Li la rimenon formetis, forviŝis la sangon malluman,
Sed la diino tuŝetis la jugon ĉevalan kaj diris:

800. „Vi tre malmulte similas, Tidido, al via naskinto,
Kiu, malgranda je kresko, estis bravega heroo;
Vane al li unufoje mi malpermesis batali,

Kiam li tre malproksimen foriris de la Aĥajidoj
Kiel sendito en Tebojn, al la Kadmeanoj multnombraj
805. (Mi al li diris trankvile ĉe lia festeno domresti),
Li, enhavante senĉese kuraĝon en sia animo
La Kadmeidojn elvokis batali kaj ĉiujn li venkis
Sen ia peno, ĉar mi al li tre potencege favoris.

Nun mi por vi tiel same faras favoron kaj gardon,
810. Kontraŭ la Trojurbanoj al vi mi ordonas batali,
Sed aŭ la manoj laciĝis al vi pro penega laboro
Aŭ vin la korpereiga teruro haltigas. Al fino
Vi pli ne estas naskito de la Eneido Tideo.“

Al la diino respondis Tidido, l'heroo kuraĝa:

815. „Mi vin rekonas, filino de Zeŭso la ŝildotenanta,
Tial mi al vi sincere kaj rekte eldiras la veron:
Min nek la korpereiga teruro, nek timo haltigas,
Mi nur memoras la vortojn, kiujn vi mem al mi diris:
Vi malpermesis al mi kontraŭagi la diojn feliĉajn

820. Ĉiujn, sed se Afrodito la Zeŭsofilino alvenos
En la batalon, mi povas ŝin vundi per mia ponardo.
Tial mi mem nun depaŝas kaj ankaŭ al ĉiuj aliaj
Viroj Arganoj konsilas al mi tie ĉi amasiĝi,

- Ĉar mi rekonas Areson, en la batalo regantan.“
825. Al li respondis la bluaokula diino Ateno:
„Ho Diomedo Tidido, vi, kara al mia animo,
Vi nun ne timu Areson, ne timu vi ankaŭ aliajn
Diojn senmortajn, ĉar mi al vi estas fidela helpanto,
Kuru vi kontraŭ Areso kun viaj fortegaj ĉevaloj
830. Kaj lin ekvundu, ne timu vi la frenezantan Areson,
Tiun ĉi vipon kaj multfuriozan malkonstantulon,
Lin, kiu de nelongtempe al mi kaj al Hero promesis
Kontraŭbatali Trojanojn, kaj Argoanojn kunhelpi.
Nun li Trojanojn defendas kaj la aliajn forgesas.“
835. Tiel dirinte, ŝi puŝis Stenelon de lia kaleŝo,
Lin per la mano tirinte; li teren kun ĝojo subsaltis.
Tiam Ateno suriris kaleŝon al la Tideido,
Flame volante batali; ekkrakis la akso el fago
Sub la diino terura kaj la kuraĝega heroo.
840. Palas-Ateno ekprenis la vipon kaj la kondukilojn
Kaj al Areso direktis la bruegantajn ĉevalojn.
Tiu ĉi ĵus ekmortigis Perifon, heroon plej bravan
El Etolanaj, la filon de Oĥesio multglora,
La sangavida Areso mortigis lin. Palas-Ateno
845. Kovris sin de l' Tumultulo per kasko de dio Aido.
Kiam la virmortigulo Areso ekvidis Tididon,
Tuj li forlasis Perifon, la viron grandkreskan en polvo
Kuŝi sur loko, sur kiu li lian vivon forrabis,
Kaj al heroo Tidido ĉevalobridulo alkuris.
850. Jen kiam la alkurintoj alvenis la unu alian,
Super la jugon kaj la kondukilojn ekĵetis Areso
La ponardegon por el Diomedo la vivon eltiri,
Sed ĝin per mano ekkaptis la bluaokula diino
Kaj de l' kaleŝo ĝin metis: sentrafe kaj preter ĝi flugis.
855. Nun siavice ĵetiĝis heroo kuraĝa Tidido
Kun ponardego, kaj Palas-Ateno ĝin forte direktis
Rekte Areson en ventron, zonitan de kupra bandaĝo;
Tien entrasis heroo, kaj jen, traŝirinte la haŭton,
La ponardegon eltiris. Laŭtege ekkriis Areso
860. Tute simile al laŭta kriego de naŭmil aŭ dek mil

Viroj kuraĝaj, farantaj grandegan teruran batalon.
Tremo ekprenis l'Aĥaĵojn kune kun la Trojanoj
Pro terurego: tiele kriegis Ares' sangavida.

865. Kiel nigriĝas vaporo, iranta de nuboj malhelaj,
Se post premanta sufoko leviĝas ventego malluma,
Tiel ekŝajnis Areso al la kuraĝulo Tidido,
Kiam la dio en nuboj leviĝis al vasta ĉielo.

Li rapidege forflugis al suproj de dia Olimpo
Kaj alsidiĝis malĝoje, mallume al Zeŭso Kronido,
870. Al li montrante la sangon diecan, de l'vundo fluantan
Kaj eldirante kun plendo kaj ĝemo la vortojnflugilajn:

„Patro Kronido, ĉu vi ne koleras je tiaj perfortoj?
Ĉiam ni dioj senmortaj devas terure suferi
Unu pro alia, al homoj volante favori.

875. Vi indignigas nin ĉiujn, naskinte frenezan filinon,
Kiu en koro malica havas nur nigrajn intencojn.

Ĉiu alia diaĵo, ĉiuj Olimpaj loĝantoj

Al vi obeas kaj ĉiu estas je vi submetita,

880. Nur unu ŝin vi ne bridas per ago aŭ sole per vorto,
Ŝin dorlotante, ĉar vi la pereigulinon embriis.

Ŝi Diomedon kuraĝan, la filon de l'glora Tideo,

Igas sovaĝe batali kontraŭ la dioj senmortaj.

En la komenco li trafis Kipridon, la manon vundinte,

Nun li, simila al dio potenca, min ankaŭ atakis,

885. Nur la rapidaj piedoj min baldaŭ forigis, alie

Longe mi kuŝus sufere en mezo de korpoj teruraj

Aŭ mi kripliĝus je ĉiam pro liaj bategoj per kupro.“

Lin ekrigardis minace la nubkolektulo Kronido:

„Gardu vin, malkonstantulo, apud mi tiel krieti!

890. Mi malestimas vin multpli ol ĉiujn Olimpajn senmortajn!

Ĉiam vi amas malpacon, batalon kaj sangan militon:

Per la senbrida spirito similas vi vian patrinon

Heron; mi mem ŝin apenaŭ prosperas per vortoj pacigi.

Ŝi ankaŭ nun eble estas la kulpo de viaj suferoj!

895. Sed mi ne povas pli vidi kiel vin pikas doloro.

Naskis vin via patrino al mi, kaj mi estas la patro.

Se vin, terurmortigulo, embrius alia senmorta,

Ho, vi de longe jam kuŝus pli sube ol la Uranidoj!“

Diris li kaj al Peono ordonis kuraci la vundon;

900. Kaj, surmetinte rimedon dolorforigantan, Peono
Lin elkuracis, ĉar li ja ne estis naskita por morti.
Kiel la suko de fig' koagulas la lakton blankegan
Tute fluidan, se ĝin la miksanto rapide ekskuas:
Tiel rapide Peono sanigis la vundon de l'dio;

905. Poste lin lavis Hebo kaj donis tre belajn vestaĵojn,
Kaj li sidiĝis al Zeŭso, fiero de gloro multgranda.

Nun ankaŭ venis en belan palacon de Zeŭso potenca
Hero, diino de Argo, kaj l'Alalkomena Ateno,
La homovipon bridinte, Areson la virmortigulon.

Kanto sesa.

Kunvido inter Hektoro kaj Andromaĥo.

La batalkampon teruran forlasis la dioj senmortaj,
Sed la viraroj ĉi tie kaj tie ankoraŭ batalis
Kaj sovaĝege direktis la kupre-brilantajn ponardojn
Inter la bordo de Ksanto kaj Simoiso bruema.

5. Telamonido Ajakso, l'Ahaja apogo, l'unua
Siajn amikojn ĝojigis, la Trojan falangon rompinte,
Viron trafinte, plej bravan el ĉiuj Trakiaj herooj,
Lin, Eŭsoridon Akamon, teruran per kresko kaj forto;
Li en komenco lin trafis en supron multharan de l'kasko
10. Kaj lian frunton trapikis; en lian kranion profunde
Iĝis la kupro, kaj liajn okulojn mallumo vualis.

Post ĉi tio mortigis heroo Tidido Aksilon
La Teŭtrasidon, loĝinton de l'belkonstruita Arisbo,
Riĉan je multaj trezoroj kaj ankaŭ amatan de homoj,
15. Viron gastaman, loĝintan sur vojo tre oft-vizitata;
Sed el la gastoj neniu de li la pereon forigis,
Al li veninte kun helpo. Kaj lin Diomedo mortigis
Kun la servant' Kalezio, lia ĉevalkondukisto,

- Kaj ili ambaŭ sendise eniris en teron malluman.
20. Sed Eŭrialo mortigis Ofeltion kaj Dreson
Kaj al Petas' kaj Esepo sin ĵetis, kiujn la nimfo
Abarbareo al Bukoliono multglora naskis;
Bukoliono, la ido de Laomedono noblega,
Filo unua, naskita sekrete de sia patrino,
25. Estis paŝtisto kaj ame kuniĝis kun tiu ĉi nimfo.
Ŝi gravediĝis kaj metis en mondon al li dunaskitojn;
Nun ili estas rabitaj je l'forto kaj membroj de korpo
Per Mekistido, preninta l'armilojn de ŝultroj iliaj.
Post tio ĉi Astilaon mortigis la vir' Polipeto,
30. Kaj la Perkosan Pediton renversis la reĝ' Odiseo
Per ponardego, kaj Teŭkro mortigis Aretaonon.
La Nestorid' Antiloĥo trapikis Ableron kuraĝan,
Kaj Atreido, la reĝo de viroj, l'heroon Elaton;
Tiu ĉi loĝis sur bordoj de l'belekuranta Satnio
35. En la altega Pedaso. Leito mortigis Filakon.
Post tio ĉi Melantion mortigis l'hero' Eŭripilo.
Sed la hero' Menelao ekkaptis la viron Adraston
Tute vivantan, ĉar liaj ĉevaloj forkuris pro timo:
Ili subite metiĝis en branĉojn de tamariso
40. Kaj, la timonon de lia kaleŝo rompinte, foriĝis
Rekte al Trojo, sekvante aliajn timintajn ĉevalojn;
Li mem ruliĝis rapide al rado de sia kaleŝo
Per la vizaĝo en polvon, kaj apud li baldaŭ stariĝis
La Atreid' Menelao kun la ponardego longombra.
45. Liajn genuojn Adrasto ĉirkaŭe ekprenis petante:
„Ŝparu, Atrid', mian vivon kaj prenu por ŝanĝo
depagon.
Mia patro posedas en hejmo multegajn trezorojn,
Multe da kupro kaj oro kaj fero, tre arte forĝita,
Kaj mia patro el tio ĉi donos grandegan depagon,
Se li sciigos ke mi sur la ŝipoj Aĥajaj troviĝas.“
50. Tiel li diris kaj tuŝis la koron de la Atreido;
Li jam intencis lin doni al unu el siaj servantoj
Por lin konduki al ŝipoj Aĥajaj. Sed Agamemnono
Venis kurante kaj al Menelao minace ekkriis:

55. „Ho Menelao! malforta! Pro kio kompatas vi tiel
Tiujn ĉi homojn? Ĉu tial, ke hejme vin multe honoris
L'homoj de Trojo? Neniu saviĝu de l'sorto terura,
De niaj manoj eĉ idoj, trovantaj sin en la internoj
De Trojaninoj gravedaj, eĉ tiuj ĉi mortu! Pereu
60. Ĉio de Trojo en kuno, sen tombo, sen resto de signo!“
Tiel li diris kaj ŝanĝis l'intencojn en koro de l'frato
Ĉar li parolis tre juste. Kaj jen Menelao ekpuŝis
Foren Adraston, kaj Agamemnono la reĝo lin pikis
Per ponardego en ventron; li falis, kaj la Atreido
65. Sur lian bruston stariĝis kaj la ponardegon eltiris.
En tiu tempo Nestoro laŭtvoĉe ekscitis l'Arganojn:
„Ho Danaidoj kuraĝaj, anaro de l'dio Areso!
Pro akiramo neniŭ haltiĝu kaj tie en posto
Restu por pli da kaptajoj al ŝipoj fleksitaj forporti!
70. Ni militistojn mortigu kaj poste vi povas trankvile
Preni l'armaĵojn de la mortigintaj, kuŝantaj sur kampo.“
Tiel li diris kaj vekis kuraĝon en koroj de viroj.
Baldaŭ la viroj Trojanoj de la Argoanoj kuraĝaj
Estus pelitaj en Trojon, venkitaj de propra malforto,
75. Sed al Ene' kaj Hektoro alkuris kun vorto konsila
La Priamido Heleno, la birddivenisto tre arta.
„Aŭdu, Ene' kaj Hektoro (pli ŝarĝas ja vin la laboroj
De Trojaviroj kaj de Likianoj, ĉar vi pli prosperas
En ĉiaspeca afer', en batalo kaj en konsilado),
80. Vi nun ĉi tie stariĝu, detenu ĉe l'urbo la virojn,
Urban kurantajn, ke ili en brakojn de l'Trojaj virinoj
Time ne kuru sub ĝoja mokado de la malamikoj!
Sed post konvena ordigo de la disigintaj falangoj
Ni nin pretigu batali kontraŭ la viroj Danaoj,
85. Kvankam nin premas mizero: ĉar tio ĉi estas necesa.
Sed dum ĉi tio, Hektoro, vi iru en Trojon kaj diru
Vian kaj mian patrinon, ke ŝi kunvenigu virinojn
Al la sanktejo de la bluokula diino Ateno,
Per la ŝlosilo malfermu la pordon de l'sankta loĝejo
90. Kaj la vestaĵon, ŝajnantan al ŝi la plej bela, plej granda
En la palac' kaj de ŝi pli amatan ol ĉiuj aliaj,

- Metu ŝi sur la genuojn de la belabukla Ateno
Kaj ŝi promesu oferi dekdu unujarajn bovidojn,
Ne ekprovintajn ankoraŭ la jugon, se ŝi kompatos
95. La Trojurbon, virinojn kaj niajn infanojn malgrandajn,
Se ŝi forigos de l'sankta Trojurbon la viron Tididon,
La sovagegan heroon, farantan ĉe ni teruraĵojn,
Kiu laŭ mi estas la plej kuraĝa el viroj Ahajaj:
Tiel ni eĉ mem Ahilon, la ĉefon de viroj, ne timis,
100. Kiu sin nomas diina naskito. Ho ne, la Tidido
Pli furiozas. Neniu lin estas egale-kuraĝa!"

- Tiel li diris. Hektoro volonte obeis la fraton.
Li de l'kaleŝo elsaltis sur teron kun la bataliloj
Kaj, formetinte la akrajn ponardojn, li iris tra vicoj
105. Ree la virojn eksciti kaj vekti teruran batalon.
Tiu sin ree deturnis kaj kontraŭ l'Ahajoj aliris.
Nun l'Argoanoj depaŝis kaj la mortigadon ĉesigis:
Ili imagis ke Dio senmorta el stela ĉielo
Venis por helpi Trojanojn, tian kuraĝon prenintajn.
110. Sed la Trojanojn Hektoro ekscitis per krio laŭtvoĉa:
„Bravaj Trojviroj kaj anoj, vokitaj de malproksimaĵo,
Estu homviroj, konservu senĉese kuraĝon en koro!
Mi nun eniros en sanktan Trojurbon, kaj al la maljunaj
Viroj konsilaj kaj ankaŭ al niaj edzinoj mi diros
115. Diojn petegi preĝante kaj hekatombojn promesi.“

- Tiel dirinte, la kaskobrilanta Hektoro foriris,
Laŭte frapata sur siaj piedoj kaj kolo de l'nigraj
Felfofinoj, estintaj ĉirkaŭe la ŝildo rondeta.
En tiu tempo Tidido kaj Glaŭk' Hipolohonaskito
120. Iris el mezo de l'viroj, flamante kontraŭe batali;
Kiam l'herooj, renkonten kurintaj, sin alproksimiĝis,
La Tideido kuraĝa tiel eldiris l'unua:

- „Kiu vi estas, heroo kuraĝa, el inter mortemaj?
Mi vin ne vidis ĝis nun en batalo, gloranta la virojn.
125. Vi pli superas per aroganteco aliajn heroojn,
Ĉar vi vin metas kontraŭen al mia longombra ponardo;
Al mi kontraŭemetiĝas nur idoj de malfeliĉuloj!
Sed se vi estas diaĵo, veninta de l'alta ĉielo,

- Certe mi ne batalos kontraŭ diaĵoj senmortaj.
130. Eĉ la kuraĝa Likurgo, la filo de l'glora Driaso
Vivis ne longe post lia batalo kontraŭ senmortaj.
Iam li la nutristinojn de Dioniso atakis
Sur la supraĵo de Niso la sankta, sed tiuj ĉi kune
Ĵetis la sceprojn sur teron, ĉar la mortigisto Likurgo
135. Ilin per vipo frapegis, kaj mem Dioniso pro timo
Iĝis en ondojn de maro, kaj lin al si prenis Tetiso,
Lin, tremigitan de l'voĉo minaca de l'viro potenca.
Sed tiun baldaŭ koleris la dioj trankvile vivantaj,
Kaj lin Kronido blindigis. Post tio ĉi li nelongtempe
140. Vivis, ĉar li malamata estis de dioj senmortaj.
Ne, mi ne volas batali kontraŭ la dioj feliĉaj!
Sed se vi estas mortema manĝanto la fruktojn de l'tero,
Venu ke vi pli rapide eniru en regnon de ombroj.“
Al li respondis renkonten la glora Hipolohoido.
145. „Nobla Tidido, pro kio vi pri mia gento demandas?
Al la arbaraj folioj similas la gentoj de homoj:
Unuj la vento sur tero disternas, aliajn l'arbaro
Ree kreskigas, se venas denove la varma printempo,
Tiel la homoj: ĉi tiuj pereas kaj tiuj naskiĝas.
150. Sed se vi volas, mi al vi klarigos, ke vi konatiĝu
Je nia gento, tre bone konata al multe da homoj.
Estas en la ĉevalriĉa Argujo urbo Efiro,
Tie vivadis Sizifo, plej lerta ol ĉiuj mortemaj;
Li, l'Eeolido Sizif' havis filon nomintan sin Glaŭko;
155. Glaŭko la neriproĉeban Belerofonton embriis,
Al tiu ĉi la senmortaj belecon kaj grandan kuraĝon
Donis. Sed Preto elpensis kontraŭ li grandan malbonon
Kaj el la lando patruja lin pelis, regante potence
La Argoanojn, al li submetitajn per Zeŭso Kronido;
160. Tiun ekamis la dia Anteo, l'edzino de Preto,
Kaj lin logadis sekrete, sed ŝi lin ne povis konvinki,
Tiun ĉi Belerofonton prudentan kaj bondezireman.
Tial ŝi venis kun falsa parolo al Preto la reĝo:
„Mortu, ho Preto, aŭ vi mem mortigu Belerofonton,
165. Kiu min volis delogi per amo, de mi ne volata.“

- Tiel ŝi diris. La reĝo, ĉi tion aŭdinte, koleris,
Sed li evitis mortigi (li timis ĉi tion en koro).
Li en Likujon lin sendis kaj al li malĝojajn signaĵojn
Donis, gratinte mortvortojn sur tabuleto fleksita,
170. Al la bopatro portota, de kiu li morton ricevos
Kaj li eniris Likujon sub bona favoro de dioj.
Jen li atingis la landon, ĉe ondoj bruantaj de Ksanto,
Kaj lin favore honoris la glora Likuja reganto,
Daŭre naŭ tagoj regalis kaj por li naŭ bovojn oferis.
175. Sed kiam la dekafoja rozfingra Eoso aperis,
Li sian gaston demandis kaj volis rigardi la signojn,
Al li de Preto reganta de lia bofilo senditajn.
Nun, kiam li sciigis la signojn mallumajn de morto,
Li lin ordonis — mortigi la nevenkeblan Ĥimeron,
180. Kiu devenis de gento de dioj, sed ne de mortemaj;
Drako per posto, liono per kapo kaj ĉamo per mezo,
Ĝi terurege elmetis potencan flamantan fajrspiron;
Tamen li ĝin mortigis, fidante je signoj de dioj.
Due li faris militon kontraŭ la gloraj Solimoj,
185. La plej teruran ol ĉia, farita de li kontraŭ viroj,
Trie li la Amazonojn la virekuraĝajn mortigis.
Tamen por la reveninta la reĝo elpensis ruzajon:
Li plej kuraĝajn Likiojn de l'vasta Likujo elektis
Kaj ilin kaŝis embuske; sed ili ne venis pli hejmen:
190. Ĉiuj pereis de Belerofonto la neriproĉebla.
Fine la reĝo ekkonis ke estas li ido de dio
Kaj lin detenis kaj donis al li sian belan filinon;
Li ankaŭ donis al li la duonon da reĝa potenco
Kaj la Likiologantoj — parton da tero plej bona,
195. Riĉa je belaj plantaĵoj kaj je rikoltoj de kampo.
Trio da idoj naskiĝis al Belerofonto kuraĝa,
Tri: Hipoloĥo, Isandro kaj Laodomio-filino.
La multesaĝa Kronido kuniĝis kun Laodomio,
Kaj Sarpedonon ŝi naskis, heroon al dio similan.
200. Belerofonto surtiris sur sin malamegon de dioj
Kaj ĉirkaŭvagis sur kamp' Aleia en tuta soleco
Kun malĝojego en koro kaj plenevitante vivulojn;

- Lian filon Isandron mortigis Ares' mortigema,
Kiam li kontraŭbatalis la virojn kuraĝajn Solimojn,
205. Kaj Artemizo mortigis lian amatan filinon.
Sed Hipoloĥo embriis min kaj mi nomas lin patro.
Li min al Trojo alsendis kaj al mi persiste ripetis
Peni superi aliajn kaj min inter viroj distingi
Kaj malhonoru neniel la genton de l'patroj, plej gloran
210. En mia urbo Efiro kaj en la vastega Likujo.
Jen estas gento, la ano de kiu mi gloras min esti.“
Tiel li diris, kaj la Tideido kuraĝa ekĝois.
La ponardegon rapide li ŝovis en teron nutreman
Kaj al la ĉefo de viroj eldiris la dolĉan parolon:
215. „Vere, vi estis por mi iam gasto en domo de l'patro:
Iam la dia Ineo Belerofonton kuraĝan
En sia dom' daŭre dudek tagoj regalis amike,
Kaj ili unu alian honoris per belaj donacoj:
Zono belege-purpura estis la don' de Ineo,
220. Belerofonto donacis oran dufundan pokalon.
Tiun pokalon mi hejme forlasis, ĉi tien irante,
Sed mi nun pli ne memoras Tideon, mi estis infano,
Kiam l'Aĥaja viraro pereis sub muroj de Teboj.
Tial mi estas por vi de nun gasto en lando Argujo
225. Kaj vi la sama por mi, se mi en la Likujon eniros;
Tial ni niajn ponardojn nun reciproke evitu;
Por mi sufiĉe ja estas da Trojoj kaj gloraj liganoj
Ke mi mortigu laŭ volo de di' kaj per mia atako,
Ankaŭ vi havas Arganojn, kaj kiun vi povas — mortigu;
230. Glaŭko, ni nun intersanĝu l'armilojn ke ankaŭ l'aliaj
Sciu ke ni multfieras je tiu gastamo de patroj.“

- Tiel parolis l'herooj kaj de la kaleŝoj eksaltis,
Donis la manojn kaj ambaŭ ĵuris je amikeco.
En tiu tempo Kronido forrabis la saĝon de Glaŭko:
235. Li al Tidido fordonis oran armaĵon por kupra,
Koston de cento da bovoj li ŝanĝis je kosto de naŭo.
Sed al la Skeaj pordegoj, ĉe l'kverko, aliris Hektoro
Al li la Trojaj virinoj kaj la fraŭlinoj rapidis.
Tiu demandis pri filoj, pri karaj amikoj, pri fratoj,

240. Tiuj ĉi pri siaj edzoj. Sed li ilin diris la diojn
Preĝi, ĉar al multanombro minacis grandegaj doloroj.
Sed kiam li al Priama, al reĝa beldomo alvenis,
De poluritaj kolonoj ĉirkaŭemetita (interne
Estis dekkvino da ĉambroj el glate-hakita marmoro,
245. Unu apude l'alia kaj tie ĉi kuŝis la filoj,
L'idoj de l'reĝo Priamo kun siaj edzinoj florantaj;
Kontraŭ ĉi tiuj en korto estis por reĝaj filinoj
Dekdu bel-ĉambroj el glata marmoro sub unu tegmento,
Unu apude l'alia kaj tie ĉi ĉiuj bofiloj
250. De la reganta Priamo kuŝis kun siaj edzinoj).
Tie Hektoro renkontis patrinon la multeamatan,
Al Laodiko irintan, al sia plej bela filino.
Ŝi lian manon ekkaptis kaj al li tiele eldiris:
„Kial, ho filo, vi nun la teruran batalon forlasis?
255. Ĉu l'Aĥajidoj, — ho nomo malama! — kruele nin premas,
L'urbon ĉirkaŭbatalante, ke al ni vin puŝas deziro
Levi la manojn al Zeŭso en nia multalta Trojurbo?
Restu, mi al vi alportos tuj vinon la dolĉamielan
Ke vi komence por patro Kronid' kaj por dioj ceteraj
260. Verŝu, kaj poste vi mem per la trinko la koron ĝojigu,
Ĉar en la viro lacinta la vino renaskas la forton,
Kaj vi laciĝis pro la batalado por viaj amikoj.“
Al ŝi eldiris responde la kaskobrilanta Hektoro:
„Ho, estimata patrin', ne alportu nun vinon mielan,
265. Ke vi min ne moligu, ke mi la kuraĝon ne perdu.
Vinson al Zeŭso elverŝi per mano ne blanke lavita
Timas mi: oni ne devas al nubkolektulo Kronido
Preĝi, estante kovrita de sango kaj polvo batala.
Iru vi al la sanktejo de la venkulino Ateno
270. Kun timiano, kunprenu virinojn la plej estimindajn
Kaj la vestaĵon, ŝajnantan al vi la plej bela, plej granda
En la palac', kaj de vi la plej multe ol ĉiuj amatan,
Metu vi sur la genuojn de la belabukla Ateno,
Al ŝi promesu oferi dekdu unujarajn bovidojn,
275. Ne ekprovintajn ankoraŭ la jugon, se ŝi kompatos
La Trojourbon, virinojn kaj niajn malgrandajn infanojn,

- Se ŝi forigos de l'sankta Trojurbo la viron Tididon,
La sovaĝegan heroon, farantan ĉe ni teruraĵon.
Iru vi al la sanktejo de la venkulino Ateno
280. Dume mi al Aleksandro iros kaj lin alvokos,
Se li min volos obei. Ho, plaĉu al dioj, ke sub li
Tuj malfermiĝu la ter'. Dio kreis lin por pereigo
De l'Trojpopolo, de l'reĝo Priamo kaj de liaj idoj.
Ho, se mi vidus lin iri de tie ĉi for al Aido,
285. Mia animo forgesus pri mia mizero maldolĉa!
Diris li. Ŝi en la domon revenis kaj al servantinoj
Baldaŭ ordonis venigi plej noblajn virinojn de l'urbo.
Poste ŝi mem subeniris en ĉambron la boneodoran,
Kie troviĝis vestaĵoj multformaj, tre bele broditaj
290. De artistinoj Sidonaj — ĉi tiujn vestaĵojn Pariso
De Sidonurbo elportis, kiam li naĝis la maron
Por forkonduki Helenon, naskitan de patro noblega —
Por la diino elektis Hekabo unu el ili,
Kiu samtempe montriĝis plej granda kaj bele brodita,
295. Kiel belstelo brilegis kaj kuŝis sub ĉiuj ceteraj.
Poste ŝi iris returnen, sekvita de noblaj virinoj.
Jen ili al la sanktejo de Palas-Ateno alvenis,
Kaj la ruĝvanga Teano por ili la pordon malfermis,
Ŝi, la filin' de Kiseo, edzin' de hero' Antenoro
300. Kaj de Trojanoj nomita pastrino de Palas-Ateno;
Jen ili levis la manojn, kun ĝemo petante Atenon;
Sed la ruĝvanga Teano, la belan vestaĵon preninte,
Ĝin sur genuojn de la belabukla diino surmetis
Kaj al filino de l'granda Kronido petege eldiris:
305. „Urbapoganto, majesta Ateno, plej nobla diino,
Rompu vi la ponardegon de la Tideido, kaj lin mem
Suben faligu en polvon antaŭe la Skeaj pordegoj
Por ke al vi ni oferu dekdu unujarajn bovidojn.
Ne ekprovintajn ankoraŭ la jugon, se vi kompatos
310. La Trojourbon, virinojn kaj niajn malgrandajn infanojn.“
Tiel ŝi diris preĝante, sed ŝin ne atentis Ateno.
Dum ili preĝis al la naskitino de Zeŭso potenca,
Iris Hektoro al dia Pariso, en lian beldomon,

7) Persono, kiu abonis la «Bibliotekon» sen antaŭpago, ne alsendis la monon en la definitiva tempo, t. e. post la ricevo de l' 10-a folio, kaj ne respondis la memorigon de l' administracio, perdas por ĉiam la krediton de l' administracio.

8) Abonanto, kiu ne deziras plu abonadi la «Bibliotekon», devas ĝustatempe sciigi pri tio la administracion kaj unutempe pagi ĉiujn siajn ŝuldojn al la «Biblioteko», se li ilin havas.

9) La «Bibliotekon» oni povas abonati: en *Francujo* — ĉe s-ro L. de Beaufront (Epernay, Marne); en *Portugalujo* — ĉe d-ro Costa e Almeida (Rezende); en *Rusujo* ĉe s-ro Gernet (Odeso, Puŝkinskaja, 44); en *Svedujo* — ĉe la Klubo Esperantista en Upsalo; la abonantoj el aliaj landoj devas sin turni al s-ro Gernet.

10) Oni povas pagi por la «Biblioteko» per la mono kaj neuzitaj poŝtaj signoj de ĉiuj landoj.

11) Eldonanto de la «Biblioteko» estas ĉiu persono, kiu sendos al s-ro Gernet ne malpli ol 25 frankoj ĉiujare ĝis tiam, kiam la «Biblioteko» bezonos nenian materialan helpon. — t. e. kiam la enspezoj de la «Biblioteko» sufiĉos por kovri ĝiajn elspezojn, — aŭ kiu sendos al li untempe ne malpli ol 100 frankoj.

12) La nomoj de la eldonantoj estas presataj sur la titola paĝo de ĉiu kajero de la «Biblioteko».

12) Kiam la «Biblioteko» donos profiton, tiu ĉi profito estos dividata inter ĉiuj eldonantoj kaj ĉiu el ili ricevos la parton, proporcian al la enportita de li kapitalo kaj al la tempo, dum kiu oni uzis tiun ĉi kapitalon.

13) Kiam la nombro de la eldonantoj estos ne malpli ol 5, ili tiam elektados ĉiujare per absoluta plimulto da voĉoj la redaktoron de la «Biblioteko», difinos la abonpagon kaj havos la rajton ŝanĝi la kondiĉojn de eldonado.

14) Tiuj ĉi kondiĉoj estos presataj sur la kovrilo de ĉiu kajero de la «Biblioteko». Pri ĉiuj ŝanĝoj de tiuj ĉi kondiĉoj oni anoncas en «Lingvo Internacia».

15) La nomoj de la abonantoj estos presataj sur la kovriloj de la kajeroj de l' «Biblioteko».

Abonantoj de la «Biblioteko».

La foliojn 1—10 abonis:

52—54 s-ro V. Laskin, 55—64 Klubo Esperantista en Uppsala, 65 Odesa filio de la soc. «Espero», 66 Urba biblioteko en Odessa, 67 s-ro J. A. Jivotovski, 68 s-ro N. D. Slonŝĉ, 69 s-ro A. M. Arnold, 70 s-ro A. M. Grünfeld, 71 s-ro L. L. Paĉkovski, 72 s-ro G. Slucki, 73 s-ro M. Sapojnikov, 74 s-ro W. H. Trompeter, 75 s-ro A. J. Semenov, 76 s-ro F. A. Postnikov.

La sekvanta kajero de la «Biblioteko» enhavos la komencon de «*Ediĝo de Figaro*», komedio de Beaumarchais.

Al ĉiuj amikoj de la lingvo Esperanto ni rekomendas la monatan gazeton:

“Lingvo Internacia”

eldonatan de la Klubo Esperantista en Upsala.

La gazeto “Lingvo Internacia” estas eldonata en la lingvo Esperanto kaj enhavas: 1) sciigojn pri la sukcesoj de Esperanto en diversaj landoj, pri la novaj libroj en kaj pri Esperanto, pri internaciaj vojaĝoj kaj entute pri ĉio, tuŝanta lingvon internacian; 2) artikolojn, dediĉitajn al la gramatiko kaj vortaro de Esperanto; 3) artikolojn pri diversaj projektoj, novaj kaj malnovaj, de interacia komunikigo; 4) diversajn modelojn de prozo kaj poezio en Esperanto; 5) anoncojn.

La gazeton “Lingvo Internacia” oni abonas:
en Ameriko ĉe R. Geoghegan, Tacoma, Washington, U. S. A.
en Francujo ĉe L. de Beaufront, Epernay (Marne).
en Germanujo ĉe W. H. Trompeter, Schalke, Westfalen.
en Hispanujo ĉe Adolfo Serapio, Pontevedra, Silleda.
en Portugalujo ĉe d-ro Costa e Almeida, Rezende.
en Rusujo ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, Odessa.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto, aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. Upsala.

La jara abonpago estas:

75 cendoj = 4,25 frankoj = 3,50 germ. markoj, = 1000
rejsoj = 1,50 rubloj = 3,00 kronoj.

nomoj staras la nombro de la ricevitaĵoj ekzempleroj). Se iu el la estintaj ricevantoj de la „Biblioteko“, ne trovas tie ĉi sian nomon, tio ĉi montras, ke li aŭ tute ankoraŭ ne pagis, aŭ pagis nur por *parto* de la ricevitaĵoj kajeroj. La *plenajn adresojn* ni ne presas, ĉar ili trovas sin en la „Adresaroj de esperantistoj“.

Ahlberg, N.; Ahlberg, P.; Andrejev, A.; Andrzejewski; Arnold, A. (3); de Beaufront, L. (4); Bjeloglazov; Blumental, A.; Blumental, L.; Borovko, N.; Budagianc, T.; Burenkov, A.; Bušera, J.; Ĉernobajev, G.; Ĉiĥačov, N. (5); da Cruz Capello; Costa e Almeida; Curioni, B.; Ĉajkovskaja, A. (nun Borovko) (2); Davidenko, N.; Devjatnin, V. (2); Dmochowski, S.; Dombrovski, A.; Ender, F.; Endryat, E.; Englund, G.; Erturt, E.; d' Eysautier, E.; Feldšar, J. (4); Fidler, M.; Forkarth, J.; Frankovskaja, T.; Fredberg, L.; Frenkel, A.; Ganouna J.; von Gedda, A.; Gelrot, E.; Gernet, A.; Gernet, V. (3); Glinin, N. (2); Goldberg, N.; Grabowski, A. (3); Grineva, A.; Grünfeld, A.; Hall, E.; Hübert, K. (2); Haller, A.; Hansson, L.; Helsingfors Klubo; Hussan, H.; Ĥlebnikov, V.; Jakovlev, P.; Jasenski, I.; Ĥerebko, N.; Jezerski, M.; Johnson, E. (2); Jonson, B. G.; Jurine, T.; Kadik, P.; Kajurina; Kalašnikov, J.; de Kanaloŝi-Lefler, F.; Kaminski, J. (2); Kazi-Girej, N.; Kofman, A.; Koricki, E.; Korolenko, V.; Kravcov, V. (10); Kürse ner, F. (2); Kušnir, N.; Kvitka, K.; Langlet, V. (4); Lemaire, R. (2); Leneart, S.; Lindén, C.; Lindner, S.; Loginov, E.; Lojko, J. (5); Lundh, O.; Lundström, S. (5); de Magalhaes, A.; Manjkovskaja, E. (5); Marignoni, D. (2); Mattson, M.; Matusievič, T.; Medvjed, A.; Milevski, J.; Nadejdina, K.; Naumov, A.; Nissenbaum, L.; Nömm, A.; Nordenstreng, R.; Nordensvan, M.; Nudelmann, Š.; Nurnberga Klubo (25); Olšvang, A.; Olson, O.; Ostrovski, I. (2); Pergament, O.; Pesockij, A.; Petrjajevski; Pleyel, H.; Pogorilko, P.; Portnov, L.; Proĥorovič, A.; Prakoŝjev, V.; Pučkovski, I. (10); Rabinovič, A.; Raekson, J.; Rakoč, E.; Reiner, A.; Reinhold, M.; Revič, O.; Rjabinin, G. (5); Rojdestvenski, D.; Rosseter; Roswall, A. (2); Ruban, A.; Sarmiento, L.; Savostjanov, M.; Semjonov, A.; Sereda, M. (2); Smolin, M.; Solovjev, M.; Spiridonov, N.; Stenberg, P.; Sutkovoĵ, N. (2); Svanbom, K.; Tanejev, S.; Tripolski, K.; Trompeter, W. H. (2); Waher, W. (2); de Wahl, E.; Vanjušin, K.; Wasniewski, J.; Wiens, H.; von Willebrand, G.; Vladikin, F.; Vogau, S. (3); Vonski, S.; Würstle, J.; Zarucki; Zeidlitz, O.; Zinovjev, A. (3). — La nomoj de tiuj, kiuj enportos (aŭ plenigos) ankoraŭ sian pagon por la ricevitaĵoj 21½ folioj de la „Biblioteko“, ni publikigos en la venontaj kajeroj.

La ĝis nun elirintaj

paĝoj 1 ĝis 400 de la »Biblioteko« (el kiuj la lastaj 41 paĝoj dank' al diversaj cirkonstancoj eliris ne per vojo abona, t. e. ne estis senditaj nek kalkulitaj al la abonantoj) kostas ĉiuj kune 6,85 frankojn kaj enhavas la sekvantajn verkojn: **Hamleto**, tragedio de Ŝekspir; **Ekzercaro de la lingvo Esperanto**; **Boris Godunov**, dramo de Puŝkin; **Granda Vortaro germana-esperanta**, folio I; **Iliado**, poemo de Homero, kantoj I kaj II; **Vortaro esperanto-esta**; **Aŝik Kerih**, rakonto de Lermontov; **Dio ĉiam veron vidas**, rakonto de Tolstoj; **Stona Gasto**, dramo de Puŝkin.

Lingvo Internacia.

Monata gazeto por la lingvo Esperanto, eldonata de la Klubo Esperantista en Upsala.

Kosto de abono por jaro: frankoj 4,25 = kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = rubloj 1,50.

La gazeto »Lingvo Internacia« estas eldonata en la lingvo Esperanto kaj enhavas: 1) sciigojn pri la sukcesoj de Esperanto en diversaj landoj, pri la novaj libroj en kaj pri Esperanto, pri internaciaj vojaĝoj kaj entute pri ĉio, tuŝanta lingvon internacian; 2) artikolojn, dediĉitajn al la gramatiko kaj vortaro de Esperanto; 3) artikolojn pri diversaj projektoj, novaj kaj malnovaj, de internacia komunikiĝo; 4) diversajn modelojn de prozo kaj poezio en Esperanto; 5) anoncojn.

Oni abonas la gazeton: en Francujo ĉe *L. de Beaufront* (Epernay, Marne); en Germanujo ĉe *W. H. Trompeter* (Schalke, Westfalen); en Rusujo ĉe *V. Gernet* (Odessa, Remesleunnaja, 11); en Portugalujo ĉe *Costa e Almeida* (Bezende). Ĉiuj aliaj volu sin turni rekte al la redakcio (Klubo Esperantista, Upsala, Svede).

Anstataŭ monoj estas akceptataj la nenuzitaj poŝtsignoj de ĉiu lando. Ĉiu aboninta 1 ekz. ricevas la 5-an seopage.

BIBLIOTEKO
DE LA LINGVO INTERNACIA
ESPERANTO.

Folioj $\frac{1}{2}$ de la 3-a, 4-a kaj $\frac{1}{2}$ de la 5-a.



ILIADO.

POEMO
DE
HOMERO.

TRADUKIS **A. KOFMAN.**

KAJERO III.

La „Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto“ estas eldonata de la sekvantaj personoj: D-ro *Costa e Almeida* (Bezende), s-ro *A. M. Arnold* (Odessa), s-ro *F. D. Avilov* (Tiflis), s-ro *L. de Beaufront* (Epernay), s-ro *V. N. Devjatnin* (Gedrojei), d-ro *Diodono* (Génève), s-ro *V. Gernet* (Odessa), s-ro *N. A. Kazi-Girej* (Borisoglobsk), s-ro *R. Lemaire* (Epernay), s-ro *I. M. Lojko* (Minsk), d-ro *I. M. Lucenko* (Odessa), s-rino *E. Mankovskaja* (Kromenee), d-ro *I. D. Ostrovski* (Jalta), s-rino *A. V. Pronorovič-Kočmareenko* (Varsovio), s-ro *V. F. Smurlo* (Tomsk), s-ro *A. Zakrjevski* (Smolensk), esperantistoj de Krasnojarsk kaj Esperantista Klubo en Uppsala.

Nürnberg.

Presejo de W. Tammel.

1897.

Regularo

de la

«Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto».

1) La «Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto» estas eldonata en la lingvo Esperanto en la formo de apartaj kajeroj kaj enhavas:

- a) originalajn kaj tradukitajn verkojn literaturajn en prozo kaj en versoj;
- b) verkojn populare-sciencajn, prefere filologiajn kaj geografiajn;
- c) specialajn sciencajn kaj teknikajn vortarojn de la lingvo Esperanto;
- d) vortarojn nacie-esperantajn kaj esperante-naciajn;
- e) lernolibrojn de la lingvo Esperanto en diversaj lingvoj.

2) La kajeroj de la «Biblioteko» eliras en nedifinita tempo. Dum unu jaro eliras ne malpli ol 20 kaj ne pli ol 50 presaj folioj po 16 paĝoj de ordinara formato.

3) La redaktoro de la «Biblioteko» estas s-ro A. S. Kofman (Rusujo, Odeso, Neĵinskaja, 34); al li oni devas sendi la manuskriptojn, difinitajn por la «Biblioteko».

4) La administratoro de la «Biblioteko» estas s-ro V. Gernet (Rusujo, Odeso, Puŝkinskaja, 44); al li oni devas sin turni kun ĉio tuŝanta la eldonadon kaj la abonadon de la «Biblioteko».

5) La aŭtoro aŭ tradukinto de verko, presita en la «Biblioteko», ricevas senpage 100 ekz. de tiu kajero, en kiu la verko estas presita.

6) Oni povas aboni la «Bibliotekon» en la sekvantaj kondiĉoj:

- a) sendi al unu el la personoj, nomitaj en la punkto 9, sian adreson kaj la pagon por ne malpli ol 10 presaj folioj (160 paĝoj). Tiu ĉi pago estas: en Francujo — 2 fr. 50 c. por 160 paĝoj; en Germanujo — 2 markoj; en Portugalujo — 600 rejs-oj; en Rusujo — 1 rublo; en Svedujo — 2 kronoj.

Rimarko. — Kiu abonas 10 ekzemplerojn de la «Biblioteko» aŭ kiu sendas la aŭtaŭpagon por 100 presaj folioj (1600 paĝoj), tiam ricevas 10 foliojn *senpage*.

- b) sendi al unu el la samaj personoj sian adreson kaj sciigi pri sia deziro aboni la «Bibliotekon», promesante alsendi la pagon post la ricevo de ĉiu 10-a folio. Nur en tiu ĉi okazo la pago estas 1 1/2-oble pli granda, t. e. 3 fr. 75 c. por Francujo, 3 markoj por Germanujo, 900 rejs-oj por Portugalujo, 1 r. 50 k. por Rusujo, 3 kronoj por Svedujo.